

# Noveloj de Tang-dinastio



Eldonita de GEO  
2015

**Diversaj ĉinaj aŭtoroj**

# **Noveloj de Tang-dinastio**

**Elĉinigis Guozhu**

Eldonita de GEO

2015

## **La Enhavo**

[La blanka simio](#)

[Animo disiĝinta de la korpo](#)

[Vulpa feino Ren](#)

[La magia kapkuseno](#)

[SinJORino Saliko](#)

[Veto pri kantoj](#)

[La sagaca servistino Queyao](#)

[Li Mo](#)

[La festeno de s-ro Li](#)

[Strangaj songoj](#)

[Tri songoj](#)

[La brava knabo Ou Ji](#)

[Homo kun krispa vangbarbo](#)

[Rakonto pri hetajro Yang](#)

[Antaŭdirita geedziĝo](#)

[Disipulo kaj alkemisto](#)

[Kunlun-a sklavo](#)

[La jadaj pistujo kaj pistilo](#)

[Duko Li Jing](#)

[La maljunulo en la orienta urbo](#)

[Reviviĝo de Wushuang](#)

[La bravaĵo de s-ro Guo Yuanzhen](#)

[La tria ino de Banqiao-gastejo](#)

[Oldulo Zhang](#)

[Forpreno de skatolo far Hongxian](#)

**Anonimo (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# LA BLANKA SIMIO

En la lastaj jaroj de Datong-erao (535-545), Liang-dinastio (502-556 p. K.), Lin Qin, la Sudpaciga Generalo, estis sendita suden militi. Atinginte Guilin, li frakasis la armeojn de Li Shigu kaj Chen Che.

Alia generalo Ouyang He okupis ĝis Changle kaj konkeris ĉiujn klanojn en profundaj kaj krutaj montkavernoj. Ĉe Ouyang He estis edzino delikate blanka kaj tre ĉarma virineto. Iu subulo diris:

"Kial vi kunportas kun vi tiel ĉarman belulinon dum militmarŝo? Sciu, Via Generala Moŝto, ke ĉi tie estas demono, kiu ofte rabis knabinojn, precipe tiujn belajn. Do zorgeme gardu vian edzinon!"

Ege maltrankvila Ouyang He sendis soldatojn noktgardi ĉirkaŭ lia loĝejo kaj kaŝis la edzinon en sekreta kabineto firme fermita, kun pli ol dek servistinoj garde akompanantaj.

Estis venta kaj obskura nokto. Ĝis la kvina nokta gardoperiodo okazis ankoraŭ nenio eksterordinara. La gardantoj sentis iom da malstreĉiĝo kaj pretervole dormetis, sed tuj vekiĝis de io surpriza kaj jen la edzino jam malaperis, dum la pordoj restis fermitaj. Neniu povas scii de kie ŝi malaperis. Ekster la pordo vojbaras alta krutaĵo kaj la prema noktobskuro ĉion neniigis nevidebla, malhelpante la akuratan serĉadon.

Je la tagiĝo oni retrovis jam neniun postsignon. Vundate de la forta indigno kaj doloro He ĵuris ke li ne foriros antaŭ ol retrovo de sia edzino. Li petis permeson restigi sian armeon pro malsano kaj ĉiutage serĉadis disflanken al malproksimaj krutaĵoj trans ravinoj.

Tiel pasis pli ol unu monato. Ĉe bambua bosko pli ol cent liojn distanca oni hazarde ektrovis unu brodsuon de la edzino, kiu, kvankam pluve malsekigita, tamen restis sufiĉe rekonebla. Tio portis al Ouyang He pli grandan ĉagrenon, sopiron, kaj plifirmigis lian decidemon por trovi la edzinon. Tridek bravaj soldaatoj serĉadis kun armiloj kaj manĝaĵoj, sin penetrante tra la montvaloj kaj ripozante sub la ĉielo.

Forpasis ree pli ol dek tagoj. Ili foriris de sia tendaro jam ĉirkaŭ ducent liojn. Leviĝis sude belsilueta monto kun abundaj arbaroj kaj ĉirkaŭbaranta profunda rivero kiun ili transveturis per floso memfarita. El inter la smeraldaj bambuoj sur la klifo flagris jen kaj jen ruĝvestitoj kaj alŝvebis de tempo al tempo ridoj, voĉoj. Manprenante lianojn la serĉantoj surgrimpis la klifon. Antaŭ ili jen viciĝas belaj arboj intermikse ornamitaj de raraj floroj. Verda herbaro sterniĝis sube kvazaŭ mola tapiŝo. Vere kristale kvieta mirlando!

Tra la orienta ŝtona pordo iras dekoj da virinoj kun elegantaj silkaj pelerinoj kaj pimpaj vestaĵoj, sin amuzante per kanto aŭ babilo. Vidante la homojn, ili heziteme retenis siajn paŝojn kaj atendis rigardante. Kiam He kaj liaj soldatoj alproksimiĝis, la virinoj ekdemandis:

"Kial vi venas ĉi tien?"

He respondis. La virinoj interŝanĝis suspirojn kaj diris:

"Via amata edzino venis ĉi tien jam pli ol unu monaton. Nun ŝi kuŝas malsana en la lito. Vole ŝin konsolu!"

Ili eniris la pordon, kies klapegoj estis el ligno kaj vidis tri grandajn kaverno-halojn, de kies muro ĉiuflanke staris litoj, senescepte kun brokataj kusenoj.

La edzino de Ouyang He kuŝis sur ŝtona lito en luksaj litkovriloj kaj antaŭ kuriozaj frandaĵoj. Sed, apenaŭ He alproksimiĝis al la edzino, ŝi ekrigardis lin kaj haste mangestis ke li tuj foriru!

La virinoj klarigis:

"Inter ni, la samsortaj kiel via edzino, tiu, kiu venis plej frue, restis jam dek jarojn. Ĉi tie loĝas diaĵo, kiu estas tiel fortega, kun povo hommortiga, ke por ĝin rivali ne sufiĉas eĉ cent armitaj soldatoj. Estas feliĉe, ke ĝi ankoraŭ ne revenis, do rapide ĝin evitu for! Tamen, se vi alportos du vazojn da forta vino, dek grasajn hundojn kaj kelkdek ĝinojn da linŝnuroj, ni helpos al vi ĝin atenci. Ĝi revenas ĉiam post tagmezo, do vi alvenu ne tro frue. Ni atendos vin post tagdeko."

Laŭ admono de la virinoj Ouyang He senprokraste forrapidis kaj revenis je la difinita dato kun la forta vino, linŝnuroj kaj hundoj. La virinoj diris:

"La monstro treege ŝatas vinon kaj ofte drinkis ĝis ebrio. Ebriiĝinte ĝi emis pavi sian fortegon tiel, ke ni ĉirkaŭligu ĝiajn membrojn al la lito per silkaĵoj, kiujn ĝi disrompis per ekmoviĝo. Foje ni ĉirkaŭligis ĝin per tri oblaj silkaĵoj, kaj ĝi ne sukcesis liberigi sin. Ĉifoje ni ligos ĝin per silkaĵoj subkaŝitaj per la linŝnuroj, do kredeble ĝi ne povos ilin disrompi. Ĝia tuta korpo estas tiel dura kiel fero, nur unika loko je kelkaj koloroj malsupre de la umbiliko, kiun ĝi ĉiam gardis zorgeme, certe ne povas rezisti armilojn."

Kondukante He-n al apuda kaverno la virinoj diris:

"Jen ĝia konservejo de manĝaĵoj. Embuske atendu ĉi tie kaj viajn vinon ni dislokigu sub la floroj kaj hundojn inter arboj. Kiam sukcesis nia plano, vi elsturnu laŭ nia manvoko!"

He kaŝis sin laŭ la admono de la virinoj kaj atendis tie kun retenataj spiroj.

En posttagmezo, aperis io kiel blanka strio, kiu alpafiĝis fluge de aliaj montpintoj kaj rekte eniĝis en la kaverton, de kie eliris post nelonge blanke vestita belbarbulo pli ol ses futojn alta kun bastono enmane kaj ĉirkaŭita de la virinoj. Ekvidante la hundojn, li ege surpriziĝis, sed tuj sin ĵetis kapti ilin, kiujn li disŝiris kaj satmanĝis suĉe-ŝmace. La virinoj konkure prezentis al li la vinon per jadvokaloj, kokete ridante. Ravite li eldrinkis kelkajn doŭ-ojn da vino kaj estis braktenata de la virinoj en la kaverton, de kie baldaŭ aŭdiĝis gajaj ridoj.

Post sufiĉe longa momento, Ouyang He ĝisatendis la virinan mansignon kaj eksturmis kun preta armilo en la kavernon, kie li vidis gigantan blankan simion kies kvar membroj estis firme ligitaj ĉe la lito. Ekvidante homon, la blanka simio embarasiĝis kaj furioze baraktadis por sin liberigi, sed vane. Ĝiaj okuloj brilis fulme. Konkuraj hakadoj al ĝia korpo kvazaŭ trafis nur feron aŭ ŝtonon, sed la piko al ĝia subventro efikis ĉe la enpiko sango ekŝprucis fonte.

"Ho ve! Jen la Ĉielo, sed ne via kapablo mortigis min!" vekriis la simio, "Nun via edzino jam gravediĝis. Nepre ne mortigu ŝian filon, kiu servos al eminenta imperiestro kaj honorigos la familion." Dirinte tion, la simio mortis. He traserĉis la kavernojn kaj trovis abundajn trezorojn. Kuriozaj frandaĵoj plene kovris tablojn en vazoj kaj kolektiĝis ĉi tie ĉio karega en la homa mondo. Estis trovitaj ankaŭ kelkaj vazoj da famaj parfumaĵoj, paro da antikvaj glavoj kaj tridek virinoj, senescepte belegaj, el kiuj la pli frue alvenigitaj restadis tie jam dek jarojn. Laŭdire, tiuj virinoj, kies beleco reduktiĝis, estis forkondukitaj oni ne scias kien. Sed la geiĝon por sinnutrigo la simio faris nur si mem, sen neniu alia kamarado. Ĉiumatene, ĝi sin lavis, portis al si ĉapon, blankan substofitan robon, kaj senkoloran silkan vestaĵon, sendiference ĉu en frostaj aŭ varmaj tagoj. Sur ĝia tuta korpo ĉie kreskis blankaj haroj je kelkaj coloj longaj. Ĝi ofte legi s lignajn tabuletojn kun ideogramoj similaj al amuletaj signoj, nekompreneblaj por aliaj. Post legado, ĝi metis la tabuletojn sub ŝtona ŝtu paro.

En serena tago la simio ŝatis svingi paron da glavoj kiuj rondflugis ĉirkaŭ ĝia korpo kvazaŭ fulmo kaj brilis kiel la plena luno. Ĝi manĝis neregule, tre ŝatis fruktojn aŭ kaŝtanojn, sed precipe hundojn, kiujn ĝi voris sangosuĉante. Tagmeze ĝi ekmalaperis. Dum tagduono ĝi povis ir-reveni inter distanco de miloj da lioj kaj vespere certe revenis. Tio estis ĝia kutimo. Ĉion, kion ĝi deziras, ĝi povas akiri dum palpebrumo. Nokte ĝi ĝuis voluptvivon.

Dum unu nokto ĝi povis rondviziti al ĉiuj litoj koiti tute sendorme. Ĝi parolis erudicie, belfraze kaj akre, tamen ĝia konduto ĉiam odoris per forta simieco. Kurantjare en la malfrua aŭtuno, kiam komencis fali la folioj de arboj, ĝi subite diris malĝoje:

"Mi estis akuzita de Montdio kaj kondamnita al morto. Mi jam petis protekton de la aliaj genioj kaj eble ricevos pardonon."

En lasta monato, nelonge post la pleniĝo de la luno, fajro ekforbruligis la tabuletojn sub la ŝtona ŝtuparo. La simio diris malespere:

"Mi vivis jam mil jarojn sen filo. Nun, kiam la filo aperos, venas la tempo por mia morto."

Ĝi larmis longe al la virinoj dirante:

"Tiu ĉi monto estas neatingeble kruta por homoj. Desupre mi neniam vidis eĉ hejtaĵkolektiston, kaj malsupre svarmas tigroj, lupoj kaj ferocaj rabbestoj. Atingi ĉi tien oni povas nur laŭ la volo de Dio, ĉu?"

He revenis al sia tendo kun la gemoj, trezoroj kaj la virinoj. Kelkaj el ili ankoraŭ memoris la vojon al sia hejmo. Post unu jaro, al la edzino de Ouyang He naskiĝis filo, vere simila al la vera patro.

Poste, Ouyang He estis ekzekutita de la imperiestro Wudi de Chen-dinastio (557-560 p. K.). Lia intima amiko Jiang Zong tre amis la filon kun elstara saĝeco kaj lin patronis tiel ke li eskapis el la malfeliĉo. Kiam li elkreskis, li efektive fariĝis fama per sia talento en beletro kaj kaligrafio.



**Chen Xuanyou (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# ANIMO DISIĜINTA DE LA KORPO

En la tria jaro de Tianshou-erao (692 p. K.), Zhang Yi de Qinghe funkciis kiel oficisto en Hengzhou kaj tie loĝis. Li estis homo kvieta, kun malmulte da amikoj. Al li naskiĝis ne filo, sed nur du filinoj, el kiuj la pli aĝa mortis jam infanaĝe kaj la pli juna Qianniang elkreskis senkompare ĉarma kaj bonvirta fraŭlino.

Zhang Yi havis nevon Wang Zhou de Taiyuan, kiu montris sin inteligenta kaj bela jam de infanaĝo. Zhang Yi taksis sian nevon tre kara kaj ofte diris: "Mi certe edzinigos Qianniang al li." Poste, ambaŭ elkreskis gefraŭloj kaj profunde amis en sia koro unu la alian, sed tion la gepatroj sciis neniom. Hazarde iu eminenta el la suboficistoj petis de Yi la manon de Qianniang kaj Yi konsentis ties svatigon. Informiĝinte pri tio la fraŭlino ege ĉagreniĝis, ankaŭ Wang Zhou suferis de malkontenta indigno.

Pretekste ke li devas veturi al la ĉefurbo por la ŝtata ekzameno, li petis de Yi forpermeson. Ne povante deteni la nevon, Zhang Yi forsendis lin kun abundaj donacoj.

Kun kaŝita turmento en la koro, Wang Zhou faris adiaŭon kaj sidiĝis en boato. Vespere, la boato veturis sufiĉe malproksimen kaj atingis bordon ĉe monto. Noktmeze, kiam Wang Zhou neniel povis endormiĝi, li aŭdis subite de la bordo trotajn paŝojn kaj iu rapide alproksimiĝis. Ekrigardante, li trovis ke estas Qianniang alkurata kun nudaj piedoj. Zhou estis ravita de la neatendita feliĉo. Premante la manojn de la knabino li demandis kial ŝi alvenis.

"Mi ne povas vin forgesi eĉ en sonĝo!" diris la fraŭlino lamente. "Nun oni devigos min edziniĝi al alia homo kontraŭ mia volo, sed mi kortuŝiĝis de via neŝanĝebla profunda amo al mi, tial mi decidis reciproki vin kaj alkuris spite ĉion for de miaj gepatroj."

Pro la neatendita feliĉo Wang Zhou ekstazis neordinare. Li kaŝis la knabinon en la boaton kaj rapidigis senprokraste. Zhou tagnokte spronis la boaton kaj post kelkaj monatoj li atingis Sichuan-provincon.

En daŭro de kvin jaroj Qianniang naskis du filojn. Ŝi ne korespondis kun siaj gepatroj, sed ĉiam sopiris ilin. Foje, plorante ŝi diris al la edzo:

"Mi venis al vi ĉion spitante. Dum kvin jaroj min informis nenio pri miaj gepatroj. Ĉu restas do loko en la mondo por tiel malĝentila fili no kiel mi?"

"Ne ĉagreniĝu, ni vizitu ilin!" respondis la edzo kortuŝite de ŝia turmentiĝo kaj ili kune veturis al Hengzhou.

Atinginte Hengzhou, Wang Zhou vizitis la domon de Zhang Yi la unua kaj rakontis ĉion okazintan.

"Kia babilo!" mirigite diris Zhang Yi. "Dum tiuj jaroj Qianniang ja restadis ĉiam malsana en ŝia buduaro!"

"Tamen nun ŝi troviĝas en la boato!" persistis Wang Zhou.

Kun pliigita surprizo Zhang Yi sendis serviston al la bordo por konstati. En la boato efektive sidas Qianniang, flora kaj vigla, ŝi demandis al la servisto:

"Kiel fartas miaj gepatroj?"

Ege mirigite la servisto rapidis al Zhang Yi kaj raportis kion li vidis propraokule.

Kiam la malsana fraŭlino kuŝanta en la buduaro informiĝis pri tio, ŝi ellitiĝis, sin ornamis kaj ŝanĝis al si vestaĵojn, ridete, tamen tute senvorte. Ŝi eliris renkonte al la alia Qianniang kaj antaŭ ĉies okuloj la du fraŭlinoj kuniĝis en unu korpon kaj duobliĝis iliaj vestoj unu super la alia. Tiun okazintaĵon la familio de Zhang Yi opiniis ne normala kaj sekve tenis ĝin ĉiam sekreta. Pri tio subsciis nur ne malmulte da parencoj. La geedzoj portis post 40 jaroj kaj iliaj du filoj ambaŭ sukcesis en ŝtataj ekzamenoj kaj funkciis kiel asistanto de guberniestro aŭ kapitano pri publika sekureco. Mi, Xuanyou, multfoje aŭdis tiun historion dum mia junaĝo. Kelkaj rakontis ĝin kun nesamaj detaloj, kiuj iuj aŭskultantoj opiniis ĝin elpensita. Dum la lastaj jaroj de Dali-erao (766-779) mi renkontiĝis kun s-ro Zhang Zhongxian, la guberniestro de Laiwu, kiu detale rakontis al mi tiun historion. Ĉar genealogie Zhang Yi estis onklo de la guberniestro, tial li sciis tre bone tiun koriozan okazintaĵon, kiun nun mi verkis en tiu ĉi rakonto.

**Shen Jiji (c. 750-800)**

# VULPA FEINO REN

Ren, ja estis eksterordinara virino.

Prefekto s-ro Wei havis propran nomon Yin, kiu viciĝis la naŭa inter gefratoj en sia familio. Laŭ patrinflanka geneologio li estis nepo de Li hui, princo de Xin'an. Junaĝe li estis senbride diboĉa kaj drinkema. Zheng, la edzo de lia kuzino, viciĝis la sesa inter siaj gefratoj, kies nomon oni forgesis. Zheng lernis luktarton junaĝe kaj ankaŭ ŝatis drinkadon kaj voluptuon. Sed li estis malriĉa, kaj vivtenata de edzina parenco. Zheng kaj Wei fariĝis intimaj amikoj nedisigeblaj ĉu en ekskurso ĉu en la ĉiutaga vivo.

Somere en la sesa monato de la 9-a jaro (750 p. K.) de Tianbao-erao, Wei Yin, en akompano de Zheng, promenis en la ĉefurbo Chang'an kaj volis iri al la kvartalo Xinchang por drinki. Kiam ili venis suden de la kvartalo Xuanping, Zheng petis portempan forpermeson, pretekstante privatan aferon, kaj ili interkonsentis renkontiĝi poste en la drinkejo. Wei Yin rapidis sur blanka ĉevalo orienten. Zheng rajdis sur azeno suden al la norda pordo de la kvartalo Shengping.

Zheng ekvidis survoje tri knabinojn piedirantajn, inter kiuj estis ĉarm knabino en blankaj vestoj. Zheng miris pri ŝia beleco, vipis sian azenon jen antaŭen jen malantaŭen. Li volis diri flirtemajn vortojn, sed ankoraŭ ne kuraĝis. La blanke vestita knabino okulumis al Zheng de tempo al tempo, kvazaŭ volante akcepti lian amon. Zheng ekparolis al ŝi ŝerce:

"Kial vi, tiel bela knabino, iras piede?"

"Kion fari se ne piediri?" ridetis la knabino, "ĉar vi havante azenon ne servigas ĝin al mi."

"Ho, mia rajdobesto estas tro malbona, tute sentaŭga por servi al belulino." diris Zheng. "Nun mi donas ĝin al vi kaj volonte mem piediros sekvante vin kun granda kontento!"

Li kaj ŝi rigardis unu la alian kaj ambaŭ ridegis. Ankaŭ la du aliaj knabinoj ĵetis al li tentajn okulumojn. Baldaŭ ili fariĝis tre familiaraj. Zheng sekvis la knabinojn orienten.

Kiam ili atingis la ĝardenon Leyou, jam vesperiĝis. Tie staris domo, kun tera muro kaj granda pordo por trapaso de ĉaroj, la konstruaĵoj viciĝis bonorde kaj impone. Antaŭ ol eniri la domon, la blanke vestita knabino sin turnis dirante al Zheng: "Atendu ĉi tie momenton!" kaj mem eniris. Unu el ŝiaj servistinoj restis gardanta ĉe la pordo kaj demandis pri lia nomo kaj vico inter gefratoj. Zheng respondis kaj ankaŭ demandis al ŝi same pri la blankevestita knabino.

La servistino respondis: "Ŝi nomiĝas Ren Shi (Ren Ina) kaj estas la dudeka infano de ŝia familio."

Post momento, oni invitis lin en la domon. Zheng ligis sian azenon ĉe la pordo kaj metis sian ĉapon sur la ŝelon. Eliris por bonvenigo pli-ol-30-jara virino, pliaĝa fratino de Ren Shi.

Oni bruligis kandelojn kaj surtabligis pladojn. La mastrino proponis al li foje refoje drinkojn. Post nelonge Ren Shi eliris alivestite. La knabino kaj Zheng drinkis gaje ĝis profunda nokto. Ambaŭ kundormis en sama lito. Zheng trovis ke ŝiaj beleco, kantado, rideto kaj konduto estas nekompareblaj en la homa mondo.

Antaŭ la tagiĝo Ren diris: "Vi devas foriri. Miaj gefratoj estas membroj de la reĝa konservatorio sub la reĝa gvardio. Ni eliros ĉe la tagiĝo. Vi ne devas resti ĉi tie pli longe." Post interkonsento pri rendezuo Zheng foriris. Kiam Zheng venis al la strata fino, la kvartala pordo ankoraŭ estis fermita. Apud la pordo troviĝis vendejo de bakitaj farunaĵoj de fremdulo, kun lanterno lumanta kaj forno brulanta. Zheng sidiĝis ĉe kurteno por atendi malfermiĝon de la pordo je matena tamburado kaj komencis babili kun la mastro.

Montrante sian tranoktejon, Zheng demandis: "Se vi iras orienten de ĉi tie, vi venos al granda pordo – kies domo ĝi estas?"

"Tie estas nur ruino, nenia loĝdomo." respondis la mastro.

"Sed mi ĵus preterpasis ĝin," insistis Zheng. "Kial vi diras ke nenia loĝdomo troviĝas tie?"

La mastro ekkomprenis. "Ha! Mi scias!" li eksplikis. "Tie vivas vulpa feino. Ŝi ofte logis virojn tranokti. Tion mi vidis trifoje. Ĉu ankaŭ vi renkontis ŝin?"

Hontante konfesi la veron, Zheng ruĝiĝis kaj mensoge respondis: "Ne." Je la tagiĝo li refoje iris al la tranoktejo kaj vidis ke la tera muro kaj la pompa pordo restas kiel antaŭe, sed rigardante internen, Zheng vidis nur forlasitan ĝardenon kun veproj.

Reveninte, Zheng renkontiĝis kun Wei, kiu riproĉis lin, ke li ne iris al la rendezuo. Zheng tenis la sekreton, preteksante ion alian. Tamen, rememorante pri ŝia ĉarmo, Zheng arde deziris ŝin revidi kaj tenis tion ĉiam en sia koro.

Post dekelkaj tagoj, Zheng promenis al la Okcidenta Foiro kaj iris en vestovendejon. Li subite vidis Ren Shi, akompanatan de la antaŭaj servistinoj. Li tuj vokis ŝin. Ŝi haste sin kaŝis en homamaso por lin eviti. Sed Zheng vokis plu kaj postkuris ŝin. Ŝi turnis la dorson al li kaj, ŝirmante sian vizaĝon per ventumilo, diris: "Vi jam konas kiu mi estas, kial ankoraŭ sekvas min?"

"Kio gravas eĉ se mi scias?" demandis Zheng.

"Sed mi hontas montri mian vizaĝon antaŭ vi." ŝi respondis.

"Mi amas vin tiel forte, ĉu vi toleras forlasi min?" Zheng protestis.

"Mi ne kuraĝas forlasi vin, sed nur timas ke vi abomenos min."

Zheng ĵuris al ŝi per sincera tono. Ŝi returnis sin kaj mallevis la ventumilon. Antaŭ li staris rava belulino kiel antaŭe.

"Estas multaj vulpaj feinoj kiel mi," ŝi diris, "vi ja ne konas ilin. Tial ne miru pri tio."

Zheng petis ŝin kune ripeti la malnovan ĝuon. Ŝi diris: "Vulpaj feinoj havas malbonan famon, ĉar ili ofte damaĝas virojn, sed mi ne tiel kondutas. Se vi ne abomenas min, mi volonte servos vin dum mia tuta vivo."

Kiam Zheng konsentis serĉi loĝejon, ŝi sugestis: "Oriente vi trovos domon kun granda arbo. Ĝi sidas en kvieta loko de la urbo. Prefere lui ĝin por nia loĝo! En tiu tago, kiam mi renkontis vin, alia s-ro rajdis sur blanka ĉevalo oriente al la suda parto de la kvartalo Xuanping. Ĉu li ne estas kuzo de via edzino? En lia hejmo estas diversaj mebloj, kiujn vi povas pruntpreni."

Okazis tiel: Onkloj de Wei Yin oficis en diversaj lokoj. Iliaj mebloj estis konservitaj en tri kortoj ĉe li. Laŭ konsilo de Ren, Zheng vizitis al la domo de Wei Yin por pruntpreni meblojn.

Demandite pri la uzo, Zheng diris: "Mi ĵus akiris belan fraŭlinon, jam luprenis loĝdomon kaj volas pruntpreni meblojn por ĉiutaga uzo."

"Belulino, ĉu vere?" Wei ridetis. "Laŭ via aspekto, vi akiras certe monstran virinon!"

Wei pruntdonis al li kurtenojn, liton, litaĵojn, maton kaj aliajn objektojn kaj samtempe sendis saĝan kaj ruzan serviston por subrigardi. Post nelonge la servisto kuris returnen, ŝvitante kaj anhelante.

"Ĉu vi vidis?" renkonte al li Wei demandis. "Kia ŝi aspektis?"

"Mirinde!" respondis la servisto. "Mi neniam vidis tiel belan fraŭlinon!"

Ĉar Wei havis multajn boparencojn, ŝatis ekskurson kaj aktivadon en grupo, li konis multajn belulinojn. Wei citis nomon de unu el tiuj belulinoj kaj demandis al la servisto: "Ĉu ŝi estas tiel bela?"

"Nekompareble!" diris la servisto.

Wei do citis ankoraŭ aliajn kvar aŭ kvin nomojn por kompari ilin kun la belulino de Zheng, sed ĉiam ricevis negativan respondon.

Siatempe la bofratino de Wei, la sesa filino de la princo de Wu, estis senkompare ĉarma kiel feino, kies beleco superis ĉiujn siajn gekuzojn. Wei do demandis: "Ĉu estas komparebla kun ŝi la sesa filino de la princo de Wu?"

Sed la servisto ankoraŭ respondis: "Nekompareble!"

Ege surprizite Wei manklakis dirante: "Ho, ĉu ekzistas tia belulino en la mondo?"

Wei ordonis pretigi akvon, lavis la vizaĝon kaj kolon, portis kaptukon, ŝmiris la lipojn kaj iris al la domo de Zheng. Kiam Wei venis la lokon, okaze Zheng foriris. Wei eniris la domon kaj vidis servoknabon balaanta, servistino ĉe la pordo kaj neniun alian. Wei demandis al la servoknabo pri la belulino, sed tiu nur neis ridetante.

Wei ĉirkaŭrigardis la domon kaj vidis parton de ruĝaj vestoj sub la pordoklapo. Li aliris kaj esploris. Li trovis knabinon kaŝita post la pordoklapo, do elkondukis ŝin al hela loko kaj vidis ŝin multe pli bela ol li aŭdis. Wei ekamis ŝin pasie, prenis ŝin en siajn brakojn kaj intencis perforti.

Sed ŝi rezistis. Wei forte premis ŝin. En kriza momento, ŝi petis: "Mi obeos vin, sed lasu min retrovi mian spiron."

Kiam Wei ne uzis la forton, ŝi rezistis denove. Tio ripetiĝis plurajn fojojn. Wei kaptis ŝin per tuta fortp kaj alpremis ŝin al si krude. Ŝi senfortiĝis, ŝvitis pluve. Pensante ke ŝi ne povos eskapi la perforton, ŝi forlasis la reziston, sed draste paliĝis.

"Kial vi tiel malĝojas?" Wei demandis.

Kun longa veo ŝi respondis: "Ho ve, vere kompatinda estas Zheng la sesa!"

"Kion signifas via diro?" Wei demandis.

"Kun forta korpo de pli ol ses futoj Zheng tamen ne povas protekti sian virinon – ĉu li ankoraŭ rajtas nomi sin viro? Vi estas juna kaj riĉa, posedas plurajn belulinojn kaj vidis multajn knabinojn kiel mi. Sed Zheng, malriĉa kaj humila, havas nur min kiel solan amatinon. Kun abundo ĉu vi volas prirabi aliulon en mizero? Zheng estas malriĉa, ne povas vivi memstare. Li akiris vestojn kaj manĝaĵojn de vi, sekve ĉiam estas sub vi. Se li povus vivteni sin ne tiel mizere, li ne falus en la nunan staton." Wei estis kvalira kaj justama. Aŭdinte la vortojn, li tuj lasis ŝin. Li reordigis sian baskon kaj respektoplene petis ŝian pardonon: "Mi ne kuraĝos."

Post nelonge, Zheng revenis. La du viroj babilis gaje. De tiam Wei liveris al Ren ĉiujn vivbezonaĵojn. Ren ofte vizitis al Wei, kaj eliris kun li jen per kaleŝo, jen per ĉevalo, jen per palankeno aŭ simple piedire. Wei pasigis preskaŭ ĉiun tagon kun ŝi, sentante grandan ĝojon. Ili fariĝis tre intimaj geamikoj kaj ŝi donis al li ĉion escepte de amoro. Pro tio Wei pli amis kaj respektis ŝin, avaris al ŝi nenion kaj ne forgesis ŝin ĉu en drinkado ĉu en manĝado. Konante lian amon, foje Ren diris al Wei: "Mi hontas akcepti vian tro multan favoron, sed mi, sentaŭga, neniel povas rekompenci vian grandan komplezon, kaj, mi ankaŭ ne devas perfidi Zheng, tial mi ne povas kontentigi ĉiujn viajn dezirojn. Mi naskiĝis en Shaanxi kaj kreskis en la ĉefurbo.



Miaj familianoj estas aktoroj. Multaj el miaj kuzinoj estas kromedzinoj de altranguloj kaj riĉuloj. Pro tio mi bone konas la bordelojn kaj similajn domojn en la ĉefurbo Chang'an. Se vi ŝtas, sed ne sukcesis akiri belulinon, mi povas helpi vin kaj per tio iom rekompencos vian favoron."

"Bonege!" kun ĝojo Wei akceptis ŝian proponon.

Vestovendistino nomata Zhang la Dekkvina en la foiro havis kreme glatan haŭton kaj tre plaĉis al Wei. Li demandis al Ren, ĉu ŝi konas la vendistinon.

"Ŝi estas mia kuzino." respondis Ren. "Mi povos facile kontentigi vin."

Post ĉirkaŭ dek tagoj ŝi kondukis la knabinon al Wei. Post kelkaj monatoj, Wei enuis. Ren diris: "Knabinoj en foiro estas facile akireblaj. Mi ne povas elvolvi mian kapablon de servo. Prove menciuj aliajn ĉarmajn knabinojn malfacile akireblajn, mi volonte faros por vi plej grandan klopodon."

"En la Tago de Malvarma Manĝado antaŭ tagoj," diris Wei. "Mi ekskursis kun kelkaj amikoj al la Templo de Mil Feliĉoj kaj vidis orkestron aranĝitan de generalo Diao Mian en la halo. Tie troviĝis lerta ludanto de ŝeng-o (blovinstrumento), knabino en la aĝo de ĉ. 16 jaroj kun du bukloj ĉe la oreloj. Ŝi havas ravan aspekton – vere amindan! Ĉu vi konas ŝin?"

"Ŝi estas favoratino de la generalo." Ren respondis. "Ŝia patrino estas mia kuzino. Mi provu."

Wei danke riverencis al ŝi. Ŝi promesis doni helpon. Ren do frekventis al la domo de la generalo Diao. Pasis pli ol unu monato. Wei urĝe demandis ŝin pri la afero. Ŝi postulis de li du rulojn da silkaĵoj por subaĉeto. Wei donis tion. Post du tagoj, dum Ren kaj Wei estis en kunmanĝado, la generalo sendis sian intendanton kun nigra ĉevalo inviti Ren al lia domo. Informiĝinte pri la alvoko, Ren diris al Wei ridetante: "Sukcesis mia plano!"

Okazis tiel: Ren unue malsanigis la knabinon, al kiu nenia kuracilo helpis. En granda ĉagreno la patrino de la knabino kaj la generalo intencis peti konsilon de sorĉistino. Sed Ren anticipe subaĉetis la sorĉistinon kaj postulis ke ŝi tiu sugestu ke la loĝloko de Ren estas taŭga por forigi la malfeliĉon.

Kiam la sorĉistino estis alvokita por kuraci la malsanan knabinon, ŝi diris laŭ plano de Ren al la generalo: "La knabino ne devas plu resti en sia hejmo, sed transloĝiĝi al domo sudoriente por ricevi vivigan medion."

La generalo kaj la patrino de la knabino esploris la sugestitan lokon kaj trovis, ke tie estis la loĝejo de Ren. La generalo do petis ŝian konsenton akcepti la knabinon en la hejmo. Ren afekte rifuzis, preteksante malvastecon de sia loĝejo. La generalo insiste petegis, nur tiam Ren konsentis. La generalo do veturigis la knabinon per kaleŝo al la domo de Ren, akompanatan de

ŝia patrino kun vivbezonaĵoj. Atinginte la loĝejon de Ren, la knabino tuj resaniĝis. Post kelkaj tagoj, Ren sekrete kondukis Wei enveni al ŝi. Post unu monato, la knabino gravediĝis. Tiam ŝia patrino ektimis kaj rapide revinigis la knabinon al la generalo Diao.

Tiel finiĝis la afero.

Iun tagon, Ren demandis al Zheng: "Ĉu vi povos pruntepreni kvin aŭ ses mil monerojn? Mi profitigos vin."

"Jes." Zheng respondis kaj eliris pruntepreni ses mil monerojn.

Ren diris al li: "Iru al la foiro. Se vi vidos ke oni vendas ĉevalon kun cikatro sur la postaĵo, aĉetu ĝin!"

Laŭ ŝia instruo Zheng iris al la foiro kaj vere vidis iun kondukanta ĉevalon por vendi. Sur ĝia maldekstra postvango vidiĝis cikatro. Zheng aĉetis la ĉevalon kaj kondukis ĝin hejmen. Liaj bofratoj ĉiuj mokis lin: "Ĝi estas forĵetita bruto. Por kio vi aĉetis ĝin?"

Poste, Ren diris al Zheng: "Estas tempo por vendi la ĉevalon. Pri ĝia prezo vi postulu 30 mil monerojn!"

Zheng do kondukis la ĉevalon al la foiro por vendi. Iu proponis 20 mil monerojn. Zheng ne konsentis vendi.

Ĉiuj homoj en la foiro miris: "Kial unu volontas pagi tiel altan prezon sed la alia ankoraŭ rifuzas?"

Zheng rajdis sur la ĉevalo hejmen reveni. Ankaŭ la kliento sekvis lin ĝis lia pordo kaj iom post iom levis la prezon al 25 mil moneroj. Zheng ne konsentis, dirante: "Mi insistas je la prezo de 30 mil moneroj."

Liaj bofratoj kolektiĝis kaj insultis lin. Vole-nevole Zheng devigite vendis la ĉevalon kontraŭ apenaŭ 30 mil moneroj. Poste, Zheng kaŝe sekvis la aĉetanton por informiĝi, kial li aĉetis tiel altpreze. Zheng trovis, ke la viro estis ĉevalisto de Zhaoying-gubernio, kie unu imperiestra ĉevalo sub lia bredo kun nigra makulo sur la postaĵo mortis jam tri jarojn. Li devis baldaŭ eksiĝi antaŭ plenumo de sia mandato kaj pagi 60 mil monerojn por la mortinta ĉevalo. Se li aĉetis la ĉevalon kontraŭ 30 mil moneroj, li jam povis ŝpari multe. Krome, se li havas la ĉevalon kiel anstataŭanton de la mortinta, li gajnos la pagon pro la trijara furaĝo, tiel li kompensos nur tre malmulte, tial li insistis en la aĉeto.

Foje Ren petis de Wei vestojn pro eluziĝo de siaj malnovaj vestoj. Wei intencis aĉeti por ŝi rulon da silkaĵo, sed Ren rifuzis, dirante: "Mi volas konfekciajn vestojn." Wei alvokis komerciston Zhang Da, donis al li la taskon kaj ordonis, ke li intervidiĝu kun Ren kaj demandu

ŝin, kiajn vestojn ŝi ŝatas.

Vidinte Ren, Zhang Da miregis kaj poste diris al Wei: "Ŝi estas feine bela, tre eble el nobela familio, sed nun ŝtelakirita de via moŝto. En la homa mondo ne devas esti tia belulino. Tuj revenigu ŝin, ke ŝi ne okazigu plagon al vi!" Ŝia beleco eĉ atingis tian gradon.

Tamen, oni ne povas kompreni, kial ŝi insiste petis konfekciajn vestojn, sed ne volas mem kudri ilin. Unu jaron poste, Zheng estis nomumita kapitano de Huaili-prefektujo en Jincheng. Tiam Zheng havis edzinon. Tage li ekskursis kun sia amatino, sed nokte li devis reveni hejmen, tial li ofte bedaŭris, ke li ne povis ĉiam kun Ren tranokti. Antaŭ ol iri al la ofico, Zheng petis Ren akompani, sed ŝi rifuzis. "Kunvojaĝo dum tagdeko aŭ monato ne taŭgas por nia sufiĉa ĝuo." Ren diris. "Estas pli bone, ke vi donu al mi vivbezonaĵojn laŭ tagoj de via foriro, kaj lasu min trankvile atendi hejme ĝis via reveno."

Zheng refoje petegis, sed Ren estis pli firmvola. Tiam Zheng devis peti monhelpon de Wei. Ankaŭ Wei alvenis persvadi ŝin kaj demandis ŝin pri la kaŭzo. Post longa hezito Ren respondis: "Sorĉisto avertis al mi, ke ĉijare mi renkontos malfeliĉon en vojaĝo al la okcidento, tial mi ne volas iri tien."

Sed Zheng estis en arda deziro pri ŝia kunvojaĝo kaj tute ne pensis pri io alia. Ambaŭ viroj ridegis, dirante: "Tiel saĝa knabino eĉ kredas la superstiĉan vorton de sorĉisto, strange!" Ili insiste petis ŝin kune vojaĝi. "Se la sorĉista diro fariĝos vera," diris Ren, "kaj mi mortos pro la kunvojaĝo, ĉu vi bedaŭros?" "Sensencaĵo!" la du viroj ankoraŭ persistis en sia peto, fine Ren vole-nevole konsentis.

Wei pruntedonis al ŝi ĉevalon, aranĝis al ili adiaŭan festenon ĉe Lingao, kaj disiĝis mansvinge salutante. Post du tagoj ili atingis Mawei. Ren rajdis surĉevale antaŭe, Zheng rajdis surazene malantaŭe kaj ili sekvis rajdantaj servistinoj.

Tiam ĉevalbredistoj ekster la Okcidenta Pordego trejnigis ĉashundoj en Luochuan jam dek tagoj. Kiam Ren preterpasis la lokon, hundoj elsaltis el veprejo. Zheng vidis ŝin ekfali surteren. Ŝi aperis tuj en sia propra formo de vulpo kaj rapidegis suden. Ŝin persekutis la hundoj. Zheng plenforte postkuris, kriante al la hundoj sed ne sukcesis haltigi ilin. Kurinte ĉ. unu lion, ŝi estis mortigita de la hundoj.

Kun larmoj en la okuloj Zheng elpoŝigis monon, aĉetis ŝian kadavron, enterigis ŝin kaj starigis lignan stangon ĉe ŝia tombo por signi la lokon. Retrorigardante, Zheng vidis ŝian ĉevalon maĉanta herbojn apud la vojo. Ŝiaj vestoj kuŝis sur la selo. Ŝiaj ŝuoj kaj ŝtrumpoj ankoraŭ pendis en la piedingoj, kvazaŭ ili estus ŝelo de cikado. Nur la ornamaj juveloj disfalis teren, malaperis ŝiaj aliaj posedaĵoj. Malaperis ankaŭ ŝiaj servistinoj.

Post dekelkaj tagoj, Zheng revenis al la ĉefurbo. Vidinte lin, Wei ĝoje demandis: "Ĉu Ren fartas bone?"

Kun larmoj Zheng respondis: "Ŝi mortis."

Aŭdinte tion, ankaŭ Wei falis en grandan malĝojon. Ili ploregis, brakumante unu la alian en ĉambro. Poste Wei demandis, kia subita malsano forrabis ŝian vivon.

"Ŝi estis mortigita de hundoj!" respondis Zheng.

"Kvankam hundoj estas ferocaj, tamen kiel ili povus mortigi homon?"

"Ŝi ne estis homo." respondis Zheng.

Ege surprizite, Wei demandis: "Se ne, kio do ŝi estis?" Zheng rakontis al li la tutan historion. Wei tre miris kaj senĉese suspiris.

En la sekvanta tago, ili kune veturis per kaleŝo al Mawei, malfermis la tombon, rigardis la kadavron kaj revenis post longa funebro. Ili rememoris pri la pasintaĵoj kaj rimarkis ke ĉiuj ŝiaj kondutoj estis samaj kiel tiuj de homo; escepte nur de tio, ke ŝi ne faris vestojn per si mem.

Poste Zheng fariĝis inspektoro de ŝtataj salbasenoj, imperiestraj palacoj kaj paŝtado de brutoj. Li vivis tre riĉe, kun dekelkaj ĉevaloj en stalo de sia hejmo. Li mortis en la aĝo de 65 jaroj.

En Dali-erao (766-779 p. K.), mi loĝis en Zhongling kaj ofte ekskursis kun Wei Yin. Ni plurfoje interparolis pri la afero, tial mi bone konis tion.

Poste Wei fariĝis ĉefurba inspektoro de la kortego kaj samtempe prefekto de Longzhou. Fine li mortis sur sia posteno en la nordokcidento senrevene.

Ho! Ankaŭ en la konduto de la besto sentiĝis homa naturo! Rigardu al tiu de la vulpa feino Ren, kiel ŝi batalis kontraŭ perforto por gardi sian ĉastecon kaj eĉ oferis sian vivon por la amato. Eĉ inter la nunaj virinoj troviĝas tiuj kiuj kondute malpli indas ol ŝi! Bedaŭrinde Zheng ne estis inteligenta homo. Li ŝatis nur ŝian belecon, sed ne esploris ŝian naturon. Se li estus pli prudenta, li certe konus la leĝon de ŝanĝiĝo, sondus la forton de la supernatura estaĵo kaj per lerta plumo prezentus la esencon de la mistero, anstataŭ nur amuziĝi kun ŝi je amorĝuo! Tio estas ja vere granda bedaŭro!

En la dua jaro (781 p. K.) de Jianzhong-erao, oni ekzilis al sudorientaj provincoj min, kiu oficis kiel Maldekstra Admonisto, Gvardian Generalon Pei Ji, Ĉefurban Vicestron Sun Cheng, buroestron de la Ministerio de Financaj kaj Civilaj Aferoj Cui Xu kaj Dekstran Admoniston Lu Chun. De Shaanxi al Suzhou ni veturis kune per ter- kaj akv-vojoj. Al nia grupo aliĝis ankaŭ la eksa admonisto Zhu Fang, kiu vojaĝis por turismo. Ni veturis per du ŝipoj laŭ la riveroj Yingshui kaj Huaishui, tage bankedis kaj nokte babilis pri diversaj strangaĵoj. Tiuj sinjoroj estis profunde kortuŝitaj kaj forte mirigitaj de mia rakonto pri Ren. Ili petis min registri la

strangaĵon. Tial mi, Shen Jiji, verkis la rakonton.

**Shen Jiji (c. 750-800)**

# LA MAGIA KAPKUSENO aŭ SONGŔO EN HANDAN

En la sepa jaro de Kaiyuan-erao (719 p. K.) estis taoisto Lü (Lju), kiu akiris la senmortan arton de feo. Dum sia vojaĝo al Handan li ripozis en malgranda hotelo. Demetinte ĉapon kaj malzoninte rubandojn, li sidis sin apogante al pakaĵo. Tiam venis juna homo Lu, vestita en kruda talivesto, rajdante sur nigra ĉevalo al kamparo, ankaŭ ripozis en la hotelo. Li sidiĝis sur la sama mato kun la taoisto kaj ili ĝoje interbabilis longan tempon. Poste, rigardante al sia ĉifona kaj nepura vestaĵo, Lu ekĝemis vekriante: "Ho, kiel malfeliĉa estas mi, la sortfuŝato!"

"Rigardu vin mem – nun sana, sendolora, kaj ĵus en babilado gaja, kial subite ĝemas pri malfeliĉo?" diris la taoisto.

"Ba, mi nur vegetas! Ĉu tia vegetado ankaŭ indas nomiĝi vivo?" plendis Lu.

"Se tia ne, do kia jes?" demandis la taoisto.

"Por viro, miaopinie," respondis Lu, "la vivo devas esti kun jenaj enhavoj: Krei meritojn, ĝui famon, funkcii kiel generalo aŭ ministro, frandi laŭ nobela stilo, aŭskulti al si plaĉajn muzikojn, fari sian familion kaj klanon prospera kaj riĉa. Nur kompletan da tio mi nomas inda vivo! Iam, mi ankaŭ diligente studis kaj rezultiĝis erudito rigardante ne tro malfacila sukceson en ŝtata ekzameno. Sed ĝis nun, en matura aĝo, mi ankoraŭ devas okupi min per terkulturo, ĉu mi vivas ne tro malfeliĉa?"

Findirinte, li eksentis sin laca kun pezaj palpebroj kaj volis iom dormi. tiam la mastro de hotelo ĝuste estis kuiranta miliojn. La taoisto prenis el sia pakaĵo kapkusenon, transdonis ĝin al Lu kaj diris: "Dormu kun mia kapkuseno kaj realiĝos viaj revoj pri honora kaj feliĉa vivo!"

La kapkuseno estis el blua porcelano, kun aperturoj ĉe ambaŭ ekstretoj. Kiam Lu klinis sin al ĝi, li trovis ke la aperturoj iom post iom pli grandiĝis kaj heliĝis. Lu stariĝis, eniris tra la aperturo kaj – jam venis al sia hejmo. Post monatoj, Lu edzinigis al si tre belan fraŭlinon el nobla Cui-familio de Qinghe, kun pli abunda riĉaĵo. Lu ekstazis. De tiam liaj vestoj kaj veturiloj ŝanĝiĝis pli kaj pli luksaj. La sekvantan jaron, Lu estis rekomendita kiel kvalifikita kandidato por la metropola ekzameno kaj, sukcese trapasinte la nomitan ekzamenon li estis la unuan fojon nomumita kiel ŝtatoficisto en la kortega sekretariato. Poste, li partoprenis ankaŭ en la speciala kortega ekzameno kaj estis promociita al kapitano de Weinan. Post nelonge, transpostenigita al inspektoro, imperiestra kronikisto, kaj pli poste, sekretario por preparo de imperiestra ediktoj.

Tiel forpasis tri jaroj. Li funkciis sinsekve kiel prefekto de Tongzhou kaj provincestro de Shaanhou. Kun ambicio je akvoutiligo, Lu konstruigis ekde Shaanxi kanalon je 80 lioj longan, kiu alportis grandan favoron al la loĝantoj kaj la lokanoj starigis ŝtonan monumenton honore je lia merito. Tiam li estis transpostenigita kiel provincestro de Bianzhou, samtempe kontrolisto

super Henan-kantono, kaj fine kiel estro de la ĉefurbo.

Tiun jaron, la imperiestro lanĉis militon kontraŭ la sovaĝaj nomadoj Rong kaj Di por pliampleksigi teritorion. Profitante la ŝancon, la militestroj Simolo de Turfan kaj Mangbuĝi de Zhulong faligis fortresurbojn Guazhou kaj Shazhou, mortigis la armeestron Wang Junhuang, kio sensacie skuis la imperion. La imperiestro ekmemoris pri la komanda talento de Lu kaj komisiis lin ĉefinspektoro kaj armeestro de Hexi-kantono. En decidiga batalo Lu gajnis brilan venkon, falĉinte sep mil kapojn de malamikoj, kaj militakiris naŭcent liojn da teritorio. Li konstruigis tri grandajn muregojn por gardi la limojn. Kaj la lokaj popoloj starigis monumenton sur Juyan-monto por laŭdi lian meriton. Lu revenis al la Kortego por ricevi lordtitolon en soleno ekstreme impona. De posteno de la vicministro de Ministerio pri Mandarenaj Aferoj li promociiĝis al tiu de la ministro de Civilaj Aferoj kaj estro de la Imperia Centra Inspektejo. Lu ĝuis grandan reputacion kaj bonan famon tiel en Kortego kiel inter popoloj, sed lin enviis la tiam funkcianta premiero, kiu do disvastigis fifamojn por kalumnii Lu, tiel ke Lu estis malpromociita kiel prefekto de Duanzhou. Post tri jaroj li tamen estis revokita al la kortego kaj komisiita kiel imperiestra konsilanto. Post nelonge, Lu fariĝis premiero en la Imperia Konsilio kaj dum pli ol dek jaroj administris la ŝtatajn aferojn kune kun la maldekstra kaj dekstra ĉefministroj Xiao Song kaj Pei Guangting. Okazis eĉ, ke dum unu tago li ricevis trifoje de la imperiestro konfidencajn dekretojn, kaj li ĉiam asistis la imperiestron per prudentaj konsiloj. Konsekvence li ĝuis la famon kiel saĝa premiero. Sed la ceteraj korteganoj pro envio lin insidis, denuncante ke li kovis uzurp-intrigon en koluzio kun militaristoj limgarnizonantaj. Tial la imperiestro severe ordonis ke Lu estu enkarcerigita por speciala juĝado. Kiam la kapitano kun gvardistoj urĝe venis al lia domo por lin aresti. Lu en granda konsterniĝo diris al siaj edzino kaj filoj:

"En nia hejmloko oriente de Huashan-monto, ni ja havis kvincent mu-ojn da fekunda agraro, kiuj sufiĉis por nin bone vivteni kaj for de malsato, kaj for de malvarmo, por kio do mi ankoraŭ penis ĉasi la honoron? Nun, falinte en ĉi tian malfeliĉon, mi eĉ ne povas reakiri la malnovan vivon ke mi vestita en kruda talivesto, rajdante sur nigra ĉevalo, senĝene vojaĝis sur vojo de Handan. Ho ve!"

Lu ekprenis spadon por sinmortigo, sed lia edzino malhelpis lin fari tion. Ĉiuj implikitoj de la kazo estis ekzekutitaj, escepte nur de Lu savita dank' al protekto de iu eŭnuko. Anstataŭe li estis ekzilita al Huanzhou.

Post kelkaj jaroj, la imperiestro konsciis ke Lu estis maljuste verdiktita, li redonis al Lu, la malkondamnito, postenon de premiero kaj honoran rango de Yanguo-duko kun multe da neordinaraj favoroj.

Al Lu naskiĝis kvin filoj, nome: Jian, Chuan, Wei, Ti kaj Yi, ĉiuj talentaj. El ili la plej aĝa, Jian, sukcese trapasis la metropolan ekzamenon kaj estis nomumita kiel vicburoestro de la Ministerio pri Mandarenaj Aferoj. La dua, Chuan, funkciis kiel prokuroro. La tri, Wei, kiel respondeculo de la Imperia Kapelo. La kvara, Ti, kiel kapitano de Wannian, kaj Yi, la plej



distingiĝa, fariĝis la maldekstra konsilanto jam en sia 28-a jaraĝo. Ili edzinigis al si fraŭlinojn senescepte el la plej famaj kaj noblaj familioj. Nepoj nombriĝis pli ol dek.

Lu travivis multon: dufoje ekzilojn al malproksimaj sovaĝejoj; eksteratenditan revenon al Kortego; malsamajn vivojn jen en la metropolo, jen en la limregionoj; honorajn funkciojn de inspektoro kaj premiero; kun altrangula impono dum pli ol 50 jaroj. Lu ankaŭ estis disipema kaj ĝuema homo. Ĉiuj kantistinoj kaj dancistinoj en lia domo senescepte estis la plej belaj tra la lando. Al li premidonaciĝis sennombre da fekundaj bienoj, imponaj domegoj, belaj knabinoj kaj famaj ĉevaloj. En sia oldaĝo Lu iom post iom fariĝis malforta. Plurfoje li petis forpermeson por emeritiĝo, sed ĉiufoje la imperiestro malkonsentis.

Fine, li malsaniĝis. Tiam la senditoj de la imperiestro vizitadis lian hejmon unu post aliaj seninterrompe por informi pri lia sanstato, kaj lin kuracis la plej eminentaj doktoroj kaj la plej bonaj medikamentoj, sed vane. Sentante la alproksimiĝon de sia morto, Lu sendis al la imperiestro skribajon:

"Mi estis banala instruitulo en Shandong, origine sin okupis per terkulturado. Hazarda fortuna vicigis min inter viaj korteganoj kaj vi favoris min per tro multe da promocioj, ke mi funkciis sinsekve kiel arneestro kaj premiero dum multaj jaroj. Mi bone konsciis ke mi vere ne indas tion! Tiel, kun ĉiama maltrankvilo en koro, mi eĉ ne rimarkis la alvenon de mia maljuneco. Nun, mi aĝas jam pli ol 80 jarojn, travivinte la honoron de premiero. Mankas al mi jam tempo kaj kadukiĝas al mi kaj korpo kaj energio. En mia lastaj horoj mi havas nenion por rekompenci vian grandan favoron. Adiaŭante al via sankta epoko mi vere sentas senfinan sopiron kaj per tio ĉi esperimas mian profundan dankon."

En la imperia edikto la imperiestro respondis:

"Dank' al via bonvirto vi fariĝis mia ĉefministro. Vi funkciis landlime kiel brava ĉefgeneralo kaj kortege kiel saĝa ĉefkonsilano. Dank' al via bona servo en nia imperio regis prospero kaj paco dum du dekduoj da jaroj. Mi ja esperis ke tagon post tago vi resaniĝos, sed ne atendis ke la grava malsano tiel senkompate turmentas vin. Nun mi sendas la Grandan Piaoĵi-generalon Gao Lishi por pridemandi vian faron. Do, prenu kuracon kaj zorgu vian sanon por mi, kiu ankoraŭ forte esperas ke vi povus resaniĝi eĉ sen helpo de medicinaĵoj."

En tiu nokto Lu mortis.

...sin etendante, la juna Lu vekiĝis el la sonĝo. Tiam li vidis ke li mem ankoraŭ kuŝis en la sama hotelo, kun la sama taoisto ankoraŭ sidanta apude, kaj en kaldrono de la hotelmastro la milioj eĉ ankoraŭ ne elkuiriĝis, resume, ĉio restis ankoraŭ la sama kiel antaŭ lia sonĝo. Lu ekstaris kaj demandis kun miro:

"Ĉu ĉio ĉi tio estas nur sonĝo?"

"Jes, kaj same ankaŭ tio, kion vi nomas inda vivo." respondis la taoisto.

Lu dronis en meditado longan tempon. Poste, li diris kun danko al la taoisto:

"Ho, finfine mi komprenas pri la deveno de honoro kaj malhonoro, la ŝanco de fortuna kaj malfeliĉo, la leĝo de akiro kaj perdo, la sekreto de vivo kaj morto. Jen vi, mia instruisto, per tio forigis de mi avidojn pri vantaĵoj. Mi nepre ne forgesu vian instruon!"

Lu profunde riverencis refoje kaj foriris.

**Xu Yaozuo (aũtoro en Tang-dinastio)**

# SINJORINO SALIKO

Dum Tianbao-erao (742-756), Tang-dinastio, Han Yi de Changli ĝuis famon de elstara poeto. Senbridema kaj senzorgema, Han vivis tre malriĉa kiel migranto en fremda loko.

Instruitulo Li, intima amiko de Han, estis riĉa kaj kavalira sro, tre estimanta al talentuloj. S-ro Li havis favoratinon, nomatan Saliko, kies beleco estis senkompara siatempe. La virino estis babilema kaj ŝercema, tre lertis en kantado kaj versado. S-ro Li loĝigis ŝin en aparta domo, kie li ofte drinkis kaj versis kun Han Yi. Dume, li gastloĝigis Han en najbara ĉambro. Ĉar Han Yi ĝuis grandan famon, tial tiuj, kiuj vizitis al li, ĉiuj estis siatempe elstaraj famuloj. Tra pordfendo s-ino Saliko vidis tion kaj diris al siaj servistinoj: "Ĉu s-ro Han restos malriĉa por ĉiam?" Kaj ŝi ekhavis korinklinon al Han.

S-ro Li ĉiam tre respektis Han Yi, kaj avaris nenion por li. Sciiĝinte pri la korinklinon de Saliko, s-ro Li invitis Han al festena kundrinko, kaj, dum la rava drinko, s-ro Li ekparolis: "S-ino Saliko estas senkompara belulino, dum s-ro Han – distingita beletro-majstro. Nun mi volas parigi s-inon Saliko al s-ro Han. Kiel vi opinias?"

Ĝistreme timigite, Han Yi ekstariĝis for de sia sidloko kaj diris: "Ho, jam delonge mi multe ŝuldis al via granda favoro disponigi al mi viajn manĝon kaj favoron, kiel mi aŭdacus akcepti vian favoratinon?"

Sed s-ro Li insistis pri sia propono.

Bone konsciante pri lia sincero, s-ino Saliko faris du riverencojn al li, kaj, iom ordiginte al si la vestaĵojn, ŝi alsidiĝis apud s-ron Han.

S-ro Li invitis Han sidiĝi al la loko de honorinda gasto ke ili ĉiuj kune daŭrigu la ravan drinkadon.

S-ro Li ankaŭ donacis al Han 300 milojn da moneroj por vivtenado. Tiel, s-ro Han ĝuis la belecon de Saliko dum ŝi admiris la talenton de la s-ro. Ambaŭ vivis en granda harmonio, kies ĝojego ja estis facile imagebla.

La sekvantan jaron, en la imperia ekzameno prezidata de la vicministro Yang Du, Han Yi gajnis la lokon inter la superaj sukcesintoj, sed, poste, dum pli ol unu jaro li nur loĝis ermite. Foje, s-ino Saliko diris al Han: "Famo kaj honorigo al siaj familianoj ja estas tio, por kio multaj homoj ĉiam strebis. Kiel do indas ke vi damaĝus vian karieradon nur pro unu nenobla virino? Krome, la provizo ĉi tie ja estas sufiĉe abunda por ke mi ĝisatendu vian revenon." Konvinkite de la konsilo, Han Yi do veturis al sia hejmloko Qingchi.

Post pli ol unu jaro, tamen iom post iom elĉerpiĝis mono de s-ino Saliko, kaj ŝi komencis forvendi siajn kapornamaĵojn k.s. por vivteni sin.

En la fino de Tianbao-erao, la du ĉefurboj estis okupitaj de la ribelantaj trupoj. Popolanoj, ĉu viraj aŭ virinaj, panike disfuĝis. Konsciente pri sia distingita beleco, kaj por eviti ion malfeliĉan, s-ino Saliko detondis al si harojn kaj, alivestiginte sin, rifuĝe loĝis en Faling-templo.

Siatempe, Hou Xiyi, armeestro de Pinglu, translokiĝis al sia nova garnizonejo Ziqing. Ĉar Hou jam delonge informiĝis kun admiro pri la fama talento de Han Yi en verkado, Hou invitis ke Han Yi funkciu kiel lia ĉefsekretario.

Post kiam la imperiestro Suzong restaŭris la reĝimon de Tang-dinastio per sia saĝa heroeco, subiginte la ribelon, Han Yi sendis kaŝe serĉi s-inon Saliko en la ĉefurbo Chang'an, kaj, pere de la sendito, li donacis al ŝi sablan oron en blanka silka saketo, kun surskribo de versoj:

*Ho, saliko en ĉefurbo!*

*Ho, saliko en ĉefurbo!*

*Kia restas via verdo?*

*Ĉu senŝanĝe? Ĉu en perdo*

*pro alies pluk-uzurpo?*

*Min turmentas tiu certo!*

Manprenante la donacitan oron, s-ino Saliko ekplorĝemis. Ankaŭ la ĉirkaŭantoj ĉiuj ĉagreniĝis kompatante al ŝi. Kaj ŝi respondis verse:

*Ve! saliko ĉiujara –*

*serv' nur al disiĝ' amara!*

*Nun, aŭtuna vent' ekblovas,*

*jen folia fal' denovas.*

*Eĉ se vi revenas, kara,*

*Kion vi ankoraŭ trovas?*

Post nelonge, ju tibeta generalo, nomata Shazhali, faris meritojn en milito. Informiĝinte pri beleco de Saliko, Shazhali rabprenis ŝin al sia domo kaj ŝutis al ŝi multe da favoroj. Poste, Hou Xiyi transoficiĝis al la ofico de la maldekstra premiero kaj vojaĝis al la ĉefurbo por ricevi aŭdiencon de imperiestro, nur tiam Han Yi havis la ŝancon sekvante lin veturi. Kiam

Han Yi venis al la ĉefurbo, li jam ne povis trovi spuron de s-ino Salio kaj multe veis kun ardaĵaj sopiroj.

Iufoje, ĉe la Dekkapa Monteĝo, Han Yi hazarde vidis ke maljuna servisto veturis kurtenitan ĉaron, kiun tiris bovo kaj postsekvis du servistinoj. Dum Han Yi senintence sekvis irante post la ĉaro, iu demandis depost la ŝirmita kupeo: "Ĉu vi estas s-ro Han Yi? Mi ja estas Saliko!"

Kaj, pere de sia servistino, Saliko transsciigis al Han, kiel ŝi estis forkaptita de Shazhali, kaj, pro ĉeesto de kunvojaĝanto, nun ŝi ne havas ŝancon interparoli kun li. Ŝi petis ke Han nepre atendu ŝin la sekvantan matenon ĉe la pordo de la kvartalo Daozhengli.

Han Yi venis laŭ la rendevuo en la difinita tempo, kaj s-ino Saliko el ĉaro transĵetis al li negrandan jadkeston kun pomado, pakitan per maldika silkaĵo, dirante: "Prenu tion kiel eternan memoraĵon! Nun adiaŭ! Por ĉiam!"

Kaj ekveturis returnen ŝia ĉaro, el kiu ŝi senĉese mansvingis. Ŝia maniko leĝere flirtis dum la aroma ĉaro triste knaris. Starante tie, Han Yi konfuzite rigardis al la ĉaro, kiu forveturis pli kaj pli malproksimen, ĝis fine malaperis el lia vidkampo droninte en la leviĝanta polvo, kio faris Han Yi tre sentimentala kun senfinaj sopiroj.

Tiun tagon, okaze multe da oficiroj el Ziqing aranĝis bankedon en restoracio kaj Han Yi ankaŭricevis la inviton. Malgraŭ sia moroza humoro Han Yi ĉeestis la bankedon, sed li aspektis pala, tre senverva kaj tute deprimiita, kun ĝemvibro en sia voĉo. I.a. troviĝis adjutanto nomata Xu Jun, kiu ofte memkontentis pri sia kapablo kaj bravo.

Rimarkinte la mienon de Han Yi, Xu Jun demandis ekpremante sian glavtenilon.

"Ho, s-ro, vi certe havas ion ĉagrenan en via koro! Bonvole diru al ni kaj mi ne ŝparas mian servon por vin helpi!"

Vole-nevole, Han Yi malkaŝe diris ĉion, kaj Xu Jun senhezite diris: "S-ro, bonvole donu al mi vian manskribon, kaj mi tuj alvenigos ŝin ĉi tien!"

Kaj li tuj vestis sin per uniformo de ordinara militisto, portis kun si pafarkon kaj du sagujon, kondukante unu kromĉevalon, rapide galopis rekte al la domo de Shazhali, kie li atendis kelkan tempon ĝis kiam Shazhali eliris de sia domo jam pli ol unu lion, tiam Xu Jun portante militistan robon, kondukante bridon, sturme entrudiĝis tra la fronta pordego kaj ankaŭ la interna pordo, kaj li senĉese laŭte kriis: "Lian Generalan Moŝton trafis akuta malsano kaj mi estas sendita urĝe venigi la s-inon!"

Lakeoj kaj gardistoj de Shazhali ĉiuj timigite retiriĝis disflanken, neniue eĉ kuraĝis kaplevi rigardi.

Tiel Xu Jun venis al la halo. Li montris al s-ino Saliko la slipon skribitan de s-ro Han Yi, kaj rapide subtenis ŝin ascendi la kromĉevalon kaj, en palpebruma momento, ili kun fulma rapideco jam alvenis la restoracion. Ordiginte sian veston, Xu Jun paŝis antaŭen raportante: "Feliĉe mi ne malplenumis vian komision!"

Ĉiuj ĉeestantoj tre miris kaj admiris. S-ino Saliko kaj s-ro Han Yi intervidiĝis manpremante unu la alian kaj ekscite ploris. La bankedo do ĉesiĝis. Ĉar Shazhali tiam ĝuis aparte grandan favoron de la Kortego, Han Yi kaj Xu Jun maltrankvilis timante ĉu okazus al ili malfeliĉo. Sekve, ili vizitis al s-ro Hou Xiyi, kiu diris kun granda surpriziĝo: "Ho, jen ĝuste kion mi emis fari dum tuta vivo! Nun, ĉu Xu Jun ankaŭ faris tion?"

Kaj li senprokraste prezentis al imperiestro raporton kiu legiĝis jene:

"Han Yi, titularaj ministro, vicestro de la trezora departemento sub la Speza Ministerio kaj inspektoro, dum sia longa servado kiel asistanto faris multe da meritoj. Dum li vojaĝis al ĉefurbo partopreni ŝtatan ekzamenon, lia edzino, nomata Saliko, disiĝis de li barite de ferocaj ribeluloj kaj sin loĝigis rifuĝe en bonzinejo. Nun, kiam civilizacio prosperis tra nia imperio kaj edifiĝis popolanoj ĉu proksimaj aŭ foraj, tamen okazis malordigo de leĝaro far iu generalo Shazhali, kiu, tro alte taksinte sian negrandan meriton, aŭdacas damaĝi la sanktan regadon de moralo per sia perforta rabado de virta virino. Mia subulo Xu Jun, titulara vicĉefinspektoro, origine bravulo en Hebei, heroa kaj kuraĝa, reprenis Salikon kaj revenigis ŝin al Han Yi. Kvankam Xu Jun faris tion pro justama indigno, tamen lia ago sen anticipa peto pri instrukcio rezultigis de mia nerigora rego al miaj subuloj."

Post nelonge, publikiĝis edikto de imperiestro, verdiktante ke Saliko estu revenigita al Han Yi, kaj du milionoj da moneroj estu premidonitaj al Shazhali.

Tiel, s-ino Saliko reunuiĝis kun Han Yi, kiu poste foj-refoje promociiĝis ĝis konfidenca sekretario en la kortego.

**Xue Yongruo (aũtoro en Tang-dinastio)**



# VETO PRI KANTOJ

En Kaiyuan-erao (713-741), Tang-dinastio, Wang Changling, Gao Shi kaj Wang Zihuan ĝuis saman renomon kiel famaj poetoj. Siatempe ili ĉiuj ankoraŭ ne estis favoritaj de fortuna kaj havis similan vivon de migranto. Foje, en frosta tago, kiam neĝetis, la triopo kune vizitis al restoracio kaj aĉetis kredite iom da vino kundrinki. Subite alvenis dekkelkaj geaktoroj de la Pira Ĝardeno, nome, la imperia muzika institucio, kiuj ascendis la supran etaĝon por festeni. La tri poetoj do sidigis sin en kvieta angulo ĉe forno por rigardi. Post nelonge, sinsekve alvenis ankaŭ aliaj kvar sveltaj kantistinoj-hetajroj, ĉiuj lukse vestitaj, senkompare pimpaj kaj sorĉe ĉarmaj. Kaj, post momento, ekludiĝis muzikoj, senescepte de famaj majstraj verkoj en la kuranta erao.

Wang Changling kaj liaj amikoj kaŝe interkonsiliĝis, dirante:

"Ni ĉiuj ĝuis famon kiel elstaraj poetoj, kaj neniam mem decidis la vicordon inter ni, sed nun venas bona ŝanco ke ni povas kaŝe spekti ilian kantadon, kaj, ni interkonsentu pri tio, ke tiu, kies versoj estos plej multe kantataj en la festeno, gajnos la ĉampionecon inter ni!"

Jen unu el la kantistinoj ekkantis laŭtakse:

*Fride pluvis sur rivero dum nokthoro;*

*adiaŭas mi amikon ĉe aŭroro.*

*Se demandos pri mi en Luoyang parencoj;*

*En jadvruĉ' glacikristalas mia koro!*

Wang Changling do levis sian manon signi sur muro, deklarante: "Unu mia verskvaro!"

Kaj nun alia kantistino ekkantis:

*Ovrante l' keston, vidis mi viajn manleterojn,*

*kaj vangoj malsekiĝis de larmoj kun premtristo.*

*Kiom soleca estas vi en la nokt-teraso?*

*Sed tie – hejmo de Yang Ziyun la beletristo.*

Gao Shi do levis manon signi sur muro, deklarante: "Unu mia verskvaro!"

Kaj nun la tria kantistino ekkantis:

*Matene mi balaas. Ovriĝas palacpordoj.*

*Kun ventumil' en mano, medite mi promenas:*

*Kial vizaĝo mia pli palas ol la korvoj?*

*sur kiuj ja sun-ombroj kun reĝfavoroj plenas!*

Wang Changling do denove levis manon signi sur muro, deklarante: "Jen la dua mia verskvaro!" Ĉar Wang Zhihuang opiniis ke li mem ĝuis famon jam de pli ol sufiĉe longe, sekve li diris al siaj amikoj:

"Sciu, ke tiuj kantintoj ĉiuj estas kantistinoj en ŝimado, nature ili scipovas kanti banalajn ariojn kia Vilaĝa Vulgarulo k.s., pensu, kiu malnobelo ja kompetentas kanti la superban kanton kia Printempa Neĝo k.c.?"

Kaj, li montris al la plej ĉarma el inter la kantistinoj, dirante:

"Ni atendu ŝian vicon! Se tio, kion ŝi kantas, ne estas miaj versoj, mi neniam plu kuraĝos konkuri kun vi pri poezio dum tuta vivo! Tamen, se jes, vi ĉiuj devas humile riverenci al mi, prenante min por via majstro!"

Kaj ili ĝoje ridis atendente.

Post nelonge, venis la vico. Kiam la plej aminda ĉarmulino kun paro da harringoj ekkantis, la teksto aŭdiĝis ĝuste jene:

*Flavrivero foren al blanknub' torentas,*

*inter montoj la soleca urb' silentas.*

*Jen, ekkantas fluto pri Salika Tristo,*

*Ho, printemp' ne trans Pasejon Yumen ventas.*

Wang Zhihuan do ekstaze mokis mimike al siaj du amikoj kun ŝerca diro: "Kampuloj! Ĉu mia antaŭdiro trafas?"

Kaj ili eksplodis per gajaj humuraj ridegoj. Ne povante kompreni la kaŭzon, la geaktoroj kaj kantistinoj ĉiuj stariĝis demandante:

"Sinjoroj! Pro kio vi tiel ĝoje ridegas?"

Wang Changling kaj la amikoj malkaŝe rakontis ĉion, rezulte de tio, la geaktoroj ĉiuj konkure

salutis ilin, dirante:

"Ho, pardonu ke ni kun karnulaj okuloj ne povas pli frue rekoni vin feojn! Nun ni humile petas vian favoron, ke vi digne honorigu nin per via ĉeesto al nia festeno!"

La triopo bonhumore akceptis la inviton kaj havis ĝojan drinkon ĝis ebrio dum tuta tago.

**Huangfu Mei (aũtoro en Tang-dinastio)**

# LA SAGACA SERVISTINO QUEYAO

S-ro Li Yu, kantonestro sude de Dongting-lago, havis servistinon, nomatan Queyao, kiu estis kun bela aspekto kaj lerta lango.

Ĉiumonate, je la unua kaj dekkvina tagoj, kiam oni laŭmore devis sendi donacojn al familioj de boparencoj por reciproke saluti, Queyao ĉiam gvidis la donacsendadon, dume neniu el la dekoj da aliaj servistinoj de s-ro Li havis la saman kapablon kompareble al ŝi. Queyao per sia saĝeco, sagaco kaj subtila asidueco ankaŭ tre plaĉis al la parencoj de s-ro Li.

S-ro Li Yu havis kvar filojn, el kiuj la unua propre nomiĝis Yanxi, la dua – Yanfan, la tria – Yanzuo, kaj la kvina, laŭvice inter la gefiloj, ankaŭ estis filo.

La kvar sinjoridoj ĉiuj estis senbridemaj dandoj en junaĝo. Ili senescepte volis amori kun Queyao, sed neniu el ili sukcesis atingi sian voluptcelon.

Foje, okaze de la Tago de Klaro kaj Helo, kiam lante leviĝis la svelta novluno, en la korto pompe disfloris diversaj floroj, en la halo pendis broditaj kurtenoj, kiuj ŝirmis lamplumon. En la ombro sub sakuroj de la korto Queyao renkontis la Unuan Sinjoridon, kiu kroĉiĝis al ŝi, petante pri amoraĵo. Queyao prenis maton, transdonis al li kaj diris: “Iru al la sudorienta angulo de la halo kaj tie atendu min! Mi venos post kiam viaj gepatroj

endormiĝis.” Tiel, la Unua Sinjorido ĝoje foriris.

Kiam Queyao venis al koridoro, ŝi renkontis la Duan Sinjoridon, kiu flirtumis al ŝi. Queyao prenis maton, transdonis al li kaj diris: “Atendu min en la halo je la nordorienta angulo!”

Post kiam foriris la Dua Sinjorido, Queyao renkontis la Trian Sinjoridon, kiu ĉirkaŭbrakumis ŝin.

Queyao prenis maton, transdonis al li kaj diris: “Atendu min en la halo je la sudokcidenta angulo!”

Post kiam foriris la Tria Sinjorido, Queyao renkontis la Kvinan Sinjoridon, kiu firme kaptis ŝiajn manojn, ne lasante ŝin liberiĝi. Queyao ankaŭ transdonis al li maton kaj diris: “Atendu min en la halo je la nordokcidenta angulo!” Tiel foriris ĉiuj kvar filoj de s-ro Li Yu.

Yanxi, la Unua Sinjorido, atendis kun retenata spiro en angulo de la halo, kies pordo restis neriglite fermita. Tiam li vidis ke liaj tri fratoj venis unu post alia kaj direktis sin respektive al unu angulo. Kvankam Yanxi sentis miron, tamen li kuraĝis ellasi nenian sonon. Post nelonge, Queyao ekbruligis lampon kaj eniris per rapidaj paŝoj en la halon. Ŝi larĝe malfermis la pordon, kaj per la lampo prilumis la fratkvaropon, dirante:

“Ho, de kie venis la malriĉuloj, kiuj aŭdacas serĉi tranoktejon ĉi tie?”

La kvar fratoj ĉiuj forĵetis maton de sia mano, kaj ŝirmante al si la vizaĝon, diskuris for. Dume Queyao mokridis ilin de malantaŭe.

Post la akcidento, la filoj de s-ro Li Yu, kun honto en sia koro, neniam plu kuraĝis montri malestimon al Queyao.

**Anonimo (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# LI MO

S-ro Li Mo estis famkonata kiel la plej eminenta flutisto dum Kaiyuan-erao (713-741), kaj li estas senrivala majstro ankaŭ en la nuntempo.

Foje, pro iu afero s-ro Li Mo petis forpermeson kaj veturis al Shaoxing. Lokaj aŭtoritatuloj kaj personuloj konkure invitis lin al festenoj por aŭskulti lian majstran flutludon.

Estis dek rekomenditoj por la ekzameno de la titolo Jinshi, ĉiuj el bonhavaj familioj de Shaoxing. Ili kolektis sumon de du mil moneroj por okazigi bankedon en la Spegula Lago kaj volis inviti s-ron Li Mo tie ludi. Eĉ la anticipa imago pri lia majstra flutludo jam sufiĉe ravas. Ĉar la sumo estis iom tro granda por ne multaj kontribuantoj, ili interkonsentis varbi respektive po unu gasto. Hazarde iu el la dek gastigantoj ekmemoris nur en la vespero ke li ankoraŭ devis varbi alian homon, sed jam estis tro malfrue por fari tion. Okaze li havis maljunan najbaron kun familia nomo Dugu, kiu vivis ĉiam en kampara kabano, sen scio pri la ekstera mondo, kaj estis nomata Avo Dugu (Avo Izolita). En la urĝa momento la forgesema rekomendito do invitis la avon ĉeesti la bankedon.

Kiam ili venis al la kunsido, ĉirkaŭita de senlima ondaro kaj belaj pejzaĝoj, s-ro Li Mo milde viŝis al sia fluto kaj la ŝipo iom post iom naĝis al la mezo de la lago. Tiam leĝeraj nuboj ŝvebis vuale. Zefiroj karesis ondetojn, kaj ruliĝis blankaj ŝaŭmoj. S-ro Li Mo levis sian fluton. Je lia ekblovo al la fluto, kvazaŭ sereniĝis la nubozaj ĉielo, kaj akve kaj ŝipe fariĝis froste, verŝajne alvenis fantomoj kaj feoj. Ĉiuj gastoj admiris, laŭdante, ke la muziko superis eĉ tiun de la ĉiela palaco. Tamen Avo Izolita nur mutis, kio vekis malkontenton ĉe la kunsidantoj. Ankaŭ s-ro Li Mo prenis la muton de Avo Izolita kiel ofendan ignoron kaj tre koleris.

Post longa meditado, s-ro Li Mo ludis alian arion, pli superban ol la antaŭa. Ĉiuj aŭskultantoj imponite laŭdis. Sed Avo Izolita ankoraŭ sidis silente. La gasto, kiu alvenigis Avon Izolitan, sentis grandan honton, kaj sin pravigis, dirante: "Avo Izolita ĉiam vivis en dezerta kamparo, tre malofte venis al urbo, tial li restas analfabeta pri muziko."

Al la moko kaj riproĉoj de la kunsidantoj, Avo Izolita respondis nur per senvorta rideto.

S-ro Li Mo demandis al li: "Estimata Avo, kiel mi interpretu vian konduton? Ĉu ignoron? aŭ vi mem estas majstro de flutludado?"

Avo Izolita senurĝe respondis: "S-ro, kial vi opinias ke mi ne scipovas ludi fluton?"

Aŭdinte tion, ĉiuj kunsidantoj ŝanĝis sian mienon kaj ridante petis lian pardonon por s-ro Li.

Avo Izolita diris al s-ro Li Mo: "Nun vi prove ludu por ni la pecon Liangzhou, mi petas."

Kiam s-ro Li Mo finis la arion, Avo Izolita diris al li: "Vi ludas ankaŭ sufiĉe bone, tamen kun



miksita fremda tono. Ĉu vi havis kunulon el lando Qiuci?"

Konsternite, s-ro Li Mo leviĝis kaj riverencis: "Ho, vere mirinde! Avo! Eĉ mi mem ne rimarkis tion, sed mia instruisto vere estis ano de Qiuci."

Avo Izolita daŭrigis: "Ĉu vi scias, s-ro, ke je la 13-a alineo vi misfalis en la Akvoarion?"

"Mi estas stulta," respondis s-ro Li Mo. "Kaj vere ne rimarkis tion."

Avo Izolita transprenis lian fluton kaj provis ekblovon. S-ro Li Mo havis alian fluton. Li viŝpurigis ĝin kaj transdoni al la avo. Rigardante al la fluto, Avo Izolita diris al li: "Tio estas sentaŭga, nur ilo por komencantoj."

Prenante la alian fluton, Avo Izolita diris kun averto: "Ludante ĝis la enkonduka parto de movimento Rompo, tio ĉi certe rompiĝos. Ĉu vi ne bedaŭros?"

"Mi ne kuraĝas." respondis s-ro Li Mo.

Avo Izolita do ekblovis. La fluta sono flugis ĝis nuboj. Ĉiuj kunsidantoj sentis miron kaj timon.

S-ro Li Mo humile kaj honteme kuraĝis fari nenian moveton.

Ludante ĝis la 13-a alineo, Avo Izolita montris al s-ro Li Mo la eraron. Kun respekto kaj admiro, s-ro Li Mo preskaŭ surgenuiĝis. Kaj, ludante ĝis la enkonduka parto de ĉapitro Rompo, la fluto ekrompiĝis, tiel ke li ne povis ludi ĝis la fino. S-ro Li Mo refoje riverencis. Ankaŭ ĉiuj ĉeestantoj imponiĝis, kaj disiĝis. La sekvantan matenon, s-ro Li Mo kaj la gastoj kune vizitis al Avo Izolita. Venante al la hejmo de la avo, ili vidis nur vakantan kabanon, sed malaperis Avo Izolita. Konantoj en Shaoxing serĉis lin, sed neniu sciis kien la avo foriris.

**Kang Pian (aũtoro en Tang-dinastio)**

## LA FESTENO DE S-RO LI

Dum Qianfu-erao (874-879), eksigite de la ofico de prefekto, s-ro Li revenis de fremda loko kaj ekloĝis en la orienta ĉefurbo Luoyang. Ĉar li tre dankis malnovan favoron far nobelo, li volis inviti la nobelidojn al festeno. S-ro Li havis intiman amikon nomatan Shenggang kiu estis bonzo en Jing'ai-templo. S-ro Li rakontis sian planon al Shenggang kaj tiu diris:

"Ho, jam delonge mi estis malnova gasto en la nobela domo! Mi ofte vidis, ke manĝaĵoj en la nobela domo ĉiam konsistiĝis el diversaj kuriozaj frandaĵoj. Ordinare la manĝaĵoj de ili estis kuiritaj per karbo, sed rezulte ili ankoraŭ montris sin malkontentaj. Per kio do vi regalos tiujn orgojlajn dandojn?"

"Jes, eble mi ne kapablas havigi al mi la kuriozajn manĝaĵojn kiaj medoloj de ruĝa elefanto aŭ lipoj de blanka orangutango, sed se temas pri pretigo de delikata festeno, tio ne estas tro malfacila por mi."

Kaj li multe penis kolekti rarajn materialojn, kaj lia edzino propramane kuiris. Ili aranĝis luksan festenon kun delikataj pladoj, elektis bonaŭguran daton kaj invitis la nobelidojn.

Fratoj de la nobelidoj vice kunsidis ĉe la festeno, sed ili kondukis ĉiuj tre sindetenemaj. Ĉiufoje kiam la frandaĵoj estis prezentitaj, ili manĝis neniom. La gastiganto ĝentile invitis ilin foje-refoje riverence, sed ili prenis nur iomete da fruktoj. Kiam venis la plado de malvarmaj manĝaĵoj, ili prenis per kulero kaj reciproke rigardis sin unu la alian dum longa tempo kvazaŭ ili englutis amaraĵon aŭ pinglojn.

S-ro Li tute ne povis kompreni kio okazis al ili, sed, kiel gastiganto li nur petis pardonon pri sia fuŝkuirado.

La sekvantan tagon, kiam s-ro Li renkontiĝis kun Shenggang, li detale rakontis al li pri la konduto de la nobelidoj. La bonzo diris: "Mia antaŭdiro ne estas malprava, ĉu?"

Poste, la bonzo vizitis al la nobela domo kaj demandis al la nobelidoj: "S-ro Li zorgeme preparis festenon kun pladoj abundaj kaj puraj, kial vi ne gustumu iomete por akcepti lian regalon?"

La nobelidoj respondis: "Sed li ne bone majstras la kuirarton."

"Eĉ se la ceteraj frandaĵoj estas nemanĝindaj, ĉu ankaŭ la manĝaĵoj kuiritaj per karbo sen taŭgas?" respondis la bonzo.

"Ho, estimata majstro, vi ne scias," diris la nobelidoj. "Kiam oni uzas karbon por kuiri, unue oni devas fari anticipan bruligon, alie ĝia fumeco ne estis tute forigita. Sed la karboj en domo de s-ro Li ĉiuj estis sen anticipa bruligo, tial manĝaĵoj estis malbongustaj kaj malfacile

manĝeblaj."

Manklakante la bonzo ridegis, dirante: "Ho, tion mi vere ne povas scii!"

Poste, kiam la ribelulaj trupoj gvidataj de Huang Chao (?-884) faligis urbon Luoyang, riĉaĵoj de la nobela familio estis ĉiom forrabitaj. Fratoj-nobelidoj kelkope forrifugiĝis kun la bonzo Shenggang al montvalo kie seniĝis al ili manĝaĵoj eĉ dum tri tagoj. Kiam la ribelulaj trupoj iris iom malproksimen, la rifuĝantoj piediris al ponto super rivero. Duonvoje ili ekvidis malgrandan vendejon, kiu ĵus komencis vendi manĝaĵon el krudaj rizoj. En poŝo de la bonzo ankoraŭ restis centoj da moneroj. Li aĉetis la rizaĵon metitan en terakotaj bovloj kaj divide disdonis al la nobelidoj kunmanĝi. Ĉar ili ĉiuj estis en terura malsato, sekve ili voregis trovante la rizaĵon pli bongusta ol la plej delikata frandaĵo. Ridante la bonzo demandis al la nobelidoj: "La rizaĵo estas elkuirita per karbo sen anticipa bruligo, mi ne scias, ĉu ili taŭgas por via Manĝado?"

Aŭdinte la parolon, la nobelidoj ĉiuj klinis sian kapon kun honto kaj trovis nenion por respondi.

**Shen Yazhi (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# STRANGAJ SONGĜOJ

En la deka jaro de Yuanhe-erao (815 p. K.), Tang-dinastio, mi, Shen Yazhi, servis en Jingzhou ĉe Longxi-duko kiel lia sekretario. Eminentaj personuloj de la metropolo Chang'an venis viziti lin. Laŭ invito de la duko, gastoj venis je la 18-a de la kvina monato lunkalendare al bankedo, kiun Longxi-duko aranĝis en sia domo ĉe la Orienta Lago. Kiam ĉiuj jam sidiĝis, la duko ekparolis:

"Dum mia juneco, mi ofte ekskursis kun s-ro Xing Feng kaj bone sciis pri lia neordinara travivaĵo. Nun, permesu ke mi rakontu tion al vi!"

"Jes, volonte!" respondis la gastoj.

"S-ro Xing Feng devenis el familio de komandanto," komencis la duko. "Li mem ne posedis specialan talenton. Poste li loĝis en Chang'an, sude de la kvartalo Pingkang, kie li aĉetis per miliono da monoj pompan domon de riĉa familio, kun profundaj kortoj kaj zigzagaj koridoroj.

Foje, dum siesto li vidis en songo, ke el la okcidenta ĉambro lante alvenis belulino en antikvfasona vesto kun orta kolumo, brodaj rubandoj kaj jako kun longaj kaj larĝaj manikoj. Ŝi havis altan hartuberon, sveltajn brovojn kaj tenis volumon da poemaro en mano. Ŝi paŝis ion voĉlegante.

Kun granda ĝojo Xing Feng demandis: "Ho, de kie venas tiel ĉarma belulino al mi?"

Ridante la belulino respondis: "Jen mia propra domo! Ja vi mem gastas ĉe mi, kial vi demandas supozante min el fremda loko?"

"Ĉu vi permesas al mi vidi kion vi legas?"

"Mi ŝatas poezion." klarigis la belulino, "tial ofte kunportas poemaron ĉe mi."

"Bonvole restu momentu! por ke mi havu la feliĉon legi vian poemaron!" petis s-ro Xing Feng.

La belulino transdonis la poemaron al s-ro Xing Feng kaj mem sidiĝis sur la okcidenta seĝo.

S-ro Xing Feng malfermis la poemaron kaj vidis ke la unua poemo titoliĝis Printempa Suno kaj estis el kvar versoj, dum la sekvantaj senescepte el dekoj da versoj.

"Se vi volas," diris la belulino, "vi povus transskribi iun el la poemaro, sed nepre ne pli ol unu peco."

S-ro Xing Feng leviĝis, prenis de la tablo en la orienta flanko domo koloran paperon kaj kopiis la poemon

*Printempa Suno*

*Sub suno knabinoj de Chang"an promenas,*

*sed vekas ĉagrenon printempe la suno.*

*"La kurban pafarkon" mi dance forgesis,*

*kaj palas silkvestoj sub prujn" de aŭtuno.*

Transskribinte la poemon, s-ro Xing Feng demandis: "Kion signifas la kurba pafarko?"

"Pozon en danco, kiun miaj gepatroj instruis al mi en mia infanaĝo." respondis la belulino.

Kaj ŝi stariĝis, iom ordiginte sian veston, levis manikojn kaj dancis kelkajn taktojn, montrante al li la pozon de kurba pafarko. Fininte tion, la belulino larmis london momenton kaj adiaŭis.

"Restu ankoraŭ momenton!" petis s-ro Xing Feng.

Sed la belulino rapide foriris.

Tiam vekigis s-ro Xing Feng el la sonĝo, sed kun konfuza menso, eĉ forgesinte la transskribon de la poemo. Poste kiam li ŝanĝis al si veston, li ektrovis la poemon en sia maniko kaj, pere de tio, li sukcesis rememori ĉion en la sonĝo. Tio okazis en Zhengyuan-erao (785-805 p. K.) kaj s-ro Xing Feng rakontis al mi poste."

Tiun tagon, en la bankedo ĉeestis asistantoj de arma inspektoro, prefektoj kaj gubernatoroj kaj gastoj s-roj Dugu Xuan el Long"xi, Lu Jianci el Fangyang, Zhang Youxin el Changshan kaj Su Di el Wugong. Ĉiuj aŭskultantoj kortuŝtie diris: "Tio ja meritas enskribi."

Kaj mi, Shen Yazhi, skribis la supran rakonton reveninte de la bankedo. En la sekva tago, vizitis al mi gastoj malfrue alvenintaj, nome: s-roj Gao Yongzhong el Bohai, Wei Liang el la metropolo Chang"an, Tang Yan el Jinchang, Li Yu el Guanghan, kaj Yao He el Wuxing. Ni denove kunsidis ĉe la fonto Brila Jado. Mi montris mian manuskripton al la gastoj por ilia lego. Tiam s-ro Yao He diris jene: "En la unuaj jaroj de Yuanhe-erao (806-820), mia amiko Wang Yan iam havis sonĝon, ke li servis longe ĉe la reĝo de Wu-regno. Foje, li ekaŭdis ke ĉaroj ekveturis el la palaco, sonis funebre flutado kaj taburado. Jen oni sepultis Xishi, la faman belulinon favoratan edzinon de la reĝo. Ne povante regi sin de granda malĝojo, la reĝo ordonis ke poetoj verku elegion. Tiam Wang Yan prenis la taskon kaj versis jene:

*Rigardas mi al regno Wu al la okcidento.*

*Pompas jen bela skrib" sur feniksa monumento.*

*Leviĝas per laj tendoj funebre ĉe l" rivero  
por ŝin sepulti kun orharpingloj en la tero.  
Abundas ĉie l" ruĝa herbaro en amasoj,  
kondukas kaj la jaspaj ŝtupar" al tri terasoj.  
Printempa vento foris, neniam revizite,  
dum mia koro sangis, por ĉiam frakasi.*

Wang Yan prezentis sian verkon al reĝo, kiu multe prilaudis. Kiam Wang Yan vekigis, li ankoraŭ bone memoris sian songon. Wang Yan estis homo el Taiyuan."



**Bai Xingjian (776-826)**

# TRI SONGĜOJ

Inter songĝoj troviĝas ja mirinde neordinaraj, ekz-e: iu songĝas, ke li ien alvenis, dum la alia ĝuste tiuloke lin renkontis; aŭ tiel: iu faras ion, kion tamen vidis la alia en sia songĝo; aŭ plie: ambaŭ intervidiĝis unu la alian en sama songĝo.

Dum regado de la imperiestrino Tianhou, Liu Youqiu, la prefekto de Cao, pro oficaj aferoj revenis hejmen ofte nur nokte. Foje, ankoraŭ dek liojn for de lia hejmo li paŝis preter budaa templo, de kie aŭdiĝis kantoj kaj ridoj gajaj. La muroj de la templo estis malaltaj kaj breĉis kelkloke, tiel ke oni povas vidi tute klare la internaĵon. Liu kliniĝis, subrigardis internen kaj vidis ke dekkelkaj homoj, viraj kaj inaj, mikse kundsidis ĉirkaŭ tablo kun manĝaĵoj. Inter ili troviĝas ankaŭ lia edzino, kiu sidis ĝoje babilante. Komence, Liu miris tre, ne povante kompreni pri la kialo. Poste li pensis ke ĉi tie ne estas loko kien ŝi decas alveni. Lasi ŝin resti sola li neniel povas. Li pli atente rigardadis: jes ja, ĉu mieno, ĉu konduto, ĉu parolo kaj rido, absolute konstatis ke ŝi estas lia propra edzino. Li volas eniri la templon, sed la pordo estis fermita. Liu ekprenis brikon kaj ĵetis ĝin. La briko trafis grandan vinujon, je kies frakasiĝo la tuta spektaklo tuj malaperis. Liu eniris la templon trans la muron kun siaj servistoj. Ili rigardis ĉirkaŭen, sed troviĝas neniu homo, dum la templo restis riglita kiel antaŭe.

Tio ankoraŭ pli mirigis Liu-n. Li haste rapidis al sia hejmo. Kiam li revenis, lia edzino ĵus vekigis el dormo. Post kelkaj komplimentoj, la edzino ridis dirante: “Mi ĵus songĝis, ke mi ekskursis kun grupo da homoj al budaa templo. Ĉiuj kunvojaĝantoj estas de mi nekonataj. Kiam mi kundsidis ĉe manĝaĵo en halo. Subite iu ĵetis de ekstere brikon kiu frakasis tasojn, pladojn kaj mi ekvekiĝis. Siavice Liu ankaŭ rakontis kion li vidis.

Jen la ekzemplo de tio: kiam iu songĝis ke li ien alvenis, dum la alia lin renkontis ĝuste tiuloke.

En la kvara jaro de Yuanhe-erao (809 p. K.), Yuan Weizhi de Henan estis sendita al landlimaj regionoj kiel inspektoro. Tagdekon post lia forveturo, mi kun Letian, mia pliaĝa frato kaj Li Shaozhi de Longxi kune ekskursis al Qujiangrivero kaj vizitis al Ci'en-templo. Ni travizitis ĉiujn kabinetojn en la templo kaj tie restis longan tempon. Vespere ni kune venis al la domo de Shaozhi en kvartalo Xiuxinli. La tutan nokton ni drinkis vinon kun ĝojo. Metinte pokalon, mia frato diris: “Tre eble, ke Weizhi nun atingas Liangzhou.” kaj li verkis poemon:

*Senhelpas printemp' por forigi la triston,*

*Ebrie mi plukis la florojn kaj drinkas.*

*En kor' mi kalkulas pri via vojaĝo,*

*nun certe la urbon Liangzhou vi atingas.*

Estis la tago dudekunua. Post pli ol dek tagoj, venis el Liangzhou sendito kiu alportas leteron

de Weizhi. Fine de la letero estis poemo “Mia Songô”:

*Mi songîs, ke fratoj vojaĝis vi kune*

*al Qujiang-rivero, al Ci'en-monaĥejo.*

*Sed heno ĉevala ekvekis min nune,*

*kaj trovas mi min en Liangzhou-a gastejo!*

La dato, monato estas tute samaj konforme kun tiu kiam ni vojaĝis kaj frato verkis la poemon.

Jen tia okazo, ke iu faris ion, kion tamen vidis la alia en sia songô.

Dum Zhenyuan-erao (785-804 p. K.), Du Zhi de Fufeng kaj Wei Xun de Jingzhao kune veturis de Bo al Qin. Duonvoje ili loĝis en hotelo ĉe Tongguan. Du songîs ke li venis al Templo de Sankta Monto Huashan, kie li renkontis ŝamaninon, kiu estis nigrhaŭta kaj alta, kun blua jupo kaj blanka jako. Ŝi salutis al li ĉevoje, petante ke li permesu ŝin preĝi por li. Ne povante rifuzi, Du konsentis. Li demandis pri ŝia nomo. Ŝi havis familian nomon Zhao. Vekiĝinte el songô, Du rakontis tion al Wei. La sekvantan tagon ili venis al la templo, tie ilin bonvenigas ŝamanino kies aspekto, konduto kaj vestoj ĉiom konformas al kion Du en songô vidis.

“Jen kiun la songô antaŭkonigis,” diris Du rigardante al Wei, kaj ordonis al servisto elpreni el monujo du ĉenojn da moneroj, kiujn li donacis al la ŝamanino. Preninte la monon en mano, la ŝamanino ekridegis kaj parolis al siaj koleginoj:

“Ja tute same kiel mi songîs !”

Surprizite, Wei demandis kaj ŝi respondis:

“Hieraŭ nokte mi songîs ke venas el la oriento du personoj, el kiuj unu estas barba kaj malalta. Mi preĝis kaj ricevis de li du ĉenojn da moneroj. Matene mi dissciigis mian songôn al ĉiuj miaj koleginoj kaj jen la songô efektive realiĝas !”

Wei demandis kiel ŝi nomiĝas.

“Ŝi havas familian nomon Zhao.” respondis ŝiaj koleginoj. La tuta okazaĵo konformas unu la alian de komenco ĝis la fino ekskluzive.

Tio estas la ekzemplo de intervidiĝo en songô. Mi, Bai Xingjian, diris:

“En ‘CHUN QIU’ (La Printempoj kaj Aŭtunoj), en verkoj filozofiaj kaj historiaj ja abundas skriboj pri songoj, sed ne troviĝis tiaj tri songoj. Ankaŭ homoj havas songojn, sed tiajn tri songojn neniu havis. ĉu tio okazis hazarde aŭ destine, mi ne povas scii. Mi skribas tiujn

sonĝojn, esperante ke ili restu en memoro de homoj.”

**Liu Zongyuan (773-819)**

# LA BRAVA KNABO OU JI

La aŭtoro s-ro Liu diris: Mankas bonkora favoro al loĝantoj en la sudaj provincoj. Kiam naskiĝis infanoj, ili certe estis rigardataj kiel komercaĵoj. Kiam infanoj kreskis por renovigo de dentoj, la patro aŭ pliaĝaj fratoj ofte vendis ilin por ĉasi profiton. Se al iu familio naskiĝis ne malmulte da infanoj, la profitemuloj ofte ŝtelis aŭ rabis infanojn de aliaj familioj. La rabitoj ofte estis malliberigitaj per katenoj. Eĉ kiam ili kreskis adoltaj, nur se ili estis senfortaj, ili volenevole devis fariĝi servistoj. La hom-rabo okazis eĉ survoje kaj fariĝis moro. Aŭ, se ili kreskis fortaj, ili rabos la malpli fortajn. Regantoj ek han-nacieco pro sia profito lasis tian agon senbrida kaj nejuĝita, nur se ili akiris servoknabojn.

Tiel la nombro de loĝantoj en la sudaj provincoj reduktiĝis senescepte. Tamen la brava knabo Ou Ji sagace venkis homrabantojn, vere mirinda!

Tion rakontis al mi s-ro Du Zhoushi, la asistanto de prefekto en Guiguan.

Ou Ji estis paŝtknabo en Chenzhou. Foje, kiam Ou Ji paŝtas kaj kolektas brullignojn, du fortikaj rabistoj kaptis lin kaj ligis liajn manojn dorsen. Per tuko la rabistoj ŝtopis la buŝon al la knabo. Ili forportis lin al foiro malproksima je 40 lioj por vendi. Ou Ji ŝajnis sin plori kaj tremi timeme. La rabistoj rigardis lin facile traktebla knabo kaj ili kundrinkis ĝis ebriiĝo. Unu el la rabistoj iris al foiro por negoco, dum la alia rabisto kuŝis, stariginte sian spadon survoje. Profitante la ŝancon kiam la rabisto endormiĝis, la knabo Ou Ji turnis sian dorson al la spado, li frotigis la ŝnurligon supren-malsupren sur la klingo de la spado, fine la ŝnuro interrompiĝis. Ekkaptante la spadon Ou Ji mortigis la dormantan rabiston.

Sed, kiam Ou Ji forkuris ne malproksimen, revenis la alia rabisto el foiro. Ege surprizite li kaptis kaj volis mortigi la knabon. Ou Ji rapide parolis al li:

"Ol sub du mastroj, mi preferas servi sub unu mastro. Mi mortigis lin, ĉar li traktis min kruele. Se vi rezervos mian vivon kaj bone traktos min, mi volonte servu al vi pri ĉio!" La alia rabisto konsideris longan momenton, pensante: "Se mi mortigos la knabon, mi akiros nenian profiton. Kial ne forvendu kontraŭ monoj? Kaj, dividi la enspezon inter du vendantoj portos al mi ja malpli multe da mono ol nun mi sola vendas la rabiton. Do, ke lia mortigo estas bona afero por mi."

Li do kaŝis la kadavron de la mortinta rabisto, kondukis la knabon en pli firma ŝnurligo al nova aĉetanto. Noktmeze, la knabo turnis sin al forno kaj proksimigis sian ŝnurligon al fajro bruli, li ne timis eĉ vundon de siaj manoj dum brulado. Libetiĝinte, li rekaptis spadon kaj mortigis la duan rabiston, kaj tiam li kriegis, kio vekis ĉiujn en la foiro. La knabo diris: "Mi estas infano el familio Ou. Mi ne devas fariĝi servoknabo, ĉar du rabistoj rabis min, sed mi mortigis ilin ambaŭ! Raportu nun al la aŭtoritatuloj."

Pedelo raportis al guberniestro, kaj guberniestro raportis al prefekto. La prefekto donis aŭdiencon kaj trovis la knabon tre juna kaj honesta. La prefekto s-ro Yan Zheng miris. Li proponis ke la knabo funkciu kiel oficisto en lia oficejo, sed la knabo ne konsentis. La prefekto do premidonis al la knabo veston kaj sendis pedelon eskorti lin reveni al hejmvilaĝo. El la lokaj rabistoj neniu kuraĝis iri preter la pordo de la hejmo de Ou. Timeme ili diris inter si: "Tiu knabo en aĝo pli juna ol la fama bravulo Qin Wuyang je du jaroj, sed li jam mortigis du fortikajn rabistojn. Kiu el ni aŭdacas proksimiĝi al li?"

**Du Guangting (850 – 933)**



# HOMO KUN KRISPA VANGBARBO

Kiam Imperiestro Yang de Sui-dinastio (605-618) vizitis al Yangzhou, Konsilano Yang Su estis ordonita gardi la Okcidentan Ĉefurbon. Kaj Yang Su, la fiero nobelo, konsideris sin tiel senkompare grava persono ke en tiu ĉi malpaca tempo tra la tuta imperio neniu posedas pli grandan potencon aŭ reputacion ol li mem. Li vivis lukse kaj arogante pli ol li kiel kortegano decis. Kiam lordoj aŭ gastoj lin vizitis, li akceptis ilin ĉiam nur sidante en kanapo kaj malhumile disetendante siajn kruojn. Li iris braktenate de belaj servistinoj, kun honora eskortantaro tiel uzurpe impona kiel tiu de imperiestro. Poste, li fariĝis eĉ pli senbrida dum sia oldaĝo, tute forgesinte la devon al sia suvereno savi la imperion el danĝero de ruiniĝo.

Iutage Li Jing, kiu en estonteco fariĝis Duko de Wei sed siatempe ankoraŭ estis pleba civitano, petis lian aŭdiencon por oferi saĝajn konsilojn pri imperiaj politikoj. Kaj Yang Su, kiel kutime, akceptis lin nur sidante. Li Jing pasis antaŭen kaj salutis, dirante: "Nun la imperio estas en tumulto, kaj multaj bravuloj konkuras por krei heroaĵon. Kiel la Ĉefa Konsilano de la Kortego, vi devas klopodi kolektikiel eble plej multajn eminentulojn en vian stabon, sed ne devas akcepti vizitantojn sidante."

Yang Su forte impresita ekleviĝis apologie. Post interparolo kun Li Jing, li sentis grandan ĝojon kaj, akceptinte lian memorandon, revenis al internan salonon.

Kiam Li Jing parolis elokvente, unu el la kantistinoj de Yang Su "tre bela knabino kiu staris ĉe fronte kaj tenis en sia mano ruĝan polvoviŝilon" fikse rigardis al li tre atente. Kiam li estis foriranta, ŝi venis al la koridoro kaj diris al la oficisto ĉe la pordo: "Demandu pri lia nomo kaj kie li loĝas." Li Jing respondis al la oficisto. La knabino recitis parkere kaj eniris. Ankaŭ s-ro Li revenis al sia hotelo.

Tiun nokton, ĝuste antaŭ aŭroro, aŭdiĝis mallaŭtaj frapoj al la pordo de s-ro Li. Kiam li leviĝis demandi, li trovis nekonaton kun ĉapo kaj en purpura vesto, kiu tenis bastonon kun sako. Demandite kiu li estis, la nekonato respondis: "Mi estas la kantistino kun ruĝa viŝilo en la domo de Konsilano Yang."

Li Jing rapide lasis ŝin en la ĉambron. Kiam ŝi demetis desur si la ĉapon kaj veston, li vidis ke ŝi estas bela knabino ĉ. 18- aŭ 19- jara, senkosmetika, pompe vestita, ŝi salutis al li kaj li ankaŭ al ŝi reciprokis.

"Mi servis ĉe Yang Su sufiĉe longan tempon," diris la knabino, "kaj vidis ja tre multajn vizitantojn, sed neniu el ili similas al vi. La kuskuto ne povas kreski per si mem, sed devas kroĉiĝi al granda arbo, tial mi venas al vi."

"Sed Konsilano Yang havas grandan potencon en la ĉefurbo, kion fari?" diris Li Jing.

"Li estas nenio alia ol mortonto ankoraŭ kun spiro, tute ne timinda," ŝi respondis. "Multe da

kantistinoj forfuĝis, konsciante ke li falos, kaj li ne multe zorgis por revenigi ilin. Mi jam zorgeme pensis pri ĉio, do ne hezitu pri tio."

Demandite pri ŝia nomo, ŝi respondis ke ŝi nomiĝis Zhang Hongfu kaj estis la plej aĝa en sia familio. S-ro Li Jing trovis ŝin vera feino ĉu en aspekto aŭ konduto, parolo, temperamento. Tute senatendite Li Jing ekhavis ŝin, tial li sentis sin ju pli ĝoja, des pli maltrankvila, sen momenta paco en sia menso. Scivolemaj rigardoj de tempo al tempo ĵetiĝis al lia pordo. post kelkaj tagoj, li ankaŭ informiĝis ke oni faras serĉon pri ŝi, tamen ne tre intensan, do Li Jing kaj la knabino Honfu portis sur sin viran veston kaj, rajdante sur ĉevaloj, ekveturis de la ĉefurbo al Taiyuan.

Survoje ili ripozis en hotelo de Linshi. Lito estis aranĝita. Viando kuirigis en la potoj sur forno. Kiam Hongfu estis kombanta sian ĝistere longan hararon antaŭ la lito kaj Li Jing brosis sian ĉevalon ĉe la pordo, subite venis mezastatura viro, kun fajre ruĝa kuspbarbo, rajdante sur neforta azeno. Descendinte de la azeno, li ĵetis ledsakon antaŭ la forno, kaj, preminte kusenon kiel apogilon, li kuŝis oblikve sur la lito rigardi la kombadon de la knabino. Li Jing ekbruliĝis de kolero, sed ne eksplodis, ankoraŭ daŭrigante brosi sian ĉevalon. Hongfu atente rigardis al la vizaĝo de la nekonato, kaj, perunu mano tenante sian hararon, per la alia mano kaŝita post sia korpo ŝi signis al Li Jing ke li regu sin de furioza kolero. Ŝi haste finis sian kombadon kaj salutis al la nekonato kun demando pri lia nomo. Ankoraŭ kuŝante sur la lito la nekonato respondis ke li havas la familian nomon Zhang.

"Ankaŭ mi havas la saman." ŝi diris. "Kaj ni devas esti gekuzoj."

Kun riverenco ŝi demandis pri lia vico en la familio, kaj li diris ke li estas la tria filo. Kiam ŝi informis ke ŝi estas la plej aĝa knabino en sia familio, la kuspbarbulo ĝoje diris: "Do vi estas la plej aĝa el miaj junkuzinoj."

"Venu renkonti kun mia kuzo!" ŝi alvokis Li Jing kiu rapide salutis al li kaj ili kune sidis ĉe la fajro.

"Kion vi kuiras?" demandis la kuspbarbulo.

"Ŝafajon. Tre eble nun jam preta."

"Mi estas malsata." diris la kuspbarbulo.

Dum Li Jing eliris aĉeti dabling-ojn, la kuspbarbulo tiris ponardon el sia zono kaj tranĉis la ŝafajon. Poste, ili kune manĝis. Post la kunmanĝado la kuspbarbulo dishakis la restaĵon de la ŝafajo kaj donis ĝin al la azeno. Liaj movoj tre rapidis.

"Laŭ aspekto vi verŝajne estas nur ne riĉa instruitulo." la kuspbarbulo demandis al Li Jing. "Sed kiel vi povas akiri tiel mirindan knabinon?"

"Kvankam mi estas malriĉa, tamen ne senprudenta." respondis Li Jing. "Mi certe ne respondos, se aliaj demandus. Sed al vi mi volonte kaŝas nenion." Kaj li rakontis ĉion okazintan.

"Sed kien vi veturos nun?"

"Al Taiyuan." diris Li Jing.

"Do mi ne estas tiu, kiun vi origine volas viziti." kaj la kuspbarbulo aldonis: "Ĉu vi havas vinon?"

"Okcidente de la hotelo ja estas vinvendejo."

Kaj Li Jing aĉetis dekalitron da vino. Post drinko de unu taso, la kuspbarbulo diris: "Mi havas iom da almanĝaĵo por drinko, ĉu vi povas kunmanĝi kun mi?"

"Mi ne malobeu." respondis Li Jing.

Kaj la kuspbarbulo malfermis sian ledsakon, prenis el ĝi kapon kaj hepaton de homo. La kapo li remetis en la sakon, sed la hepaton li tranĉis per ponardo por kunmanĝi.

"Tio estas de la plej sendankema homo tra la mondo." diris la kuspbarbulo. "Mi malamamis lin jam dek jarojn. Nur hodiaŭ mi sukcesis forigi lin, kune ankaŭ mian longtempan bedaŭron." kaj li daŭrigis demandante: "Laŭ via konduto kaj aspekto, vi estas vere brava viro. Ĉu vi konas iujn eminentulojn en Taiyuan?"

"Mi konas nur unu personon, kiun mi opinias vera grandulo." respondis Li Jing. "Rilate miajn ceterajn amikojn, mi supozas, ke ili fariĝos nur generaloj aŭ kapitanoj."

"Kia estas lia nomo?"

"Ankaŭ Li."

"Kiomaĝa?"

"Nur dudek-jara."

"Kio li nun estas?"

"Filo de provinca generalo. "

"Verŝajne tre similas al tiu, kiun mi serĉas." diris la kuspbarbulo. "Tamen mi devas lin vidi. Ĉu vi povas aranĝi por mi la renkontiĝon?"

"Mi havas amikon, nomatan Liu Wenjing, kiu bone konas lin." diris Li Jing. "Mi povas aranĝi

la intervidiĝon pere de Liu, sed kial vi devas vidi lin?"

"Astrologo diris al mi ke super Taiyuan estas neordinara aermaso, pri kiu mi volas esplori. Vi veturos morgaŭ? Kiam vi atingos Taiyuan?" Li Jing kalkulis la tagojn, kaj la kuspbarbulo diris: "Atendu min en la mateno de la sekvanta tago post via atingo, ĉe Fenyang-ponto."

Dirinte, li ekrajdis sur sian azenon kaj fluge rapidis for dum palpebruma momento.

Li Jing kaj Hongfu dronis en surpriza ĝojo dum longa tempo.

"Tiel brava kavaliro certe ne trompis nin." ili diris. "Ni ne bezonas timi pri lia forgeso de promeso."

Vipante al sia ĉevalo ankaŭ ili forveturis.

Je la difinita tago ili atingis Taiyuan, kaj, kun granda ĝojo, efektive revidis la kuspbarbulon. Ili kune vizitis al Liu, kaj mensoge diris al li: "Jen sperta fizionomiisto volas vidi Li Shimin, ĉu vi povas inviti lin alveni?"

Ĉar Liu ĉiam traktis Li tre mirinda persono, tial, aŭskultante ke venas majstro de sortdiristo, li tuj sendis por inviti Li alveni, kaj, Li Shimin venis akurate, tuj post kiam la sendito revenis. Li portis nek surtuton nek ŝuojn, sed nur kun pelto neligita sur si, radianta per vigla spirito kaj vere mirinda aspekto. Silente sidante ĉe la tablofino, la kuspbarbulo rigardis al li kaj tuj vaporiĝis lia ambicio. Drinkinte kelkajn tasojn, li alvokis Li Jing flanken kaj diris al li: "Jen vera imperiestro en estonteco laŭ destino! "

Li Jing transinformis tiun aserton al Liu Wenjing, kaj tiu sentis pli grandan ĝojon de memkontento.

Elirinte, la kuspbarbulo diris:

"Mi mem konvinkiĝis pri la afero jam je 80 aŭ 90 procentoj, sed mi ankoraŭ volas ke mia taoisto-fratulo ankaŭ vidu propraokule por konstati. Do mi petas, ke vi, ambaŭ refoje veturu al la okcidneta ĉefurbo kaj en la tagmezo de iu dato vizitu min en la drinkej oriente de strato Mahang. Se vi vidos tiun ĉi kaj alian maldikan azenojn ekster la drinkejo, tio signifas ke mi kaj mia taoisto-fratulo troviĝas tie en la supera etaĝo kaj vi tuj ascendu!" li diris al Li Jing kaj Honfu.

Ili ambaŭ jesis responde.

Je la difinita dato, ambaŭ alvizitis la drinkejo kaj efektive vidis du azenojn tie. Do ili ascendis supren tirante sian baskon. La kuspbarbulo estis drinkanta kun taoisto sidante vid-al-vide.

Kun surpriza ĝojo ili renkontis Li Jing kaj invitis lin sidiĝi. Drinkinte pli ol dek tasojn, la

kuspbarbulo diris al li:

"Teretaĝe en la ŝranko vi trovos cent milojn da monero, per kiu vi trovu kvietan lokon kaŝi vian edzinon kaj revidu min alian tagon ĉe Fenyang-ponto." Post tagoj, kiam Li Jing venis al la rendevuo, la kuspbarbulo kaj la taoisto ambaŭ jam estis tie. Ili kune vizitis al Liu Wenjing kaj trovis lin ludanta ŝakon. Intersalutinte unu la alian, ili komencis babilu, kaj Liu rapide sendis slipon inviti Li Shimin rigardi ŝakludon. La taoisto ekludis kun Liu, dum la kuspbarbulo kaj Li Jing sidis apude.

Post momento Li Shimin alvenis, kun radia heroeco. Li salutis kaj sidiĝis, aspektante tiel serena kaj parolante tiel brila ke la atmosfero tuj saturiĝis de lia imponeco.

Ekvidante lin, la taoisto tuj paliĝis. Donante sian sekvantan ŝakmovon li diris kun veo: "Ho, mi estas matita! Jam perdita mia matĉo! Nesaveble! Kion mi ankoraŭ povas diri?"

Li ĉesigis la ludon kaj petis forpermeson. Elirinte, li diris al la kuspbarbulo: "Jam troviĝas nenia spaco por vi en tiu ĉi lando! Vi devas provi vian ŝancon en alia loko, do, klopodu! Ne plu zorgu ĉion ĉi tie!"

Kaj ili decidis veturi al la okcidenta ĉefurbo.

Tiam la kuspbarbulo diris al Li Jing: "La sekvantan tagon post via atingo, venu kun via edzino al mia domo en strato N. Mi scias ke vi vivas per nenia riĉo. Mi volonte konigas mian edzinon al vi ambaŭ kaj ni babilos intime. Volu ne rifuzi al mi!" Dirinte, li foriris kun suspiro. Li Jing revenis rajdante. Atinginte la ĉefurbon, li kun sia edzino Hongfu vizitis al la kuspbarbulo. Sur negranda ligna pordo li frapis. Homo venis malfermi la pordon kaj parolis kun saluto: "Nia mastro atendis vian alvenon jam longan tempon." kaj lasis ilin eniri tra pluraj pordoj, pli kaj pli imponaj unu post aliaj. Kvardek servistinoj staris atendante en la korto, kaj dudek lakeoj kondukis ilin en la okcidentan halon kun ekstreme rara kaj luksa dekoracio, kie ili vidis ke tukkestoj, tualetotablo, speguloj kaj ornamaĵoj ĉiuj estis tiel karaj, kiajn oni neniel povis trovi en la homa mondo.

Ili estis petitaj sin lavi, tualeti kaj sanĝi al si per novaj vestoj tre karaj kaj mirindaj. Nur post tio tiam aŭdiĝis la anonco: "Venas nia mastro!"

Kaj la kuspbarbulo aperis kun gaza ĉapo kaj neniligita pelto? Ankaŭ plena je reĝa stilo. Post kiam ili ĝoje intervidiĝis, la kuspbarbulo vokis sian edzinon eliri, kaj ili trovis ke ŝi ankaŭ estas feine bela. Do ili estis tiel invitataj al la centra halo, kie la bankedo estis tiel supera pli ol tiu de princoj. Kiam la kvaropo kune manĝis, orkestro el dudek muzikistinoj ludis antaŭ ili muzikon kvazaŭ de paradizo.

Post manĝfino, vino estis disponata, kaj servistoj portis el la orienta dudek kuŝoseĝojn kovritajn per brokatoj.

Stariginte la kuŝoseĝojn ili demetis la kovrantajn brokatojn kaj Li Jing vidis ke sur la seĝoj estis kontolibroj, ŝlosiloj k.s. "Tio estas de miaj riĉaĵoj." diris la kuspbarbulo al Li Jing. "Nun mi ĉiom donacas al vi. Kial? Ĉar mi jam bone pripensis. Mi ja intencis restigi ion mian en la mondo kaj brave batali 20 aŭ 30 jarojn por la trono. Sed nun la vera suvereno jam estas trovita, por kio do mi ankoraŭ restas ĉi tie? Via amiko Li Shimin de Taiyuan estas vere granda gvidanto, kiu donos pacon al la tuta imperio post 3 aŭ 5 jaroj. Per via elstara talento, se vi bone servos sub lia saĝa gvido, certe vi povos atingi la superan rangon de Konsilano aŭ similajn. Kaj via edzino kun feina beleco kaj eminenta kapablo certe ĝuos famon kaj honoron pere de sia nobla edzo. Nur la virino kia ŝi povas rekoni vian talenton, kaj nur la viro kia vi povas porti al ŝi la gloron. Sciu, ke la leviĝo de sankta suvereno nepre dankas al la helpo de kapablaj ministroj, tio okazas kvazaŭ laŭ destino, ĝuste kiel tigro akompanata de ventoblovoj aŭ drako de nuboj, tute ne hazarde! Vi povas uzi mian donacon por helpi la veran suveremon kaj krei grandan meriton, do, penu! Post dek jaroj, je miloj da lioj sudoriente de Ĉinio okazos evento neordinara, tio signifas ke mi sukcesis realigi mian ambicion. Kiam tiu momento venos. Vi ambaŭ povos verŝi vinon al la sudoriento por min gratuli." Kaj li ordonis al siaj geservistoj ke ili staru en vicoj respekte saluti al Li Jing kaj lia edzino, dirante: "Ekde nun ili estas viaj mastro kaj mastrino."

Dirinte, la kuspbarbulo kaj lia edzino, sekvate nue de unu lakeo, ekrajdante sur ĉevaloj, galopis for kaj tuj malaperis post kelkaj paŝoj. Ricevinte la domon de la kuspbarbulo, Li Jing fariĝis riĉa kaj uzante la monrimedon li helpis al Li Shimin konkeri la tutan imperion. En la deka jaro de Zhenguan-erao (627-649), kiam Li Jing funkciis kiel la Maldekstra ministro kaj aganta Ĉefministro, venis el la sudaj tribanoj raporto ke mil marŝipoj kaj cent mil armitaj trupanoj atakis en la reĝlandon Fuyu, mortigis la reĝon kaj okupis la landon, sed nun la paco jam revenis tien kaj ĉio en ordo." Li Jing komprenis, ke la afero de la kuspbarbulo jam sukcesis. Reveninte de la Kortego li rakontis tion al sia edzino Hongfu. Ili vestis sin per ceremonia vesto kaj tostis verŝante vinon al la sudoriento por gratuli al la malnova amiko.

De tio ni povas scii, ke la imperia regpotenco ne estas laŭdezire akirebla de kiu ajn granda homo, do des pli ne de tiu, kiu mem ne estis granda. Ĉiu ajn kortegano, kiu aŭdace pensis uzurpi la tronon per ribelo, ja similas nur al la manto kiu volas rezisti radon de la antaŭen marŝanta ĉaro per siaj maldikaj brakoj. Ke nia imperio longdaŭros prospera dum miriado da generacioj, tio ja estas laŭ la volo de la Ĉielo! Cirkulis ankaŭ tia onidiro, ke multe da militaj strategioj de Li Jing estis insistruataj de la kuspbarbulo al li.

**Fang Qianli (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# RAKONTO PRI HETAJRO YANG

Hetajro Yang distingiĝis per sia sorĉa belo inter ĉiuj fratulinoj en bordela kvartalo de la ĉefurbo Chang'an. Ŝi havis gracian konduton kaj lertan sin-ornamon. Tial nobeloj, altranguloj kaj riĉuloj konkure invitis ŝin al festenoj akompani kundrinkadon. Je ŝia ĉeesto, eĉ tiuj, kiuj neniam drinkis, ankaŭ volonte eldrinkis plenan tason je ŝia honoro en raviĝo. Multaj dandoj en Chang'an kiuj vizitis ŝin nur unufoje, neniam pentos eĉ je kosto de sia vivo aŭ bankroto. La famo de hetajro Yang superis tiun de ĉiuj aliaj samfakulinoj, kaj, viziti ŝin fariĝis furora modo siatempe. S-ro Jia, armeestro de Lingnan, devenis kiel dando el nobla familio. Li havis edzinon el familio de imperiestra parenco. Por diri fakton, ŝi estis vere enviema megerino kaj antaŭ longe faris geedzan interkonsenton: tiu, kiu perfidis la geedzan fidelecon, estu punmortigita per akra glavo. La armeestro Jia fariĝis altrangulo en juna aĝo. Li estis diboĉema, sed, pro skrupulo pri sia megera edzino, li ne povis agi senbride en hejmo. Do, per granda sumo li sekrete elaĉetis hetajron Yang libera de putineco kaj poste kunportis ŝin reveni al Nanhai-prefektujo. Li havigis al ŝi apartan domon kiel loĝejon. Sian libertempon post ofica laboro li ĉiam pasigis ĉe Yang kaj nur post vesperiĝo revenis al sia hejmo tranokti.

Yang estis tre inteligenta kaj sprita virino. Ŝi servis al la armeestro Jia tre humile kaj asidue. Ŝi ĉiam tenis sin je bonvirtoj de virino, neniam agis maldece, kaj ankaŭ malavare donis aŭ premiojn al proksimuloj de la armeestro, tiel akirinte ĉies inklinon de ili kaj, pro tio la armeestro ankoraŭ pli forte amis ŝin.

Post du jaroj, la armeestro suferis malsanon, eĉ gravan. Li tre volas foje revidi hetajron Yang, sed timas punon de sia megera edzino. Ĉar li intime amikiĝis kun la arma inspektoro, li konfidis sian volon al li kaj petis ties helpon. La inspektoro do diris trompe al la edzino de la armeestro,

persvadante:

"Via edzo la armeestro nun grave malsaniĝis. Laŭ mia opinio, se ni havigos al li lertan servistinon kiu zorgeme flegos lin, tio estas utila por lia rapida resaniĝo. Mi havas lertan ĉambristinon, kiu servis en nobela domo multajn jarojn kaj donis grandan kontentigon al la gemastroj. Ĉu vi permesas ke ŝi venu flegi al via estiminda edzo?"

"Rekomendon de via inspektora moŝto certe estas fidinda. Se ŝi flegos tiel bone kiel vi diras, tio forigos multe da penigo al mi. Rapide venigu ŝin al mi!"

La inspektoro do aranĝis ke la hetajro Yang iru al armeestro Jia sub masko de ĉambristino. Tamen, antaŭ ol la plano realiĝis, malsekretiĝis la vero. La megera edzino de Jia kunvokis dekojn da fortikaj servistinoj, vicigis ilin kun blanka ligna bastono en sia mano kaj pretigis en korto grandan kaldronon kun bolanta oleo, atendente la alvenon de hetajro Yang, kiun ŝi ordonis enĵeti en la bolantan oleon.



Informiĝinte pri tio, la armeestro ege teruriĝis kaj tuj sendis lakeon malhelpi la alvenon de Yang, dirante: "Por kontentigi mian etan deziron ŝi preskaŭ falos en fatalan danĝeron. Feliĉe, nun mi vivas kaj ankoraŭ povas savi ŝin el la faŭko de la feroĉa tigrino. Alie, ĉio estus jam tro malfrua!"

La armeestro pretigis abundan donacon de kuriozaĵoj por Yang kaj sendis junan lakeon ke li eskortu Yang reveni per boato al ŝia hejmloko en la nordo. Ekde tiam, la armeestro dronis en pli forta ĉagreno kaj indigno. Tiel, post malpli ol tagdeko li mortis.

Tiam Yang Yang ĵus atingis urbon Hongzhou. Informiĝinte pri la morto de la armeestro, Yang redonis ĉiom da liaj donacoj, starigis kondolencan tabuleton por la forpasinto. Ŝi funebris plorante kaj diris:

"Ho ve! Vi mortas pro mi! Se vi jam mortis, por kio do mi ankoraŭ vivdaŭros? Ĉu mi estas sendanka vaniganto de viaj grandaj favoroj?" Kaj, foriginte ĉian funebraĵon, ŝi sin mortigis.

Ordinare, la putino estas nur vendistino de amoraĵoj. Ili rilatis al viroj nur por profitĉasoj. Sed tiu hetajro Yang, decideme oferis sian vivon por repagi al sia favoranto, jen justa konscienco! Ŝi redonis ĉiom da donaco-riĉaĵoj, jen pura senprofitemo! Kvankam kun deveno de hetajro, kiel distingiĝa ŝi estas super aliaj!

**Li Fuyan (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# ANTAŬDIRITA GEEDZIĜO

Wei Gu de Duling fariĝis orfo ekde sia frua infanaĝo. Kiam li elkreskis, li tre volis edziĝi kiel eble plej frue, sed dum longa tempo liaj klopodoj por svatiĝo rezultiĝis per nulo. En la 2a jaro de Yuanhe-erao (807 p. K.) dum sia vojaĝo al Qinghe li restis en hotelo sude de Song-urbo. Tiam iu vojaĝanta gasto en la hotelo svatis al li, proponante filinon de Pan Fang, la eksa asistanto de prefekto de Qinghe. Ili interkonsentis pritrakti la detalon je la sekvanta mateno, antaŭ Long'xin-templo okcidente de la hotelo.

Ĉar Wei Gu havis fortan aspiron je geedziĝo, la sekvantan matenon li ekiris al la rendevuo tre frue, kiam la luno ankoraŭ brilis oblikve sur la ĉielo. Atinginte la templon, li trovis, ke sur la ŝtuparo sidas maljunulo kun sako apud si kaj legas sub la lunlumo. Wei Gu paŝis al li kaj rigardis al la legaĵo, sed li scipovis legi nenion el ĝi, kio estis nek ranidformaj ideogramoj nek sanskrito.

“Kio estas tiu ĉi libro?” demandis Wei Gu, “Mi diligente lernis ekde mia juna aĝo kaj bone scipovas ĉian skribaĵon de la mondo inkluzive tiun de sanskrito aplikata en la okcidentaj landoj, sed mi neniam vidis libron kiel la vian, kial?”

“Jes, kompreneble. Kiel vi povis ĝin vidi? ĉar ĝi ja ne estas libro en la homa mondo.” respondis la maljunulo kun rideto.

“Kio do ĝi estas, se ne de la homa mondo?”

“Jen la libro de Hadeso.” respondis la maljunulo.

“Sed kiel povas okazi, ke vi, la vivanto en Hadeso, aperas ĉi tie?”

“Ne mankas al mi la motivo por aperi ĉi tie, fakte ja vi mem venas tro frue, sekve renkontas min. Ĉiu oficisto de Hadeso administras iun aferon de homoj. Kiel do ili ne iras en mallumo? Nun sur la vojo duono el la vojirantoj estas homoj kaj la cetera duono – fantomoj. Tion multaj nur ne rimarkis.”

“Kion vi administras?”

“Geedziĝon de la homoj.”

Wei Gu tre ĝojis kaj demandis:

“Mi orfiĝis ekde frua infanaĝo kaj nun ĉiam deziras edziĝi kiel eble plej frue por plimultigi idojn al mia familio. Sed dum dek jaroj vanis mia penado en serĉo de fianĉino. Ĉi matene iu proponis al mi veni ĉi tien por interkonsiliĝi pri svatiĝo de la filino de eksprefekto s-ro Pan. Ĉu mi sukcesos?”

“Ne! Sen difino de la Destino ne sukcesos eĉ svatiĝo de nobelo al filino de buĉisto. Kiel vi povus sukcesi por peti la manon de prefe kta filino? Via estonta edzino nun aĝas nur tri jarojn kaj ŝi edziniĝos al vi je sia deksepa jaro.”

Tiam Wei Gu demandis kio estas en la sako. La maljunulo respondis:

“Ruĝaj fadenoj, per kiuj mi interligas la piedojn de la destinitaj paroj. Kiam ili naskiĝis, mi jam subligis kaj ili fariĝos geedzoj pli aŭ malpli frue malgraŭ tio ĉu la du familioj estas mala mikaj unu kontraŭ la alia, aŭ ege diferencaj de rangoj aŭ tre malproksime troviĝantaj. Via piedo nun estas jam interligita kun tiu de la bebino, kiun mi menciis, tial vanos via ĉia klopodo je aliaj kandidatinoj.”

“Kie estas mia estonta edzino kaj kio estas okupo de ŝia familio?”

“Ŝi estas filino de maljuna legomvendistino Chen, kiu loĝas norde de la hotelo.”

“Ĉu mi povus vidi ŝin?”

“Vendante legomon la maljunulino Chen ofte kunportas la knabinon en la bazaro. Sekvu min kaj mi montros ŝin al vi.”

Kiam tagiĝis, ne venis la homo, kiun Wei Gu atendis. La maljunulo volvis sian libron, portinte la sakon li ekiris. Wei Gu sekvis lin ĝis la bazaro, kie li efektive vidis maljunan legomvendistinon blindan je unu okulo kaj ĉe ŝi trijaran knabinon, kiu aspektas verŝajne ankoraŭ pli malbela.

“Jen via estonta edzino!” diris la maljunulo.

“Mi mortigos ŝin!” kolere ekkriis Wei Gu.

“Ba, vanos via ĉia provo! Ĉar ŝi estas destinita fariĝi honorinda sinjorino dank' al sia meritoplena filo.” dirinte tiujn vortojn la maljunulo malaperis.

“Fi al tiu ĉi maljunulaĉo!” blasfemis Wei Gu, “eĉ se mi ne povas havigi al mi edzinon taŭgan al mia glora familio, mi edz inigos belulinon el junaj kantistinoj. Ĉu mi, la ido de nobla familio, de vas geedziĝi kun tiu malbela knabinaĉo de blindulino?”

Li preparis akran ponardon, donis ĝin al la serviston kaj diris:

“Vi estas ĉiam fidela al mi, do mortigu por mi la knabinon kaj mi premios vin per dek mil moneroj.”

“Jes.” respondis tiu. La sekvantan tagon, kaŝante la ponardon en sia maniko, la servisto iris al la bazaro. Li ĵetis sin kun la ponardo al la knabino en homamaso kaj forfuĝis en hxaoso de

foiro.

“Ĉu mortigita?” demandis Wei Gu al la sendito, kiam ili ambaŭ forrapidis de la akcidenta loko.

“Koron mi celis,” respondis la servisto, “sed bedaŭrinde trafis nur glabelon.”

Poste Wei Gu multfoje svatiĝis sed senescepte fiaskis. Forpasis plu dek kvar jaroj, dank' al la merito de sia patro Wei Gu estis komisiita kiel asistanto de la prefekto Wang Tai en Xiangzhou. Li plenumis sian oficon en tribunalo tiel bone, ke la prefekto edzinigis sian belegan filinon 16-aŭ 17-jaran al li.

Wei Gu estis ege kontenta pro tio. Sed la edzino ĉiam portis inter la brovoj oran ornamajon, kiun ŝi neniam demetis eĉ dum sia baniĝo. Tio donis al Wei Gu strangan senton. Post unu jaro li subite memoris la vortojn de sia servisto kaj demandis ŝin pri la kialo, tiam ŝi lamente respondis:

“Ne filino, sed nevino de la prefekto mi estas. Kiam mia patro mortis sur sia posteno de estro de Song-urbo, mi estis ankoraŭ bebino. Mortis ankaŭ miaj patrino kaj frato unu post alia. Restis de mia patro nur parcelo da bieno sude de Song-urbo, kie mi loĝis kune kun mia vartistino Chen, kiu vivtenis nin per legomvendado. Ŝi ĉiam kunportis min ĉe si por min prizorgi kaj foje en bazaro, kiam mi estis nur trijara, min trafis kanajlo per ponardo – de tiam restis ĉe mi en la glabelo cikatro, tial mi ĉiam ĝin kovris per ornamaĵo. Antaŭ sep aŭ ok jaroj, mia onklo adoptis min al li kaj poste li edzinigis min kiel sian filinon al vi.”

“Ĉu via maljuna vartistino Chen estis kun unu blinda okulo?” demandis Wei Gu.

“Jes, sed kiel vi povas scii?”

“Ĉar la atencinto ja estis mi!” respondis Wei Gu kaj li rakontis al ŝi ĉion...

“Ho, kiel strangas la sorto!” miris la edzino. Kaj de tiam la geedzoj vivis des pli harmonie kaj ege respektis unu la alian.

Poste al ili naskiĝis filo, kiu estis nomata Kun kaj fariĝis prefekto de Yanmen. Pro lia merito la patrino estis honorigita per la titolo “Honorinda Sinjorino de Taiyuan”.

Kiam la estro de Song-urbo aŭdis tiun historion, li subskribis la hotelon kie Wei Gu restis “Hotelo de Antaŭdirita Geedziĝo”.

**Li Fuyan (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# DISIPULO KAJ ALKEMIISTO

Du Zichun, kiu vivis ĉe la fino de la Norda Zhou-dinastio (557-581) kaj la komenco de Sui-dinastio (581-618), estis juna disipulo kiu neglektis bonstaton de sia familio. Senbridema, ĝuema je drinkado kaj nenifarado, li baldaŭ prodigis ĉiom da sia riĉaĵo. Parencoj, al kiuj li petis helpon, ĉiuj rifuzis lin pro lia mallaboremo.

Estis vintro. Ĉifone vestita kaj malsata, Du Zichun piediris en la ĉefurbo Chang'an, eĉ nenion manĝis ĝis vespero. Hezite li vagis ĉe la okcidenta pordo de la Orienta Foiro, ne sciante kien sin direkti. Kun evidenta aspekto de mizerulo malsata kaj frostigita, li staris tie kaj longe suspiris al la ĉielo.

Maljuna avo venis kun bastono kaj demandis al li: "Kial vi suspiris?"

Du Zichun rakontis pri sia stato kaj plendis pri la senkompatemo de siaj parencoj, kun fortaj indigno kaj emocio.

"Kiom da mono vi bezonas?" demandis la maljuna avo.

"Tri- aŭ kvin-dek miloj da moneroj jam sufiĉas por mi." respondis Du Zichun.

"Tio estas ne sufiĉa sumo." diris la maljuna avo.

"Repripensu!"

"Do cent miloj!"

"Tio ankoraŭ ne sufiĉas."

"Miliono!"

"Tio ankoraŭ ne sufiĉas."

"Tri milionoj!"

"Jes, tio iom taŭgas." diris la maljuna avo, kaj li elprenis de sia maniko unu monermilon, transdonis al Du Zichun kun averto:

"Jen estas por ĉi vespero! Morgaŭ tagmeze mi atendos vin ĉe la Persa Hotelo en la Okcidenta Foiro. Nepre ne malfruiĝu!"

La sekvan tagon, Du Zichun iris laŭ la rendevuo kaj la maljuna avo efektive donis al li tri milionojn da moneroj, sed foriris sen konigo pri sia nomo.

Nun, denove fariĝinte riĉa, Du Zichun revenis al arda disipemo, opiniante ke la vagabonda vivo por li ĉiam pasis for. Li havigis al si bonegajn ĉevalojn, luksajn vestojn, kun diboĉaj kompanoj ĝuis vinon, muzikon kantadon kaj dancadon en bordela kvartalo, tute sen konsidero kiel investi siajn monojn. Tiel, post unu aŭ du jaroj elĉerpiĝis la riĉaĵo, kiun donacis al li la maljuna avo. Liaj vestoj kaj kaleŝoj ŝanĝiĝis de karaj al malkaraj. Li

forvendis siajn ĉevalojn por aĉeti azenojn, poste, li forvendis la azenojn kaj mem piediris. Ĉio rapide revenis al la malnova stato. Trovante nenian rimedon por vivo, Du Zichun denove lamentis ĉe la pordo de la foiro. Je lia suspiro la maljuna avo tuj reaperis. Kaptante manon de Du Zichun la maljuna avo diris:

"Ho, vere mirinde! ke vi denove malriĉiĝis! Diru al mi, kiom da mono vi ankoraŭ bezonas? Mi certe helpu al vi."

Du Zichun hontis respondi al tia propono. Sed la maljuna avo insiste demandis. Du Zichun nur honteme dankis. Fine la maljuna avo diris:

"Morgaŭ tagmeze venu al la malnova loko kiel ni rendezuis lastfoje!"

Spite al honto, Du Zichun iris tien kaj ĉifoje li ricevis dek milionojn el la maljuna avo.

Antaŭ ol ricevi la riĉaĵon, Du Zichun decideme pensis pri komerca plano por fari sin mamuta riĉulo, antaŭ kiu ĉiaj famaj milionuloj en antikva tempo ŝajnas nur liliputaj. Sed, post akiro de la riĉaĵo, la malnova disipemo denove ardiĝis kiel antaŭe. Tiel, post malpli ol unu aŭ du jaroj, Du Zichun fariĝis eĉ ankoraŭ pli malriĉa ol en la malnova tempo. Kaj li revidis la maljunan avon en la malnova loko.

Regite de granda honto, Du Zichun per maniko kovris al si la vizaĝon kaj forkuris. Sed la maljuna avo ekkaptis je lia basko, haltigante lin, dirante: "Ho, malsaĝa solvo!"

Kaj li donacis al Du Zichun alian sumon de 30 milionoj, kun diro:

"Se tio ankoraŭ ne sufiĉos por kuraci vin, vi estos nesavebla malriĉulo!"

Du Zichun pensis: "Pro senbrida diboĉa vivo mi foj-refoje dronis en malriĉeco, tiel ke neniu el miaj bonhavaj parencoj aŭ amikoj volis monhelpi min. Nur tiu ĉi maljuna avo trifoje donacis al mi grandsuman monon – kiel mi povus repagi al li?"

Kaj li diris al la maljuna avo:

"Per tiu ĉi sumo mi povas fari aferojn en socio. Mi provizos vestojn, manĝaĵojn al vidvaj malriĉuloj, plenumos mian devon. Mi profunde dankas vian helpon, kaj, post plenumo de miaj aferoj, mi volonte faru ĉion ajn laŭ via ordono."



"Bone. Tio ankaŭ estas mia espero." respondis la maljuna avo. "post kiam vi finis viajn aferojn, vizitu al la Taoista Templo en la dek kvina tago de la sepa monato lunkalendare por revidi min sub la du junieroj!"

Ĉar plejparto de liaj malriĉaj vidvaj parencoj loĝas sude de Huai-rivero, Du Zichun portis la riĉaĵo al Yangzhou. Tie li aĉetis cent ĉing-ojn (1 ĉing-o=6.6667 hektaroj) da bonaj agroj, konstruigis domojn en ĉirkaŭurbo, kaj pli ol cent vilaojn ĉe la ĉefvojoj. Du Zichun kolektis siajn malriĉajn vidvajjn parencojn, ke ili loĝu en la nove konstruitaj domoj. Li aranĝis geedzigojn por siaj genevoj, donis helpon al membroj de sia klano. Li repagis per bono al tiuj kiuj helpis lin, kaj per malbono al tiuj kiujmalamike rilatis al li. Fininte ĉion ĉi tion, Du Zichun iris al la Taoista Templo laŭ difinita tempo.

Du Zichun trovis ke la maljuna avo fajfis en ombro sub la du juniperoj. Ili do kune ascendis la pinton Yuntai (Nuba Teraso) de Huashan-monto. Ili iris pli ol 40 liojn kaj venis al tre pura kaj impona domo, evidente ne por ordinaraĵoj. Koloraj nuboj ŝvebe kovras kaj rapidmovaj grupoj flugas tie. En la centra halo estis kaldrono, alta je 9 futoj.puraflamo ĵetis brilojn sur la fenestroj. Ĉirkaŭ la kaldrono staris 9 knabinoj Jadaĵ Virgulinoj. Kaj Blua Drako kaj Blanka Tigro gardis respektive antaŭe kaj malantaŭe.

Tiam la suno subiris. La maljuna avo ne plu portis sur si laikan veston. Jen li estas taoisto kun flava ĉapo kaj ornato. La maljuna taoisto donis al Du Zichun tri blankajn ŝtonajn pilolojn ke li tuj englutu kun vino. Poste, li ordonis ke Du Zichun sidiĝu sur tigra felo ĉe la okcidenta muro, vizaĝe al la oriento.

"Tenu vin nepre silenta!" la maljuna taoisto avertis serioze, "eĉ se vi vidos dignajn diojn, ferocajn diablojn, jakŝojn, rabobestojn aŭ hororojn en Infero, kie viaj parencoj mizere agoniis – ĉio estis nur iluzio! Vi devas teni vin ĉiam senmova, silenta, trankvila, sentima kaj ĉio forpasos sendolore. Memoru miajn vortojn!"

Dirinte tion, la maljuna taoisto foriris. Kiam Du Zichun rigardis al la halo, li vidis nenion alian krom granda urno plena de akvo. Ĵus post foriro de la maljuna taoisto ekaperis miloj da flagoj, armiloj, kirasitaj ĉevaloj, soldatoj, kiuj svarme plenis en ĉiuj montoj kaj valoj. Iliaj insultaj krioj skuis eĉ la ĉielon kaj teron. Ilia komandanto estis memtitolita Granda Generalo, kun staturo de pli ol dek futoj, kaj li mem kaj lia ĉevalo ambaŭ estis en ora kiraso kies brilo pikis okulojn. Sekvate de centoj da gardistoj tenantaj glavon kaj pafarkon, ili entrudiĝis en la halon kaj la komandanto laŭte kriis insulte: "Kiu estas vi? Kial vi aŭdacas ne eviti min la Grandan Generalon?!"

Ankaŭ liaj sekvantoj ĉiuj sieĝis kun glavoj kontraŭ Du Zichun, demandante pri lia nomo, profesio, sed Du Zichun respondis per nenio. En furioza kolero la demandantoj urĝe kriis: "Mortigu lin!" Ili konkure arkpafis. La sono skuis kvazaŭ tondroj. Sed Du Zichun ignoris ilin mute. La generalo foriris kun bolanta kolero.

Post momento, alsvarmis ferocaj tigroj, venenaj drakoj, sovaĝaj ĉevaloj, leonoj, vipuroj kaj skorpioj, en nombro de miloj kaj dekmiloj. Hurlante, ili sin ĵetis antaŭen, konkure por lin kapti, mordi kaj vori, aŭ transsaltis super lia verto. Sed Du Zichun tenis sin aplomba, indiferanta. Tiel, post momento, la gregoj disiĝis for. Sed jen pluvegis, de obskura ĉielvolbo fulmtondris. Fajrobuloj falis jen dekstren, jen maldekstren, fulmoj flagris jen antaŭe, jen malantaŭe, tiel ke li eĉ ne povis malfermi siajn okulojn.

Post nelonge, en la korto estis akvo profunda je pli ol dek futoj. Bolantaj fulmoj kaj tondroj ĵetiĝis tiel draste kvazaŭ montoj krevis aŭ tero tremis nehaltigeble. Dum palpebrumo la akvo jam inundis ĝis piedoj de Du Zichun, kiu tamen tenis sin firme sidanta, senmove, eĉ donante nenian rigardon tien.

Post nelonge, revenis tiu Granda Generalo, ĉifoje komandante bovkapajn provosojn kaj feroce- aspektajn fantomsoldatojn. Ili starigis antaŭ Du Zichun grandan kaldronon kun bolanta akvo. Longaj lancoj aŭ forkoj sieĝis ĉirkaŭ Du Zichun. Ili kriegis:

"Diru vian nomon, ni forlasu vin! Alie, ni piku al via sino per forkoj kaj ĵetu vin en la kaldronon!"

Sed Du Zichun ne respondis.

Post nelonge, ili kaptis la edzinon de Du Zichun, kaj ĵetis ŝin al la ŝtuparo. Montrante al ŝi, ili diris al Du Zichun:

"Diru al ni ŝian nomon, ni liberigos ŝin."

Sed Du Zichun ankoraŭ silentis. Ili do skurĝis ŝin ĝissange. Poste ili torturis ŝin per sagpafoj, hakado, boligo aŭ bruligo. ne povante toleri la doloron, la edzino plorĝemis, dirante:

"Mi estas vere stulta kaj malbela virino, ne indas esti via edzino, tamen mi ja fidele servis al vi pli ol dek jarojn. Nun la fantom-soldatoj turmentas min kaj mi jam ne povas elteni la doloron. Mi ne kuraĝas esperi, ke vi surpenue faru petojn por mi, tamen, se vi nur konsentas diri unu vorton, mi jam povos rezervi mian vivon. Ĉu vi estas tiel senkora ke vi eĉ avaras pri unu vorto?"

Larmoj pluve ruliĝis sur ŝiaj vamgoj. Ŝi ploris malbenante kaj insultante.

Se Du Zichun ankoraŭ ignoris silente. La generalo kolere diris: "Ho, ĉu vi opinias ke mi ne povas kruele torturi vian edzinon?"

Laŭ lia ordono oni alportis akran fajlilon kaj komencis fajli ŝin colon post colo ekde ŝia piedo. La edzino kriis kaj ploris ankoraŭ pli korŝire. Sed Du Zichun tenis sin indifere mute.

"Ho, tiu ĉi fiulo jam posedas monstran magion." diris la generalon. "Ni ne devas lasi lin

ankoraŭ vivi en la mondo!"

Laŭ lia ordono la fantom-soldatoj ekzekutis Du Zichun.

Post ekzekuto, la spirito de Du Zichun estis areste kondukita al la Hadesa Reĝo.

"Ho, ĉu li estas la fiulo el la montpinto Nuba Teraso?" insultis la Hadesa Reĝo. "Punu lin en malliberejo!"

Kaj oni komencis turturi lin per englutigo de solvita kupra likvaĵo, batoj per feraj stangoj, pistado en ŝtona pistilo, muelado inter mueliloj, faligo en fajroj, boligo en kaldrono, trapaso tra glavmonto kaj spadarbaro. Sed, memorante la averton de la maljuna taoisto, Du Zichun sentis ke ĉiuj toturoj verŝajne estas tolerebla kaj li ellasis eĉ nenian ĝemon.

Kiam la provoso raportis ke jam finiĝis la provado per ĉiaj torturoj al Du Zichun, la Hadesa Reĝo diris:

"Tiu ĉi fiulo estas insidema! ne taŭgas esti viro. Lasu lin renaskiĝi kiel filino de Wang Qin, la guberniestro de Shanfu en prefektujo Songzhou!"

Tiel Du Zichun renaskiĝis kiel virino. Infanaĝe ŝi estis delikata kaj malsanema, neniam sen flego de kuraciloj. Ŝi ankaŭ spertis dolorojn fali sur fajron aŭ desur lito, sed ĉiam silentis. Poste, ŝi kreskis iom post iom adolta, en ĉarman belulinon, sed parolintan nenium vorton. Pro tio ŝia familio prenis ŝin denaska mutulino. Kiam iuj el ŝiaj parencoj insulte ofendis ŝin ĉiamaniere, ŝi neniam povis oponi. Samlokano klerulo nomata Lu Gui ekamis ŝin informiĝinte pri ŝia beleco kaj sendis svatistinon peti ŝian manon. Ŝiaj familianoj rifuzis la svatpeton motivigante ke ŝi estas muta. Sed Lu Gui diris:

"Ne necesas parolkapablo por fariĝi bona edzino, kaj ŝi ankaŭ povas esti bona ekzemplo por virinoj kiuj klaĉus tro multe!"

Ŝia familiano do konsentis kaj Lu Gui preparis plenan kompletan de geedziga donaco kaj persone bonvenigis ŝin al nupto en solena ceremonio. La geedzoj vivis en harmonio kaj amo. Post kelkaj jaroj la edzino naskis filon.

Kiam la infano estis 2-jara, ĝi montriĝis senkompare saĝa.

Lu Gui ne kredis ke lia edzino vere estas muta. Iutage, brakumante la infanon en sia sino, li parolis al la edzino. Sed ŝi ne respondis. Lu Gui klopodis diversmaniere paroligi ŝin, sed ŝi ĉiam ankoraŭ silentis. Lu Gui sentis grandan koleron, dirante:

"En antikva tempo, la edzino de ministro Jia neniam ridis, ĉar ŝi rigardis sian edzon senkapabla. Tamen, post kiam ŝi vidis ke li trafis en ĉasado fazanon, ŝi ŝanĝis mienon kaj tiel forigis la bedaŭron al la edzo. Nun, mi ne estas tiel senkapabla ol Jia, kaj mia talento en

beletro ja multe superis ĉason de fazano, tamen vi ĉiam diris nenion. Je kio do utilas la filo por patro kiu estas malrespektata de sia edzino?"

Kaj li ekkaptis la du piedojn de la infano, ĵetis ĝin abrupte al roko, tiel ke ĝia kapo tuj rompiĝis kaj sango ŝprucis je distanco de kelkaj paŝoj. Amo al sia propra filo ekatakis koron de Du Zichun, ke li forgesis la averton de la maljuna taoisto kaj pretervole ellasis: "Ho ve!"

Sed, apenaŭ finiĝis la veo, li trovis sin jam sidanta en la malnova loko. Kaj ankaŭ la maljuna taoisto troviĝis antaŭ li. Tempis apenaŭ aŭrore. Purpura fajro ekleviĝis rompinte tra la tegmento. Incendio forbrulis ĉion ĉirkaŭe. La maljuna taoisto bedaŭris veante:

"Tro granda eraro! Vi tute vanigis mian esperon!"

Kaj li kaptis Du Zichun je harojn enakvigante lin en la grandan urnon.

Post momento, estingiĝis la incendio. La maljuna taoisto alproksimiĝis, dirante: "Vi jam sukcesis forgesi la sentojn de ĝojo, kolero, malĝojo, timo kaj malŝato. Sed vi ankoraŭ ne povas liberiĝi de amo. Se vi ne ellasus la veon, mia eliksiro jam estas pretigita kaj vi mem ankaŭ fariĝis senmortulo. Ho, vere estas malfacile trovebla la talentulo por iĝi senmorta! Mi povos denove fari mian eliksiron ankoraŭfoje, sed via korpo devas resti ĉiam sur la tero. Adiaŭ!"

Kaj li montris al Du Zichun la vojon por reveni. Du Zichun pene ascendis la doman bazon ĉirkaŭrigardi kaj vidis ke la kaldrono jam ruiniĝis, ene de ĝi estis fera kolono tiel dika kiel brako, longa je futoj. Demetinte sian veston, la maljuna taoisto komencis tranĉi la feran kolonon per tranĉilo.

Reveninte hejmen, Du Zichun tre hontis pro sia perfido al la promeso. Li forte riproĉis sin. Por esprimi sian bedaŭron li refoje vizitis al la montopinto Nuba Teraso, sed li vidis nenian spuron de homo tie. Kun granda bedaŭro kaj pento li fine revenis hejmen.

**Pei Xing (818-907)**

# KUNLUN-A SKLAVO

Dum Dali-erao (766-779), Tang-dinastio, estis junulo nomata Cui, kies patro funkciis kiel altranga Kortegano kaj estis intima amiko de grandmerita ministro. Cui servis kiel oficiro en palaca gvardio. Foje la patro sendis Cui pridemandi bonfarton de la ministro. Cui estis bela, rigidmora junulo kun kvieta konduto kaj eleganta parolo.

La ministro ordonis servistinojn suprenruli kurtenojn kaj konduki la gaston en la ĉambrojn. Cui riverencis kaj transdonis la saluton de sia patro al la ministro. Kun admiro la ministro afable akceptis la junan gaston kaj invitis lin sidiĝi por interbabili. Tiam eniris tri servistinoj, senescepte belegaj. Ili alportis orajn bovlojn kun ĉerizoj. Tiu, kiu iris antaŭe, prenis ĉerizojn el ora bovlo, senŝeligis ilin, surverŝis per kremo kaj dediĉe prezentis.

La ministro ordonis al servistino en ruĝa silka vesto, ke ŝi prezentu unu bovlon da pretigitaj ĉerizoj al la gasto por manĝi.

Sed Cui, juna kaj pudora, sentis sinĝenon pro ĉeesto de la belaj knabinoj, ke li fine ne povis manĝi.

La ministro ordonis al la ruĝevestita knabino ke ŝi manĝigu lin per kulero. Ne povante rifuzi, Cui volenevole manĝis buŝeton kun hontemo, kio vekis mokrideton de la knabino.

Kiam Cui faris adiaŭon, la ministro diris al li: "Revizitu min kiam vi havos liberan tempon! Nepre ne malintimiĝu al mi maljunulo!"

Kaj, laŭ ordono de la ministro, la ruĝe vestita knabino forkondukis la gaston el la korto. Kiam Cui rigardis returnen, la knabino levis siajn tri fingrojn supren, turnis sian manplaton trifoje supren-malsupren kaj, montrante al la malgranda spegulo antaŭ sia brusto, avertis: "Memoru!"

Tamen, nenion alian ŝi diris.

Reveninte hejmen, Cui raportis al sia patro pri la vizito al la ministro, transdonis lian parolon kaj revenis al sia legoĉambro. Sed li fariĝis mens-konfuzita, silentema kaj malĝoja. Li dronis en distriĝema meditado, eĉ forgesante manĝi. Li murmuris ripetante versojn:

Hazarde mi vagis al fea montpinto.

Al mi okulumis la sorĉa feino.

Tra l' ruĝa pordo de palaco profunda

la luno ŝin brilis en tristo sen fino.

Neniu el liaj servistoj povis diveni pro kio la juna mastro ĉagreniĝi.

En la domo estas kunlun-a sklavo nomata Mole, kiu observis kelkan tempon kaj demandis al Cui:

"Kio kaŝiĝis en via koro kaj tiel forte turmentas vin? Ĉu vi povus malkaŝi tion al mi via maljuna sklavo?"

"Kion vi servistoj povas kompreni?" diris Cui. "Ke vi eĉ kuraĝas demandi pri mia privata afero?"

"Vi tamen eldiru!" persistis Mole. "Kaj mi nepre kontentigos vian deziron, ĉu pli aŭ malpli grandan."

Surprizite de tia parolo, Cui konfidis ĉion al la sklavo.

"Ho, nur bagatelo!" diris Mole. "Kial vi ne diru al mi pli frue? Ĉu decas vin turmenti tiel longe?"

Kiam Cui demandis pri la solvo de la enigmaj gestoj de la knabino, Mole respondis:

"Tro facile komprenebla!" kaj li interpretis. "Kiam ŝi levis tri fingrojn, tio aludis ke en la ministra domo estas dek ĉambroj por kantistinoj kaj ŝi loĝas en la tria. Kiam ŝi turnis sian manplaton trifoje, tio signifas montri al vi 15 fingrojn, kies nombro sugestas ja pri 15 tagoj en la monato. La malgranda spegulo antaŭ brusto similas al la plena luno en la 15-a tago, kiam ŝi atendas vian alvenon!"

Ekzakte Cui demandis al Mole: "Sed ĉu vi havas ian rimedon por kontentigi mian sopiron?"

Mole ridis, dirante:

"Postmorgaŭ jam estos la 15-a nokto de ĉi monato. Donu al mi du rulojn da nigreblua silkaĵo, per kiu mi pretigos por vi striktan veston por nokta iro. En la ministra domo estas dogo kiu gardas la loĝejon de kantistinoj. Por ordinaraĵoj estas malpermesite tien eniri. Kaj ĉiu eniranto malpermesita certe estas mordmortigita de la dogo fulme rapidmova kaj tigre feroĉa, ĝuste el la fama speco de Caozhou, kaj mi estas la unika homo kiu kapablas mortigi la dogon. Hodiaŭ vespere mi mortigu ĝin por vi!"

Cui premidonis al li viandon kaj vinon. Je la tria gardperiodo Mole foriris de la domo kun ĉemartelo. Post momento sufiĉa por unu manĝo Mole revenis, dirante: "La dogo jam mortigita. nun nenio povas malhelpi nin!"

En la difinita nokto, je la tria nokta gardperiodo, Mole helpis al Cui sin vesti per la nigre blua strikta vesto, kaj, portante Cui sur sia dorso, Mole rapidis trans dekkelkaj muroj al la

loĝejoj de la kantistinoj kaj ili haltis antaŭ la tria pordo.

La pordo ne estis ŝlosita. Verŝiĝis el la ĉambro malhela lumo de kupra lampo. Aŭdiĝis suspiro de la knabino, kiu verŝajne atendas ion. Ŝi demetis siajn orelingojn, forlavis ĉian ŝminkon, montrante puran vizaĝon jade belan kun larmoj. Jen ŝi recitis versojn:

En profunda valo oriollo trilas

plende pri junul' kiu sub floroj iras.

Bluaj nuboj ŝvebis, seniĝis informo.

Flutlude, pri l' kara vane mi sopiras.

Ĉiuj gardantoj estis en dormo. Ĉirkaŭe regis kvieto. Cui levis la kurtenon kaj eniris. La knabino observis longan momenton kaj ekkonis lin. Ĝoje saltante desur la lito ŝi ekkaptis la manon de Cui kaj diris:

"Mi scias ke homo, tiel saĝa kiel vi, certe subkomprenas kion mi diris mimike. Sed mi ne atendis per kia magia forto vi povas veni ĉi tien?"

Cui rakontis al la knabino ĉion pri la plano de Mole kaj kiel la kunluna sklavo portis lin ĉi tien.

"Kie estas Mole?" demandis la knabino.

"Ekster la kurteno." respondis Cui.

La knabino vokis Mole-n eniri kaj regalis lin per vino en ora taso.

"Mi devenis el riĉa familio en la nordo," ŝi rakontis al Cui. "sed mia nuna mastro komandis armeon okupi mian hejmlokon kaj perforte devigis min servi kiel konkubino. Mi hontas ke anstataŭ memmortigi nun mi vivas nur humile. Kvankam kun ŝminkoj sur mia vizaĝo, tamen kaŝiĝas en mia koro ĉiam nur doloro. Nun mi havas jadan manĝilaron, oran incensilon, mi portas brokatajn vestojn, loĝante en luksa ĉambro, tage mi havas ornamaĵojn el juveloj, nokte mi kuŝas sub silkaj litkovriloj, sed ĉio ĉi tio ne povas doni al mi ĝojon. Mi sentas min ĉiam kvazaŭ en katenoj. Se via servanto posedas tiel superhoman arton, ĉu li kapablas savi min el tiu ĉi malliberejo? Se mi povos reakiri liberon, mi ne pentos eĉ je kosto de mia vivo! Mi volantas fariĝi via sklavino kaj servi al vi dum mia tuta vivo. Ĉu vi jesos mian peton? S-ro!"

Cui paliĝis senvorte. Sed Mole respondis: "Se vi firme deziras, tio ankaŭ estas tre simpla afero."

La knabino tre ĝojis pro la respondo. Mole proponis ke li unue forportu ŝiajn pakaĵojn. Post



trifoja transporto, Mole diris: "Ni rapidu! ĉar baldaŭ tagiĝos." Kaj, portante Cui kaj la knabinon sur sia dorso, Mole flugsaltis trans dekelkaj altaj muroj, kaj foriris. Sed neniu el la gardistoj en la ministra domo tion rimarkis. Fine ili revenis hejmon de Cui kaj kaŝis la knabinon tie.

La sekvan matenon, domanoj de la ministro ektrovis ke la knabino jam malaperis kaj la dogo estis mortigita.

La ministro miregis, avertante:

"Mia domo ĉiam estis sub severa gardo kaj fermo de fortikaj seruroj. Sed nun, iu entrudiĝis kvazaŭ fluge, postlasinte nenian spuron. Supozeble ke ŝin forportis neordinara kavaliro. Diru nenion por eviti malfeliĉon!"

La knabino kaŝe vivis en la domo de Cui por du jaroj. Foje, okaze de festotago en printempo ŝi ekskursis per eta kaleŝo al pitoreskejo Qujiang spekti florojn kaj estis subrekonita de servisto de la ministra domo. La servisto raportis tion al la ministro, kaj tiu, mirigite, alvokis Cui pridemandi.

Timante punon, Cui ne kuraĝis plu kaŝi la veron kaj konfesis ĉion al la ministro, inkluzive la rolon de Mole.

"La knabino kulpas vere puninda!" diris la ministro. "Ĉar ŝi servis al vi jam du jarojn, mi ne devas ŝin retro-akuzi. Tamen, mi devas forigi vian kunlunan sklavon por la bono de publiko."

La ministro sendis 50 armitojn sieĝi la domon de Cui por kapti Mole-n. Sed Mole kun ponardo transflugis super altaj muroj, tiel lerte kvazaŭ kreskis al li flugiloj. Oni arkpafis. Sagoj flugis pluve sed neniu povis lin trafi. Dum palpebruma momento Mole malaperis foreskape. Familio de Cui konsterniĝis. Ankaŭ la ministro ege pentis kun timo. Ĉiunokte dum tuta jaro li devis gardi sin per multe da gardistoj kun glavoj kaj lancoj.

Post pli ol dek jaroj, iu el servistoj de Cui vidis Mole-n, kiu vendis drogojn en foiro de Luoyang kaj aspektis same kiel en la malnova tempo.

**Pei Xing (818-907)**

## LA JADAJ PISTUJO KAJ PISTILO

Dum Changqing-erao (821-824), Tang-dinastio, instruitulo nomata Pei Hang malsukcesis en ŝtata ekzameno kaj vojaĝis al Ezhu por viziti sian malnovan amikon eksĉefministron Cui. La eksĉefministro donacis al li ducent milojn da moneroj. Kunportante la sumon li ekveturis por reveni al la ĉefurbo per granda pasaĝera ŝipo, kiu navigas en riveroj Xiang kaj Han. Alia pasaĝero en la ŝipo, S-ino Fan, estis senkompare ĉarma belulino. Loĝante en najbaraj kajutoj ili povis bone aŭdi klarajn parolojn, babilojn k. s. Kvankam distancis tiel proksime, tamen Pei Hang neniel povis renkonti ŝin vid-al-vide. Li do subaĉetis ŝian servistinon Niaoyan (Fumo Spirala) transdoni poemon al la mastrino:

*Mi sopiras vin de antipoda disto,  
do pli arde je proksim' nur trans ekrano.  
Se vi flugas al Jadurb' por fe-kunsido,  
ĝis ĉiel' vin sekvu mia akompano!*

Sed post longa atendado li ricevis nenion respondan al la poemo. Pri tio Pei hang plurfoje demandis al Niaoyan kaj fine ŝi respondis: "Kion mi povus fari se mia mastrino ignoras ĝin kvazaŭ vidinte nenion?"

En senhelpeco, Pei Hang do aĉetis dumvoje famajn vinojn kaj rarajn fruktojn kaj donacis al S-ino Fan. Fine Sino Fan sendis sian servistinon Niaoyan inviti lin al intervidiĝo. kiam la kurteno estis levita, li vidis belulinon brilan kiel jado, ĉarman kiel floro, kun hararo simila al nuboj kaj brovoj similaj al lunarko. Ŝi kondutis tiel impone kaj gracie kiel feino kiu degnis akcepti vizitanton el karnula mondo. Pei Hang refoje riverencis kaj en granda surpriziĝo rigardis al ŝi dum longa momento.

La s-ino diris al li: "Mi havas edzon en Hannan, kiu volas ekŝiĝi de sia ofico kaj loĝi ermite en montaro. Li vokis min al adiaŭo. Turmentate de tristo kaj ĉagreno, mi sentas maltrankvilon, timante nur ke mi ne povos ĝustatempe veni al la rendevuo, ĉu mi do ankoraŭ povas havi okulumojn por aliaj? Tamen mi tre ĝojas havi vin kiel kunvojaĝanton en la sama ŝipo, sed mi ne havas humoron por frivoli." "Ho, mi neniam aŭdacis tiel pensi!" humile respondis Pei Hang.

Post kundrinko li foriris. Ŝi tenis sin tiel malvarma kiel glacio kaj netuŝebla kiel frosto. Poste, pere de Niaoyan ŝi sendis al li poemon:

*Trinke emocias mi sen fin'.  
Post pistpreto vidos vi Yunying.*

*Lanqiao estas ja loĝej' de feoj,*

*ne necesas al Jadurb' ating'.*

Leginte la versojn. Pei Hang sentis honton kaj admiris pri ŝia talento, tamen li ankoraŭ ne povis tute kompreni la aludon en ŝia poemo. Poste, li havis nenian intervidiĝon kun la s-ino kaj ŝi nur sendis salutojn de tempo al tempo per Niaoyan. Kiam la ŝipo venis al Xiangyang, la s-ino kaj ŝia servistino kunportis siajn pakaĵojn kaj foriris eĉ sen adiaŭo al Pei Hang kaj neniuj povis scii kien ŝi forveturis. Pei Hang multe klopodis por serĉi en diversaj lokoj sed trovis nenian informon pri ŝi. Kaj li ordigis siajn pakaĵojn kaj daŭrigis la veturon al la ĉefurbo. Kiam Pei Hang veturis preter la poŝta stacio Lanqiao (Blua Ponto), li sentis fortan soifon, kaj deiris de vojo por serĉi trinkaĵon. Tiam li trovis kabanon malaltan kaj malvastan, kun tri aŭ kvar ĉambroj, en kiu maljunulino ŝpinis ramiajn fadenojn. Salutante al ŝi, Pei Hang petis ion por trinki.

"Yunying," la maljunulino vokis, "Alportu bovlon da akvo! Ĉi tie iu s-ro volas trinki."

Pei Hang tre miris, rememorante la version el la poemo de S-ino Fan kun mencio pri Yunying, kiun li ne povis kompreni. Post momento, el sub la fragmita kurteno etendis paro da marmoraj manoj tenantaj porcelanan bovlon. Pei Hang prenis la bovlon kaj trinkis. La trinkaĵo vere similis al ambrozio, kies kurioza bonodoro disŝvebis eĉ tra la pordo. Kiam Pei Hang redonis la bovlon, li levis la kurtenon kaj ekvidis knabinon tiel ĉarman kiel floro kun matenaj rosoj aŭ freŝa neĝo en frua printempo. Ŝia vizaĝo similis al fajna jado kaj hararo pli densa ol nuboj. Kiam ŝi honteme turnis pene kaŝante sin, eĉ la ruĝa orkideo en profunda valo ne povis konkuri kun ŝi pri beleco.

Pei Hang estis frapita de ŝia beleco kaj stulte staris tie kvazaŭ alnajlita, tute ne povante formovi siajn piedojn. Kaj li diris al la maljunulino: "Miaj servistoj kaj ĉevaloj estas tre malsataj. Ni volas resti ĉi tie ripozi momenton. Volu ne rifuzi mian peton kaj mi bone pagos al vi!"

La maljunulino respondis: "Jes, laŭ via bontrovo!"

Post kiam la ĉevaloj kaj ĉevaloj satmanĝis, Pei Hang diris al la maljunulino: "Ĵus mi vidis la junan f-inon kun elstara ĉarmo kaj senkompara beleco, kio estas la vera kaŭzo kial mi hezitas ĉi tie kaj ne volas foriri. Ĉu mi povus edziĝi al ŝi per pago de abundo da edzinigaj donacoj?"

La maljunulino diris: "Fakte ŝiaj manoj jam estis promesitaj al iu homo sed la nupto ankoraŭ ne okazis. Mi estas maljuna kaj malsanema, havante nur ĉi nepinon.

Foje senmortulo donacis al mi medikamenton, sed mi ne povas manĝi ĝin antaŭ ol ĝi estos pistita dum cent tagoj en jada pistujo per jada pistilo. Kaj manĝinte mi povos vivi tiel longe kiel la ĉielo. S-ro, vi povos edziĝi al ŝi nur se vi sukcesos doni al mi la jadajn pistujon kaj

pistilon, ĉar oro kaj silkaĵoj estas senutilaj por mi."

Pei Hang riverencis kun danko, dirante: "Atendu min por cent tagoj kiel limdato kaj mi promesas reveni kun la jadaj pistujo kaj pistilo. Nepre ne edzinigu ŝin al alia homo!"

La maljunulino jesis kaj Pei Hang foriris kun bedaŭro. Kiam Pei Hang venis al la ĉefurbo, li tute ne atentis pri la okazonta ŝtata ekzameno sed nur serĉadis rondvizitante diversajn kvartalojn, stratojn, stratetojn kaj homplenajn foirojn, laŭte kriante ke li volas aĉeti jadajn pistujon kaj pistilon. Sed li ricevis nenian informon pri tio. Li ignoris amikojn, kiujn li renkontis survoje, kvazaŭ nekonataj, tiel ke ili opiniis lin iom freneza. Tiel forpasis kelkaj monatoj kaj hazarde li renkontis maljunan jadvendanton, kiu diris al li: "Antaŭ nelonge mi ricevis leteron de maljuna Bian, mastro de medikamenta vendejo en Guozhou, ke li havas jadajn pistujon kaj pistilon por vendi. Ĉar vi tiel fervore serĉadas tion, mi povas skribi leteron por rekomendi vin al li."

Pei Hang kore dankis lian favoran helpon kaj fine li sukcesis trovi la jadajn pistujon kaj pistilon. Tamen la mastro s-ro Bian diris: "Vi devas pagi ducent milojn da moneroj por la prezo, alie mi ne vendas."

Por havigi al si la necesan sumon, Pei Hang elĉerpis ĉiom de siaj havaĵoj kaj eĉ forvendis siajn servistojn kaj ĉevalojn. Fine li kunportis la jadajn pistujon kaj pistilon kaj rapidis piedirante al Lanqiao.

La maljunulino kun ridego diris al Pei Hang: "Ho, s-ro, mi ja vidas ke vi estas homo fidela al siaj vortoj, do mi ne devas teni mian filinon sen repago al vi!"

Ankaŭ la knabino ridetante diris: "Sed tamen li ankaŭ devas serve pisti la medikamenton por cent tagoj antaŭ ol ni parolos pri geedziĝo." La maljunulino prenis de sur sia zono la medikamenton kaj Pei Hang tuj komencis ĝin pisti. Li laboris tage kaj ripozis en nokto, kaj la maljunulino reprenis la medikamenton kaj pistujon en internan ĉambron. Sed en mallumo Pei Hang reaŭdis sonon de pistado. Li subrigardis kaj vidis ke jada leporo manipulis la ilon pistante. Blanka brilo kiel neĝo prilumis la tutan ĉambron tiel hele, ke eĉ hareto estas klare videbla. Tio faris Pei Hang pli firma je sia volo.

Kiam cent tagoj forpasis, la maljunulino prenis la medikamenton kaj englutis ĝin, dirante: "Mi devas iri al la kaverno en montaro por informi al miaj parencoj por pretigi nuptoĉambron por vi."

Kaj ŝi kunportis la knabinon reveni al la montaro, dirante al Pei Hang: "Atendu ĉi tie momenton!"

Post nelonge, alvenis lakeoj kaj kaleŝoj por bonvenigi lin. Eskortante Pei Hang venis al pompa domo nubskrapanta kun perlo-ornamitaj pordoj kiuj rebrilis en sunlumo. En la domo li vidis

kurtenojn, ekranojn, juvelojn kaj kuriozaĵojn de diversaj specoj en abundo, kiuj senescepte superis tiujn en domo de nobelo. Servo-knaboj kaj ĉambristinoj kondukis Pei Hang malantaŭ la kurtenojn por plenumi la nuptan ceremonion. Kiam Pei Hang respektive riverencis al la maljunulino, li emocie larmis kun danko. Sed la maljunulino diris: "Ĉar vi ja estas ido de la Klarfresta Verulo Pei kaj laŭdestine ankaŭ fariĝos feo, tial estas ne necese ke vi speciale dankas min."

Poste, Pei Hang estis prezentata al gastoj, kiuj senescepte estas senmortuloj. Kaj iu feino kun paro da harringoj kaj en iriza vesto estis prezentita al Pei Hang kiel pliaĝa pliaĝa fratino de la novedzino. Kiam Pei Hang riverencis al ŝi, tiu demandis: "Ho, ĉu vi jam ne plu rekonas min, s-ro Pei?"

"Ĉar antaŭe ni ne estis parencoj, tial mi ne memoras kie mi renkontis vin." respondis Pei Hang.

"Sed ĉu vi ne memoras nian kunvojaĝon en la sama ŝipo de Ezhu al Xiangyang?" la feino redemandis.

Ege surprizite, Pei Hang sincere esprimis al ŝi sian dankon.

Poste, li informiĝis de aliaj: "Tiu ĉi estas la pliaĝa fratino de via edzino, S-ino Yunqiao, la edzino de Lordo Liu Gang. Ŝi jam atingis la anĝelecon kaj nun servas kiel funkciulino ĉe la Jada Imperiestro en la Ĉiela Palaco."

La maljunulino sendis Pei Hang kaj lian edzinon al la Kaverno Jada Kesto, kie ili loĝis en juvela pavilono kaj ĉambro el perloj kaj manĝis la Elikson de Roza Neĝo kaj Jaspa Floro, kiu faris lin etera; ŝanĝiĝis al li la hararo de nigra al purpura-verda, li scipovis transformiĝi laŭplaĉe kaj fariĝis senmortulo.

Dum Tianhe-eraro (827-835), lia amiko Lu Hao renkontis lin okcidente de la Poŝta Stacio Lanqiao. Pei Hang rakontis al Lu hao kiel li atingis la senmortecon kaj donacis al li dek ĝin-ojn da fajna jado kaj fean pilolon vivlongigan. Post interbabilo dum tuta tago, li petis Lu transdoni leterojn al liaj parencoj kaj amikoj.

Lu Hao riverencis kap-sur-tere kaj petis: "Nun vi jam atingis la senmortecon. Ĉu vi povus donaci al mi ian vorton kiel instrukcion?"

Pei Hang diris: "Laozi instruis al ni: 'Tenu la menson malplena kaj ventron plena.' Sed homoj en la nuna tempo tenas sian menson ja tro plena tiel ke ili ne povas atingi senmortecon."

Vidante ke Lu Hao ankoraŭ ne komprenis, li aldonis: "Kiam la menso estis plenigita de vantaj deziroj, la ventro nature ne povas rezervi vitalan spiriton – tio estas kion mi aludas. Ĉiu homo ja havas en si la povon atingi senmortecon kaj rezervi la vitalan spiriton, sed ankoraŭ ne venas la tempo por ke vi lernu tion. Miklarigos al vi iom poste."

Lu Hao konsciis ke li ne povas peti pli multe. Post manĝo Pei Hang foriris, kaj post tiam neniu revidis lin ankoraŭfoje.

**Li Fuyan (aŭtoro en Tang-dinastio)**



# DUKO LI JING

Kiam Li Jing ankoraŭ ne lordiĝis kiel Weiguo-duko de Tang-dinastio, li ofte ĉasis en montaro Taiyue, kie li manĝis kaj loĝis en vilaĝo. Maljunuloj en la monta vilaĝo miris pri lia personeco kaj konduto, ofte donis al li abunde da donacoj. Ju pli multe da jaroj forpasis, ankaŭ la donacoj des pli abundis.

Iutage, li subite renkontis aron da cervoj kaj ĉase postkuris ilin. Lia postkurado daŭris ĝis vespero. Tiam li volis forlasi la ĉasatajn bestojn, sed jam ne povis. Post nelonge, li perdis vojon en malhela kaj nebula krepuskiĝo, konfuze ne trovinte al si la revenan vojon. Li iris kun bedaŭro kaj ĉagreno, kiu premis pli peze en lia koro. Subite li vidis ke lamplumon brilas malproksime, kaj urĝigis sian ĉevalon galopi antaŭen. Venante tien, li trovis grandan domon kun ruĝa pordo kaj altaj muroj. Li frapis al la pordo longan tempon kaj fine eliris iu, kiu demandis kion li volas.

Li Jing konfesis pri sia vojerariĝo kaj petis pri tranoktado tie.

"Sed nia mastro ne estas hejme," respondis la homo. "restas nur la Matrono, majstra patrino. Do estas ne eble lasi fremdulon tranokti en nia domo."

"Tamen, mi petas, ĉu vi povus raporti al ŝi prove?"

La homo eniris pordon raporti, kaj post momento reaperis, respondante:

"Komence la Matrono ne volas konsenti, tamen, pro la malbona vetero kaj via vojerariĝo, vole-nevole ŝi fine jesis."

Kaj li invitis Li Jing eniri. Post momento, venis servistino kiu anoncis: "Jen alvenas la Matrono!"

Rigardante Li Jing trovis ke la Matrono aĝas ĉ. pli ol 50-jara, en blua robo kaj pura jako, ŝi aspektis elegante kiel de nobla familio.

Li Jing rapide salutis. La Matrono responde salutis kaj diris:

"Nun miaj du filoj ambaŭ ne estas hejme. Laŭkutime mi ne devas enlasi vin. Tamen, nun regas mallumo kaj misa vetero, dum vi jam perdis revenan vojon, kien do vi povus vin direkti se mia domo ne akceptus vin? Sed sciu, ĉi tie estas en montaro. Kaj miaj filoj revenos tre eble en noktomezo kun grandaj bruoj, mi esperas ke tio ne timigos vin."

Post ŝi regalas lin per bonaj pladoj. Manĝaĵoj estis bongustaj, sed plejparte el fiŝaĵoj.

Post kiam li finmanĝis, la matrono revenis en sian ĉambbron. Du servistinoj alportis litaĵojn,

senescepte bonodorajn kaj luksajn. Aranĝinte la litaĵojn, la du servistinoj fermis la ĉambron kaj foriris.

Li Jing pensis pri tio kiu revenos noktmeze kun grandaj bruoj? Kio estas tio?

Ju pli li pensis, des pli li sentis timon. Kaj li ne kuraĝis endormiĝi sed sidante tie aŭskulti kio okazos.

Proksimume je noktomezo, subite aŭdiĝis urĝaj frapoj al la pordo, iu respondis kaj la venanto parolis:

"Venas la Ĉiela Edikto kun ordono ke la Unua Sinjoro donu pluvon al la regiono periferia je 700 lioj ĉirkaŭ tiu ĉi monto. Finu la pluvadon je la kvina noktogarda periodo, nepre ne tro malfrue nek tro draste."

Ricevinte la Ĉielan Edikton, la respondanto eniris domon transdoni kaj raporti al la Matrono. Aŭdiĝis parolo de la Matrono: "Nun miaj du filoj ambaŭ ankoraŭ ne revenis. La ordono pri pluvado estas nenial prokrastigenda.

Se ni plenumos la taskon malakurate, ni meritos punon. Eĉ se ni tuj sendas informon, ankaŭ estas tro malfrue. Lakeoj ne rajtas fari tion. Kion fari?"

Juna servistino atentigis: "La gasto en salono ne estas ordinara homo, kial vi ne petus lian helpon?"

Tiu sugesto tre ĝojigis la Matronon kaj ŝi persone venis frapi al la pordo, petante:

"Ĉu vi vekiĝis, sinjoro? Bonvole eliru por momento da intervidiĝo, mi petas!"

Li Jing jesis kaj descendis de ŝtuparo.

La Matrono diris al li: "Ĉi tie estas ne loĝejo de homoj, sed Draka Palaco. Mia pliaĝa filo foriris al nupto en la Orienta Maro, kaj mia pli juna filo for por sendi sian fratinnon. Hazarde alvenis la Ĉiela Edikto pri disdono de pluvoj al du lokoj. La nuba veturado resume superis dek milojn da lioj. Nun ni jam ne havas tempon informi miajn filojn kaj estas malfacile peti alies helpojn, sekve ni ekvolas ĝeni vin per tia tasko, ĉu vi volontus doni vian favoran helpon al ni?"

"Sed mi estas nur karnulo." respondis Li Jing. "Ne scipovante veturi per nuboj, kiel mi povus plenumi la taskon disdoni pluvon? Se vi donus al mi instruojn, mi certe obeu!"

"Se vi agus laŭ mia instrukcio, ĉion vi povos plenumi."

Kaj ŝi ordonis alkonduki blu-blankharan ĉevalon kaj havigi al Li pluvigilon, kiu estis nenio

alia ol malgranda botelo, alligita antaŭ la selo.

"Rajdante sur la ĉevalo," avertis la Matrono, "anstataŭ kateni per brido, vi lasu ĝin libere iri. Kiam ĝi henis galopante, vi prenu el la botelo guton da akvo, verŝu ĝin sur la kolharon. Atentu, neniom pli da guto!"

Li Jing do ekrajdis sur la ĉevalo, kiu marŝis pli kaj pli supren. Dum Li Jing miris pri ĝia kurado stabila kaj rapida, li tute ne rimarkis ke la ĉevalo jam venis al nubaro.

Vento blovis sage. Tondroj krakis subhufe. Je la eksaltoj Li Jing komencis guti la akvon. Sekvis furiozaj fulmoj. Disiĝis la nigraj nuboj. Li Jing ekvidis la malgrandan montan vilaĝon kie li ofte loĝis.

"Ho, tiu vilaĝo donis al mi tro multe da favoroj," li ekpensis, "mi ofte bedaŭris ke mi ne havis rimedon ĝin rekompenci.

Nun, pro longtempa trosekeco la plantaĵoj suferis mortos, dum la pluvo troviĝas en mia mano, kial mi ne donu malavare?"

Opiniante ke unu guto ne sufiĉas, Li Jing donis dudek gutojn. Post nelonge, finiĝis la pluvado.

Kiam Li Jing revenis per la ĉevalo, li vidis ke la Matrono ploris en la halo, dirante: "Ho, kian misagon vi faris? Mi ja avertis vin doni nur unu guton, sed kial vi arbitre superdonis je 20 futoj da pluvo? Sciuj, tiu unu guto ja egalas al unu futo en la hama mondo! Noktmeze en tiu monta vilaĝo subite aperis 20 futojn profunda inundo, imagi, ĉu ankoraŭ postrestas vivantoj? Pro tio mi jam estis punata per 80 batoj!"

Vidiĝas sangspuroj plene sur ŝia dorso, kaj ŝiaj filoj ankaŭ estis kompromititaj. Kion fari? Li Jing sentis kaj honton kaj timon, ne sciante kiel respondi.

"Vi estas karnulo," la Matrono daŭrigis, "kiu ne scias la metamorfozon de nuboj kaj pluvo, do mi ne devas plendi aŭ malami vin. Mi timas nur tion, ke la armeo de drako baldaŭ venos serĉi kaj teruros vin. Tial vi devas tuj foriri! Pro mia ĝeno al vi per la peniga tasko, mi volas iel rekompenci al vi. Sed en la montaro ni ne havas ion valoran, do mi volas donaci al vi du servistinojn. Vi povus preni aŭ ilin ambaŭ, aŭ unu el ili, nun elektu laŭ via bontrovo!"

Kaj ŝi ordonis ke la du servistinoj elvenu. Sekve de la orienta koridoro eliris unu kun afabla mieno kaj de la okcidenta koridoro eliris la alia, kun koleraĵoj kaj indigna mieno. Li Jing pensis en si: "Mi estas ĉasanto, ne timas lukton. Dum elekto de unu, se mi prenis la afable mienan, ĉu oni rigardus min timema?"

Tial li respondis: "Mi ne kuraĝas preni ambaŭ. Se via Matrona moŝto favore donacas, mi prenu la kolere mienan."

"Ho, tio jam limiĝas via deziro!" la Matrono ridis, kaj salutis lin adiaŭi.

Ankaŭ la servistino eliris sekvante lin. Post paŝoj elirinte de la pordo, Li Jing rimarkis ke la domo jam malaperis.

Returnante sin li volas demandi al la servistino, sed tiu ankaŭ malaperis.

Vole-nevole Li Jing do revenis mem serĉinte la vojon. En tagiĝo li rigardis al la monta vilaĝo, kiu jam droniĝis en superakvo. Montriĝis nur supro de arbobranĉoj. Vidiĝis neniu homo.

Poste, Li Jing fariĝis altrangulo. Li komandis armeojn subigi ribelojn kaj faris grandajn meritojn. Sed finfine li ne funkciis kiel ĉefministro. Ĉu pro la kaŭzo ke li ne prenis la afable mienan servistinon?

Estis populara onidiro, ke "ĉefministroj plej ofte devenis oriente de la trapasejo, dum generaloj devenis okcidente de la trapasejo". Ĉu la du servistinoj, kiuj eliris respektive de la orienta kaj okcidenta koridoroj, aludas pri ĉefministro kaj generalo? Kaj ilia servisteco ankaŭ aludas la suban pozicion. Se Li Jing prenis ambaŭ servistinojn, li certe povis funkcii kaj generalo kaj ĉefministro.

**Chen Hong (785-820)**

# LA MALJUNULO EN LA ORIENTA URBO

La maljunulo havis familian nomon Jia kaj propran nomon Chang. Li estis loĝanto en Xuanyang-kvartalo de Chang'an, naskiĝinta en la unua jaro de Kaiyuan-erao (713 p. K.). Ĝis la kuranta, la kvina jaro de Yuanheerao (810), li aĝis jam 98-jara, tamen ankoraŭ kun sanaj okuloj, oreloj bone funkciantaj. Li parolas trankvile kaj bonorde. Lia memorkapablo neniom reduktiĝis. Kiam li parolis pri la malnovaj aferoj en la paca erao, lia rakontado estis klaraj, detalaj kaj allogaj. Lia patro nomiĝis Jia Zhong, kiu estis altstatura je 9 futoj, tiel forta ke li povis tiri bovon retropaŝi. origine Jia Zhong estis armito, funkcianta kiel gardisto en palaco de la imperiestra edzino. En la kvara jaro de Jinglongerao (710), tenante armilon, sekvante Xuanzong li sturmis en Daming-palaco, kie ili mortigis la uzurpintinon Wei, subtenis Ruizong surtroniĝi kaj akcepti korteganojn, tiel Jia Zhong fariĝis unu el merituloj de Jingyun-erao (710-711). Li estis envicigita en trupon de longa glavo kaj funkciis kiel intima korpogardisto de la imperiestro. Laŭ edikto de la imperiestro Jia Zhong transloĝigis sian familion al la orienta Yunlong-pordo.

Kiam Jia Chang aĝis 7-jara, li jam estis pli facilmovi ol ordinaraj homoj. Li povis grimpi laŭ kolono sur trabon, lertis flue respondi kaj komprenis parolon de birdoj.

Kiam Xuanzong ankoraŭ estis kronprinco, li jam ŝatis spekti interluktojn de kokoj populare furorajn inter popolanoj dum la Tago de Klaro kaj Helo. Post kiam li surtroniĝis, li konstruigis Protektatan Kokejon inter la orienta kaj okcidenta palacoj, kie estis kolektitaj el Chang'an milojn da kokoj kun orflavaj plumoj, fersimilaj ungoj, alta kresto kaj levita vosto. li ankaŭ elektis el sia gvardio 500 junajn soldatojn brede kaj trejni la kokojn.

La inklina ŝato de imperiestro stimulis tion pli furora.

Princoj, imperiestraj parencoj, princinoj, lordoj ĉiuj volontis elspezi ĉiom da sia riĉaĵo por aĉeti kokojn spite al danĝero de bankroto. Loĝantoj en la ĉefurbo, ĉu viraj aŭ inaj, ĉiuj rigardis tion ĉefa sinokupo. Tiuj malriĉaj, ne povante brede verajn kokojn, amuzis sin per falsaj kokoj.

Iufoje, la imperiestro Xuanzong eliris ekskursi. Vidante ke Jia Chang ludis lignajn kokojn apudvoje ĉe Yunlongpordo, li alvokis lin en palaco labori en la kokejo kaj ĝuis manĝaĵojn kaj vestaĵojn eĉ pli bonajn ol tiuj de la gvardianoj. Tiam, Jia Chang estis nur knabo tri futojn statura. Enirinte amasojn da kokoj, li kvazaŭ ludis kun infanoj. Li bone sciis ĉion pri la kokoj, ekz. kiu estas forta, kiu malforta, kiu kuraĝa, kiu timema, kiam oni devas doni al ili trinkon aŭ nutraĵon, kia estas simptomaro de iliaj malsanoj... ktp. Jia Cheang trejnigis du kokojn, kiuj montris sin antaŭ li obeema kaj agis laŭ liaj ordonoj kiel homoj. Eŭnuko Wang Cheng'en, gvidanto de la Protektata Kokejo, raportis tion al la imperiestro Xuanzong. Xuanzong alvokis Jia Chang kun liaj kokoj al korto ekster palaco pruve ludi kaj la prezentado tiel kontentigis al la imperiestro, ke Lia Majesto tiutage tuj nomumis Jia Chang kiel ĉefon de la 500 kokbredistoj. Ĉar Jia Chang karakteriĝis milda kaj laboris diskrete, tial la imperiestro multe favoris lin kaj

premiis lin per oro, arĝento aŭ brokaĵoj senditaj al lia hejmo preskaŭ ĉiutage.

En la 13-a jaro de Kaiyuan-erao (725), kiam Xuanzong vizitis al Taishan, la Orienta Sankta Monto, por kulti la Ĉielon, Jia Chang transportis per kaĝoj 300 kokojn kunveturi sekvante Lian Majeston. Okaze la patro Jia Zhong mortis ĉe montpiedo de Taishan. Pro la favorateco de Jia Chang, la restaĵoj de la mortinto estis transportita revenen al Chang'an por enterigi. Prefekto pretigis por li la ĉerkon kaj funebran ĉaron, kaj, dum la veturo de Taishan preter Luoyang al Chang'an, la ĉerkveturilo estis eskortita de pedelok senditaj de ŝtataj poŝtstacioj.

En la tria monato de la 14-a jaro de Kaiyuan-erao (726), en uniformo de koktrejnisto, Jia Chang ricevis aŭdiencon de la imperiestro Xuanzong ĉe la termofonto en Lishanmonto. Tiam la publiko nomis lin Genia Mirknabo pri Kokluklado, kaj oni eĉ cirkuligis jenan popolanton:

Ja estas ne necese instrui al filo legi,

ĉar kok-lukt', ĉevala vetkuro superas ol scioj.

Knabo de familio Jia aĝas dek tri-jara

jam ĝuis riĉon, gloron rarajn je generacioj.

Scipovas li decidi venkojn de la kokluklado,

en silka uniformo iris post monark' intime.

Forpasis lia patro mil liojn fore de Chang'an,

ŝtat' revenigis ĉerkveturilon de malproksime.

Kiam la imperiestra patrino Zhaocheng ankoraŭ estis en la Domo de Princo Xiang, ŝi naskis Xuanzong en la kvina tago de la oka monato lunkalendare. Post surtroniĝo de Xuanzong, tiu dato estis proklamita kiel Tago de Longa Vivo.

Al la popolo estu premidonataj bovaĵoj, vinoj kaj tritaga ferio, kio estis nomata kiel regula Karnavalo, kiu okazis en la imperiestra palaco en aparta disipemo, kaj kelkfoje la koncernaj solenoj estis okazigitaj en la orienta ĉefurbo Luoyang. Ordinare, la Lanternan Festivalon kaj Tagon de Helo kaj Klaro la imperiestro Xuanzong pasigis en sia kastelo sur Lishan-monto.

Ĉiufoje, okaze de tiuj festtagoj, ĉiaj amuzaĵoj ludiĝis kaj ĉiuj palacaninoj sekvis Lian Majeston akompanante. Jia Chang, kun aĵurita ora krono, en silka brodita vesto kun brokataj manikoj, tenante en mano sonorilon iris antaŭe malfermi vojon. La kokoj bonorde viciĝis sur la palaco. Kun akraj ĉirkaŭrigardoj, radia mieno Jia Chang komandis vigle. La kokoj hirtigis siajn plumojn, frapis per flugiloj, frotakrigis siajn bekon kaj ungojn, bridis sian koleran impeton por konkeri la venkon. Ilijen atakis, jen retiriĝis, ĉiam konforme al reguloj. Laŭ

direktado de la vipo en mano de Jia Chang, ili flugis jen supren, jen malsupren, tute laŭ intenco de Jia Chang. Post kiam evidentiĝis la fina rezulto pri venko kaj malvenko, la kokoj ĉesigis sian interluktadon kaj laŭ tia vicordo, ke tiuj pli fortaj iris antaŭe kaj la malpli fortaj iris malantaŭe, revenis sekvante Jia Chang al la kokejo.

Siatempe troviĝas ankaŭ multaj aliaj aktoroj, ekz. luktistoj, glavjonglistoj, stangogrimpistoj, pilkoludistoj, ŝnurdancistoj, stangpintaj dancistoj kc., sed, vidante prezenton far Jia Chang, ili ekpaliĝis deprimitaj, heziteme promenadis ekstere kaj ne kuraĝis iri en la placon ludi (prezenti sian arton). Do ĉu Jia Chang estis unu el tiaj homoj kiuj scipovis trejni simiojn kaj kiel diro de antikvuloj subigi drakojn.

En la 23-a jaro de Kaiyuan-erao (735) Xuanzong geedzigis Jia Chang al la filino de Pan Datong, la aktoro de la imperia ensemblo Pira Ĝardeno. kaj la jadaĵo de la novedzo kaj la brodita jako de la novedzino ambaŭ estis premidonitaj de la imperiestro. Poste, Jia Chang generis du filojn Zhixin kaj Zhide. Dum la jaroj de Tianbaoerao (742-755), la edzino Pan de Jia Chang ĝuis favoron de la Imperiestra Nobeledzino Yang pro sia elstara arto de kantado kaj dancado. Resume la geedzoj Jia ĝuis grandan kaj senvelkan favoron dum 40 jaroj, tio ja dankas al iliaj lerta metiarto kaj diskreta konduto, ĉu ne?

La imperiestro Xuanzong naskiĝis en la jaro de koko (685), tamen li ordonis ke oni sin vestu en uniformo de korteganoj fari kokoluktadon. Do en la pacaj jaroj jam montriĝis la antaŭsigno de plago. Sed Xuanzong ne konsciis pri tio.

En la 14-a jaro de Tianbao-erao (755) la ribelaj trupoj de An Lushan faligis la urbon Luoyang, sekve okupis ankaŭ Tongguan. Lia Majesto fuĝis al Chengdu. Jia Chang volis postkuri eskorti al la imperiestro, kaj haste rajdis en nokto galopi tra la Okcidenta Pordo. Sed lia stumblis surpaŝante kavon kaj faligis Jia Chang vundita je piedo tiel ke li ne povis daŭrigi la antaŭenmarŝon. Vole-nevole li devis rifuĝi kun lambastono al Zhongnan-monto. Kaj ĉiufoje en la datoj por kokoluktado antaŭ Lia Majesto. Jia Chang ĉiam ploregis kun vizaĝo al la sudokcidento. Ĉar en pasinteco, okaze de vizito al la Kortego, An Lushan konis Jia Chang ekster la Horizontala Pordo, tial, post kiam li okupis la du ĉefurbojn Luoyang kaj Chang'an, li anoncis premion je mil taeloj da oro pro la serĉo de Jia Chang. Sed Jia Chang jam ŝanĝis sian nomon kaj kaŝis sin en templon, kie li balais teron, frapis sonorilon kiel pia budaisto.

Nur post kiam la imperiestra patro Xuanzong revenis al Xingqing-palaco kaj Suzong surtroniĝis en aparta halo, Jia Chang revenis al sia malnova kvartalo. Lia hejmo trasuferis forrabon de ribelaj soldatoj kaj postrestis jam nenio. En tola vesto kaj kun velka aspekto, Jia Chang jam ne povis plu eniri la imperiestran palacon.

La sekvan tagon, li eliris tra la suda pordo de Chang'an kaj survoje ĉe kvartalo Zhaoguo renkontis siajn edzinon kaj filojn, kiuj senescepte aspektis mizere palaj kaj maldikaj. La filoj ŝultroportis brullignaĵojn kaj la edzino portis sur si malnovan vatitan jakon. Ne povante sin regi, Jia Chang ploregis interbrakumante kun ili kaj poste faris al ili adiaŭon. Li foriris de ili,



mem loĝis en templo de Chang'an kaj lernis de majstra bonzo budaismon.

En la unua jaro de Dali-erao (766), sekvante la altmoralan bonzo-majstro Yunping de Zisheng-templo, Jia Chang transloĝiĝis al la orienta foiro ĉe Haichi-lago, kie li starigis ŝtonan kolonon kun sutra teksto. Tiam jia Chang post lernado jam scipovis skribi sian nomon, kaj, legante sutrojn, kompreni la profundajn instruojn. Per sia bonkoreco li edifis civilulojn konstrui domojn por bonzoj kaj temploj, kultivi plantaĵojn kaj bonajn arbojn. Tage li butis aŭ akvumis bambuojn, nokte li sinkulturis je budaismo en bonza ĉambro.

En la 3-a jaro de Jianzhongerao (782), la bonzo-majstro Yunping forpasis. Post funebrado al la forpasinto, Jia Chang tenis la budaan relikvon de Yunping al la templo Zhenguo ekster la orienta pordo de Chang'an, kie li konstruis pagodon oriente de la templo por kulti la relikvon kaj propramane plantis tie kabanon, mem loĝis ĉe la pagodo. Ĉiumatene kaj vespere li incensis kaj balais, servante al la bonzomajstro same kiel tiu ankoraŭ vivas. Tiam Shunzong ankoraŭ estis kronprinco, loĝante en la Orienta Palaco. Li almozdonis 300 milojn da moneroj al Jia Chang por konstruigi halon de portreto de la Bonzo-Majstro Yunping kaj bonzejon. Li konstruigis ankaŭ domojn ĉirkaŭe por ke la luantoj pagu al Jia Chang. Sed ĉiutage Jia Chang manĝis nur vazon da kaĉo, trinkis ŝeng-on da akvo, dormis sur pajla mato, vestis sin per vatita robo, kaj la ceteron de la enspezo li uzis ĉiom por kulti Budaon.

Poste lia edzino Pan ankaŭ malaperis neniuj sciis kie.

En la jaroj de Zhenyuan-erao (785-804), Zhixin, la pli aĝa filo de Jia Chang, militservis en Bingzhou. Sekvante premieron Ma Sui, kiu oficveturis al la ĉefurbo por viziti la Kortegon, Zhixin venis al la kvartalo Changshou por viziti sian patron, sed Jia Chang kondutis kvazaŭ li havis nenian filon, simple rifuzis lian viziton kaj igis la filon foriri. Post sia reveno, Zhide, la dua filo de Jia Chang, vendis silkaĵojn en Luoyang kaj de tempo al tempo irrevenis inter Luoyang kaj Chang'an. Ĉiujare li sendis al Jia Chang oron, silkaĵojn kc., sed Jia Chang rifuzis ĉion.

Rezulte de tio, la du filoj ambaŭ foriĝis de li senrevene.

En la jaro de Yuanhe-erao (806-820), Chen Hongzu de Yingchuan kun amikoj iris tra Chunming-pordo. Ili vidis prosperajn bambuaron, cipresaron kaj flaris aromon de incensoj ŝvebantaj survoje. Descendinte de sia ĉevalo ili iris al la pagodo viziti s-ron Jia Chang. Aŭskultante lian parolon, ili eĉ ne rimarkis la falon de vespera krepusko. Jia Chang invitis Chen Hongzu tranokti tie en la bonzejo. Li parolis pri siaj deveno, travivaĵoj tre bonorde.

Poste la paroloj koncernis pri la administrado de la ŝtato kaj Chen Hongzu demandis pri la kaŭzoj de prospero kaj okazo de tumultoj en Kaiyuan-erao (713-741). Responde Jia Chang diris:

"Mi, maljunulo, iam flatakiris plaĉon al la imperiestro per kokoluktado en mia junaĝo. Lia

Majesto rigardis min kiel aktoron aŭ hetajron ks. Tiam mi loĝis plej ofte ekster palacoj. Kiel do mi povus scii pri aferoj de Kortego? Tamen mi ankaŭ havas ion por babili al vi. Iam mi vidis ke s-ro Du Xian, la altranga kortegano, armeestro de Qixi kaj kumula inspektoro, imponis al la landlimaj regionoj per ŝtataj prestiĝo kaj edifo. Mi ankaŭ vidis ke generalo Gesu Han, reganto de Liangzhou, kiu konkeris Shipu, garnizonis en Qinghai, komandis armeon iri al Bailong, transmarŝi la monton Congling disvastigante landlimon ĝis la Fera Pasejo, administris la kantonon Hezuodao, post sepfojaj promocioj fine iĝis inspektoro. Mi ankaŭ vidis ke s-ro Zhang Yue regis Youzhou. Ĉiujare li sendis tra pasejoj al la ĉefurbo grandajn ĉarojn plensargitajn per silkaĵoj, toloj, kolektitaj el Hejian, Jizhou kiel impostpagoj. La ĉaroj veturis unu post aliaj sinsekvante trapaŝante la pasejojn. Tamen tiuj senditaj al la imperiaj deponejoj, estis nur satenoj kaj krepoj el basenoj de riveroj Jangzi kaj Huaihe, brokatoj el Sichuan kaj amuziloj por virinoj en haremo. En Dunhuang de Hezhou-kantono la garnizono ekspluatis virgan teron. La rikoltaj grenoj, krom provizi bezonojn de landlimaj armeoj kaj popolanoj, estis transsenditaj unue al Lingzhou, poste pere de akva trafiko de la Flava Rivero al grenejoj en Taiyuan kiel rezervaĵoj por bezono de la regiono Guanzhong en malbonrikoltaj jaroj. Dume grenoj produktitaj en Guanzhong estis deponitaj de popolanoj en sia hejmo. Kiam la imperiestro Xuanzong vizitis al la kvin Sanktaj Montoj, liaj sekvantoj nombriĝis je miloj da ĉaroj kaj rajdoj, sed ili prenis neniom da greno de popolanoj. Okaze de novjara aŭ festaj tagoj en varma somero aŭ frosta vintro en libera tempo, mi, maljunulo, ofte promenis en foiroj hejmloke, ĉiam povis vidi ke oni vendas blankajn robojn kaj tolojn. Vizitante al najbaraj stratoj, mi vidis ke iu malsanulo volis kulti al dio kaj bezonis rulaĵon da nigra tolo sed nenie povis aĉeti malgraŭ kiom ajn da monoj li volis pagi. Fine li devis anstataŭigi nur per la nigra silka kapvolvaĵo. Lastatempe, kiam mi maljunulo eliris kun lambastono al stratoj kaj ĉirkaŭrigardis ĉiudirekten, sed mi povis vidi malpli ol cent homojn kiuj vestis sin en blanka robo. Ĉu homoj en nia lando ĉiuj foriris militservi? En la 12-a jaro de Kaiyuan-erao (724) estis publikigita edikto pri tio, ke kiam vakiĝis la posteno de vicministro, oni elektu unue el tiuj, kiuj iam funkciis kiel prefektoj, kiel kandidaton; kaj kiam vakiĝis la posteno de departementa estro, oni elektu unue el tiuj, kiuj iam funkciis kiel guberniestroj kiel kandidaton. Sed, lastatempe mi vidis ke 43 korteganoj kun pli malpli da renomo je justica kapablo estis forsenditaj ĉu kiel prefektoj aŭ kiel guberniestroj. Depost kiam mi loĝis ĉe la granda vojo, de tempo al tempo mi vidis prefektojn pretervojaĝantajn ripozi malrapide. Ili ĉiuj mienis malĝojaj, kun malkontento pri la elimina forsendo de Kortego al la foraj prefektujoj. En la jaroj de Kaiyuan-erao (713-741), kiam oni elektis ŝtatoficistojn, alte taksis bonvirton de la kandidatoj sed neniam nur laŭ ties beletra kapablo. Kion mi povas babili al vi, verŝajne nur tiom."

Finante sian parolon, Jia Chang ne povis deteni sin de larmado, kaj li daŭrigis: "Samtempe la imperiestra patro Xuanzong subigis norde hun-ojn, oriente regnon Jilin, sude regnon Nanzhao, kaj okcidente nacimalplimulton Kunyi. Ĉiun trian jaron ili humile vizitis al la Kortego en Chang'an. La ceremonio de aŭdienco estis tiel solena, kaj regalo de la Majesto estis tiel favora, grokataj vestoj kaj luksaj bankedoj estis donitaj al ili, ke ili revenu post sukcesaj plenumo de siaj taskoj, kaj neniu fremdulo estis permesata resti en la ĉefurbo longtempe loĝi.

Sed nun, la hun-oj el nordo venis al la ĉefurbo mikse loĝi vivante eĉ geedziĝante kun loĝantoj de la ĉefurbo kaj generi idojn. Tiel, ke junuloj de Chang'an estas sub influo de hun-oj. Rigardu, nun la formoj de ornamaĵoj, vestoj kaj botoj jam montriĝis nesamaj ol tiuj en pasinteco. Ĉu tio ne estas nenormala fenomeno?"

Aŭdinte tion, Chen Hongzu nur silentis, ne kuraĝante respondi, kaj foriris.

**Xue Tiao (830-872)**

# REVIVIĜO DE WUSHUANG

Wang Xianke estis nevo de s-ro Liu Zhen, kortegano dum Jianzhong-erao (780-783) de Tang-dinastio. Komence, post morto de sia patro, Wang Xianke venis vivi kune kun la patrino en la hejmo de sia onklo. S-ro Liu Zhen havis filinon nomatan Wushuang, kiu aĝis pli juna ol Wang Xianke je kelkaj jaroj. La du infanoj ofte ludis kune kaj edzino de s-ro Liu Zhen eĉ ofte ŝerce vokis Wang Xianke "bofilĉjo Wang".

Tiel pasis kelkaj jaroj. S-ro Liu Zhen prizorgis sian pliaĝan fratinton en vidvineco kaj la junan nevon tre favore. Iutage, la patrino de Wang Xianke grave malsaniĝis. Ŝi vokis s-ron Liu Zhen al si kaj diris kun peto: "Mi havas nur unu filon, kaj vi scias, kiom mi amas lin. Mi ege bedaŭras, ke mi ne povas ĝisvivi la tagon de lia edziĝo kaj ŝtatoficiŝtato. Via filino Wushuang estas bonvirta, bela kaj inteligenta. Mi ege amas ŝin. En estonteco, mi petas, vi edzinigu ŝin nepre ne al alia familio. Nun mi konfidas mian Xianke al vi! Se vi ĵesus mian peton, mi mortos kontenta sen ajna bedaŭro!"

"Kara franjo," diris s-ro Liu Zhen, "estu trankvila por zorgi pri via sano kaj ne ĝenu vin per tiaj aferoj!" Tamen lia pliaĝa fratino ne resaniĝis kaj mortis. Wang Xianke eskortis la ĉerkon de sia patrino al la hejmloko por ŝin entombigi en Dengzhou de Xiangyang.

Fininte la filan funebradon de tri jaroj, Wang Xianke pensis: "Kiel plena orfo nun mi vivas tro soleca. Mi ja devas edziĝi kaj multe generi por grandigi la idaron de mia familio. Supozeble Wushuang jam kreskis plenaĝa. Mia onklo ja havas altan rangon kaj okupas gravan postenon en la kortego, sed ĉu li nur pro sia imponeco rompos al mi la geedziĝa promeson?"

Sekve Wang Xianke preparis al si pakaĵojn kaj veturis al la ĉefurbo. Siatempe s-ro Liu Zhen funkciis kiel ministro kumula kolektanto pri ŝtata rento kaj imposto. Al lia luksa domo ĉiutage vizitadis multe da nobeloj aŭ gravaj korteganoj. Post saluto al sia onklo, Wang Xianke estis enloĝigita en kabineto, kie loĝis disĉiploj de s-ro Liu. La parenceco de onklo kaj nevo ankoraŭ ekzistis inter ili kiel antaŭe, sed Wang Xianke neniam aŭ dis de sia onklo eĉ mencion pri geedziĝo. Foje Wang Xianke subrigardis tra fenestra fendo kaj vidis kuzinon Wushuang, kiu, kun bela aspekto kaj eleganta sinteno, vidiĝas kiel feino. Pro arda amo al ŝi, Wang Xianke preskaŭ senprudentiĝis kaj nur timis pri la fiasko de sia geedziĝo. Wang Xianke do forvendis siajn pakaĵojn kaj ricevis milionojn da moneroj. Al la proksimaj lakeoj, ĉambristinoj kaj eĉ servoknaboj de la geonkloj Wang Xianke donis abunde da donacoj, kaj li ankaŭ multfoje regalis ilin per festenoj, tiel ke li akiris la privilegion libere iri diversloke ĝis la interna pordo. Rilate al la kuzoj kunvivantaj, Wang Xianke tenis sin ĉiam ĝentila kaj respektanta. Okaze de la naskiĝtago de onklino, Wang Xianke aĉetis kuriozajn donacojn por oferi al ŝi. Tio estas kapornamaĵoj el rinocera korno kaj bela jado, aĵure skulptitaj. La onklino ĝojegis.

Post ankoraŭ dekelkaj tagoj, Wang Xianke sendis maljunulinon al la onklino transdoni lian peton pri geedziĝo. La onklino respondis: "Tio ankaŭ estas mia deziro. Ni baldaŭ

interkonsiliĝos pri la afero."

Pasis tagoj, kaj ĉambristino konfidencis al Wang Xianke: "S-ino ĵus interkonsiliĝis kun nia mastro pri via geedziĝpeto, sed la mastro diris: 'Antaŭe mi neniam donis al li mian jes-promeson.' Ŝajne la fero eble iros ne tiom glate."

Aŭdinte tion, Wang Xianke dronis en tiel granda deprimiĝo, ke li neniel povis endormiĝi dum la tuta nokto, timante ke lia onklo donos kategorian rifuzon al li. Tamen Wang Xianke sintenis al li ankoraŭ tre diskreta kaj ĝentila, kuraĝante montri neniom da senskrupuleco. Iutage, s-ro Liu Zhen iris al la Kortego. En la horo de sunleviĝo, li subite revene en la domon, plene banita de ŝvitoj, kaj anhelante diris: "Ŝlosu la pordegon! Ŝlosu la pordegon!" La tuta familio dronis en paniko, ne sciante kio malbona okazis.

Nur post longa tempo, s-ro Liu Zhen diris: "Ribelis trupoj de Jingzhou kaj Yuanzhou. Komandante sian soldatojn, la armeestro Yao Lingyan sturmis en la halon Hanyuan. La imperiestro jam fuĝis el la palaco tra norda pordo, kaj ankaŭ multaj korteganoj postveturante direktis sin al la provizora rezidejo de la imperiestro. Pro zorgo pri miaj edzino kaj filino mi haste revenas por aranĝi familiajn aferojn." Kaj li sendis rapide alvoki Wang Xianke kaj diris al li: "Bone zorgu por mi pri aferoj en mia familio! Mi edzinigos Wushuang al vi!" Aŭdinte la parolon, Wang Xianke sentis surprizan ĝojon kaj danke riverencis

S-ro Liu Zhen do pakis siajn oron, arĝenton kaj silkaĵojn, ŝarĝigis per ili 20 ĉevalojn kaj diris al Wang Xianke: "Alivestu vin en plebanon, eskortu tiujn objektojn ekster la urbon tra la urbopordo Kaiyuan, trovu izolitan hotelon, tie atendu; mi kaj via onklino kaj Wushuang elurbiĝos tra la urbopordo Qixia. Ni ĉirkaŭiros laŭ urbomuro kaj venos renkonti vin post nelonge."

Wang Xianke agis laŭ lia ordono. Ĝis sunsubiro, Wang Xianke atendis longan tempon en hotelo ekster la urbo, sed nenies alvenon li ĝisatendis.

Ekde posttagmezo la urbopordo Kaiyuan jam estis ŝlosita kaj Wang Xianke povis vidi nenion en la sudo. Li do rajdante sur ĉevalo kaj tenante torĉon veturis laŭ urbomuro kaj venis al la pordo Qixia. Ankaŭ tie la urbopordo estis ŝlosita. Estis ne malmultaj gardantoj starantaj aŭ sidantaj, ĉiuj kun blanka ligna bastono en siaj manoj.

Wang Xianke saltis desur la ĉevalo kaj demandis al ili: "Kio okazis en la urbo? Kial tiel severe vi gardas?"

Kaj li ankaŭ demandis: "Kiuj elveturis hodiaŭ tra ĉi tiu pordo?"

"Marŝalo Zhu Ci jam surtroniĝis," respondis la gardantoj. "Hodiaŭ posttagmeze iu homo kun ĉapo sur sia kaptuko, kunportante 4 aŭ 5 virinojn, volis forveturi el tiu ĉi pordo. Lokanoj ĉiuj rekonis en li ministron s-ron Liu, sekve la pordogardanta pedelo ne kuraĝis ellasi ilin. En la

tempo ĉ. vesperiĝo, persekutantaj rajdosoldatoj alvenis kaj forpelis ilin ĉiujn al nordo."

Aŭdinte tion, Wang Xianke neniel povis reteni sin de plorego. Vole-nevole li revenis al sia hotelo. Ĉe noktomezo, la urbopordo subite malfermiĝis kaj sennombraj torĉoj lumigis tiel hele kiel en la tago.

Soldatoj ĉiuj tenis armilojn en siaj manoj kaj senĉese laŭte kriis ke la sendito Persekutanto veturas el la urbo por traserĉi fuĝintajn korteganojn en antaŭurbo.

Surprizite Wang Xianke forlasis ĉiujn ĉevalojn kun pakaĵoj kaj forfuĝis en paniko.

Li revenis al Xiangyang kaj tie loĝis en kamparo tri jarojn. Poste, Wang Xianke informiĝis ke la imperia armeo jam rekonkeris la perditajn urbojn kaj ordo restariĝis al la metropolo kaj paco revenis al la imperio. Tiam li reveturis al la metropolo por serĉi informon pri sia onklo.

Kiam Wang Xianke venis al la Suda Xinchang-strato kaj haltis, ne sciante kien sin direkti, subite iu sin ĵetis riverenci antaŭ lia ĉevalo. Zorgeme observante, Wang Xianke trovis ke tiu ja estis Saihong, la malnova servisto. origine Saihong estis denaska servutulo en familio Wang. Ĉar la onklo de Wang Xianke ofte disponis lian servon kaj trovis lin tre kapabla, tial li restigis Saihong ĉe si. Nun, ĉe renkontiĝo Wang Xianke kaj Saihong interpretis siajn manojn unu al la alia kaj ambaŭ larmis.

Wang Xianke demandis al Saihong: "Kiel fartas miaj geonkloj?"

"Nun ili ambaŭ vivas en la domo en Xinghua-kvartalo." respondis Saihong.

Wang Xianke ĝojege diris: "Ho, mi tuj iru viziti ilin!"

"Nun mi jam estas liberulo," diris Saihong al Wang Xianke. "La mastro, ĉe mi loĝas, havas negrandan domon kaj vivtenas sin per vendado de silko. Nun estas jam tro malfrue, do mi petas, ke vi tranoktu portempe en tiu domo kaj estas ne maloportune ke morgaŭ ni kune vizitos viajn geonklojn."

Saihong do kondukis Wang Xianke al sia loĝejo kaj regalis lin tre kompleze per abunde da pladoj. Nur post vesperiĝo Saihong malkaŝe sciigis al Wang Xianke: "Ĉar ministro Liu akceptis la enoficigon far la pupa Kortego kaj funkciis kiel kortegano de Zhu Ci, tial li kaj lia edzino ambaŭ estis kondamnitaj al morto. Ankaŭ f-ino Wushuang estis konfiskita kiel servistino en imperiestra palaco."

Aŭdinte tion, Wang Xianke eksplodis per malĝojega plorado pri la fatalaĵ o okazinta al familio Liu, kaj lia malfeliĉo kortuŝis ĉiujn najbarojn.

"Kvankam la mondo estas senlime vastega, tamen mi vivas tiel soleca jam kun nenia parenco kaj tute ne scias kie estas la loko por mia vivado."

Wang Xianke diris al Saihong kaj demandis: "Kiu el la malnovaj familianoj de s-ro Liu nun ankoraŭ postrestas?"

"Nur unu, Caiping, ĉambristino de f-ino Wushuang, nun servas en la domo de generalo s-ro Wang Suizhong."

"Ho ve! Jam neniigis ŝanco por mia revido kun f-ino Wushuang, "diris Wang Xianke, "tial, se mi havus la ŝancon revidi Caiping, mi sentos kontenton eĉ je kosto de mia vivo!"

Wang Xianke do preparis vizitkarton sub la nomo de nevo kaj vizitis Wang Suizhong kaj detale rakontis al li pri ĉio okazinta. Wang Xianke esprimis sian deziron elaĉeti Caiping per kara pago. Ĉar s-ro Wang Suizhong tre alte taksis personecon de Wang Xianke kaj kortuŝigis de lia travivaĵo, sekve li konsentis la peton de Wang Xianke.

Wang Xianke luis domon kaj loĝis kune kun Saihong kaj Caiping. Saihong ofte diris al Wang Xianke : "Iom post iom pligrandiĝis via aĝo, kaj vi devas klopodi por akiri ian oficon. Nun, vi lasas vin dronanta ĉiam en tristo, do kiel vi pasigus la postajn tagojn?"

Konvinkite de Saihong, Wang Xianke turnis sin al generalo s-ro Wang Suizhong por peti ties helpon.

S-ro Wang Suizhong rekomendis Wang Xianke al s-ro Li Qiyun, estro de la metropolo. Kaj, laŭ la ofico de la patro de Wang Xianke, s-ro Li Qiyun nomumis lin estro de poŝta stacio Changle sub la titolo de guberniestro de Fuping.

Forpasis monatoj. Subite venis sciigo, ke palaca sendito eskortos 30 palacanojn en 10 feltĉaroj al la imperiestra maŭzoleo por tie servi kaj ili devos tranokti en Changle-stacio.

Post kiam ĉiuj ĉaroj estis bonorde akceptitaj en remizo, Wang Xianke diris al Saihong: "Mi informiĝis ke multaj el la palacanoj estas filinoj de altranguloj, sekve mi havas necertan supozon, ĉu Wushuang ankaŭ troviĝis inter ili? Tial mi petas vin sondi pri tio, ĉu vi povus?"

"La palacanoj nombriĝas je miloj, ĉu okazos tiel hazarde ke mi sukcesus vidi Wushuang?"

"Sed vi iru provi, kaj ĉu eventuale okazus io ne atendita?"

Kaj Wang Xianke sendis Saihong kiel pedelon de la stacio, kiu prizorgas teon ekster la loĝejo de la palacanoj. Wang Xianke donis al Saihong tri milojn da moneroj kaj admonis al li, dirante: "Ĉiam restu ĉe la te-servico kaj neniam foriru eĉ por minuto. Se vi vidos ion, rapide sciigu al mi!"

Saihong jesis kaj iris labori.

Ĉiuj palacanoj restis kaŝite post la kurteno tiel ke Saihong povis nenion el ili sed nur aŭdis



iliajn bruajn babilojn en nokto.

Noktomeze, kiam silentiĝis ĉia sono, Saihong lavis teservicojn, gardis fajron en forno kaj tute ne kuraĝis endormiĝi. Subite aŭdiĝis voĉo el post la kurteno kiu vokis lin: "Saihong, Saihong, kiel vi povus scii ke mi troviĝas ĉi tie? Ĉu sinjoro Wang fartas bone?"

Fininte la parolon ŝi ekploris singulte.

"Nun la sinjoro estas prizorganto de ĉi tiu stacio." respondis Saihong.

"Hodiaŭ, ĉar li supozis, ĉu ankaŭ vi troviĝas ĉi tie inter la homamaso, tial li sendas min saluti vin."

Aŭdiĝis parolo de Wushuang: "Ho, nun mi ne povas paroli pli multe. Morgaŭ, post nia foriro, vi serĉu kaj trovu sub la purpura kuseno en la nordorienta ĉambro mian leteron al la sinjoro!"

Dirinte tion, ŝi foriris. Post momento, ekaŭdiĝis bruo post la kurteno, kie oni alarmis: "Ho ve! La palacanino eksvenis malsana!"

La palaca sendito tre urĝe postulis drog-dekoktaĵon, kaj la sveninto ja ĝuste estis Wushuang.

Saihong rapidis raporti tion al Wang Xianke. Ege surprizite Wang Xianke diris: "Ho, kiel mi povus vidi ŝin?"

Saihong konsilis, dirante: "Nun oni riparas la ponton super Weishui-rivero. Vi povus ŝajnigi vin estro de la pontriparistoj kaj staru tie por atendi la preterveturantajn ĉarojn. Se Wushuang rekonos vin, ŝi certe levos la kurtenon kaj tiel vi sukcesos vidi ŝin."

Wang Xianke agis efektive laŭ la konsilo de Saihong. Kiam preterveturis la tria ĉaro, la kurteno, ĝuste kiel atendite, estis levita kaj Wang Xianke vidis ke interne en la ĉaro efektive sidas Wushuang! Wang Xianke estis ŝarĝita mikse de malĝojo, ekscitiĝo, ĉagreno kaj sopiro kaj li apenaŭ povis sin deteni. Dume Saihong trovis sub la litkuseno en la ĉambro la leteron de Wushuang al Wang Xianke. En kvin leterpaperoj kun presitaj desegnoj Wushuang detale skribis pri ĉio okazinta al ŝi misfortune. Legante la leteron, Wang Xianke larmis kun granda bedaŭro konsciente pri ilia disiĝo poreterna.

Sed en la postskribo de la letero ŝi skribis: "De revizoro mi ofte aŭdis, ke oficiro nomata Gu en Fuping estas homo kun fervora helpemo, al kiu oni povas turniĝi dum sia mizero. Ĉu vi povas peti lian helpon?"

Wang Xianke do sendis al sia superulo peticion pri eksigo de sia ofico de la poŝta stacio kaj reveno al la posteno de guberniestro de Fuping.

Poste Wang Xianke ekserĉis oficiron Gu kaj trovis lin en kampara vilao. Dum tuta jaro Wang

Xianke frekventis Gu kaj ĉiamaniere kontentigis liajn dezirojn, donacinte al li sennombre da brokaĵoj kaj juveloj. Sed pri sia peto Wang Xianke ellasis eĉ nenium vorton dum tiu tempo. Kiam finiĝis lia servodaŭro, Wang Xianke senofice loĝis en la gubernio.

Iun tagon, Gu venis vidi lin kaj diris: "Mi, Gu Hong, estas nur kruda soldato en kaduka aĝo, kiu jam ne multe povas fari por aliaj, sed vi traktis min per tro granda favoro, kaj mi sentas ke vi verŝajne volas ion de mi. Mi estas kavalireca dankemulo, kaj volonte repagi al via profunda amikeco eĉ je kosto de mia vivo."

Wang Xianke kun larmoj riverencis kaj senkaŝe rakontis al li pri ĉio okazinta.

Levante sian vizaĝon al la ĉielo kaj frapante per mano al sia kapo plurfoje, Gu diris emocie: "Ho, tio estas tro malfacila! Sed mi certe provu vin helpi, tamen ne aspiru pri baldaŭa rezulto!"

Wang Xianke refoje riverencis kun dankemo al li kaj respondis: "Mi nur esperas revidi ŝin dum ni ankoraŭ vivas, sed ne zorgas kiom longe mi devas atendi!"

Duonjaro pasis sen informo. Iutage, homo frapis je la pordo de Wang Xianke. Jen letero sendita de Gu, kiu legiĝas: "Mia sendito al Maoshan-monto jam revenis. Tuj venu al mi!"

Wang Xianke galopis senprokraste, sed Gu diris nenion. Wang demandis pri lia sendito, kaj Gu respondis: "Mi jam mortigis lin. Trinku iom da teo!"

Noktomeze, Gu demandis al Wang Xianke: "Ĉu vi havas servistinon en via domo kiu konas Wushuang?"

Wang Xianke menciis Caiping kaj tuj alvenigis ŝin. Post atenta observado al ŝi, Gu ĝoje ridis kaj diris: "Mi volas prunti ŝin por kelkaj tagoj. Nun vi povas reveni!"

Post tagoj, subite cirkulis onidiro, ke altrangulo veturis pretr la gubernio kaj unu el la palacaninoj servantaj en maŭzoleo estis mortpunita. Wang Xianke sentis maltrankvilon kaj surprizon. Li sendis Saihong informiĝi kaj eksciis ke la ekzekutita knabino ĝuste estis Wushuang. Wang Xianke eksplodis per korŝira plorego, veante: "Mi ja esperas helpon de Gu, sed nun Wushuang jam mortis. Kion fari?" Li larmis kaj ĝemveadis, tute ne povante sin regi.

Tiun saman nokton, post noktomezo, Wang Xianke aŭdis urĝan frapadon je pordo kaj, kiam li malfermis la pordon, li trovis Gu kunportanta grandan bambuan korbon.

"Ene kuŝas Wushuan," Gu diris al li, "laŭ ĉio aspekte nun ŝi estas morta, sed ŝia koro ankoraŭ restas iomete varma kaj ŝi reviviĝos postmorgaŭ. Vi povas doni al ŝi iom da drog-dekokaĵo, sed nepre tenu ŝin en trankvilo kaj sekreto!"

Wang Xianke brakume portis la knabinon en ĉambron kaj li sola gardis ŝin. en mateno ŝia

korpo jam fariĝis varma kaj ŝi malfermis siajn okulojn.

Sed, ekvidante Wang, Wushuang kriis plore kaj refoje svenis. Wang Xianke donis al ŝi urĝan savon kaj flegon ĝis vespero kaj nur tiam ŝi rekonsciiĝis.

Gu diris al Wang Xianke: "Mi devas ankoraŭfoje prunti Saihong por fosi kavon post la domo." Kiam la kavo estis fosita iom profunde, Gu subite eltiris sian glavon kaj dehakis la kapon de Saihong, kaj la kapo rulfalis en la kapon. Tio timigis Wang Xianke, sed Gu diris al li: "Ne timu, sinjoro! Hodiaŭ mi rekompencas al via granda favoro. Mi aŭdis ke taoistoj de Maoshan-monto havas sorĉan medicinaĵon. Tiu, kiu prenis la medikamenton, tuj mortis sed reviviĝos post tri tagoj. Mi sendis peti pri tio kaj ricevis unu pilolon. Hieraŭ, laŭ mia aranĝo Caiping ŝajnis sin komisiito el imperiestra palaco kaj donis al Wushuang tiun pilolon, ordonante ŝin memmortigi pro ŝia rilato kun la ribela partio. Poste, mi veturis al la maŭzoleo kaj sub la masko kiel ŝia parenco mi elaĉetis ŝian 'kadavron' per cent ruloj da silkaĵoj. Mi ankaŭ donis abunde da subaĉetoj al ĉiuj koncernatoj tra la tuta vojo por sekretigi la aferon. La senditon al Maoshan-monto por la pilolo kaj ĉiujn portintojn de la korbo mi jam mortigis sur kampo ekster la urbo. Ankaŭ min mem mi mortigos por vi.

Vi ne devas resti ĉi tie pli longe. Ekster la pordo atendas dek portistoj, kvin ĉevaloj kaj ducent ruloj da silkaĵoj. Frumatene, ĉ. la 4-a horo vi kaj Wushuang forveturu, ŝanĝu viajn nomojn kaj forvagu por eviti persekuton."

Dirinte tion, Gu eklevis sian glavon, Wang Xianke haste sin ĵetis por malhelpi al li, sed la kapo de Gu jam estis dehakita. Wang Xianke do enterigis la kapon kun la korpo de Gu.

Antaŭ heliĝo Wang Xianke kaj Wushuang ekveturis kaj ili vagis diversloke en Sichuan-provinco. Poste tra la rivergorĝoj ili venis al Jiangling, kaj tie loĝis por certa tempo. Kiam ili aŭdis nenian alarman informon el la metropolo, Wang Xianke kaj lia edzino revenis al sia domo en Xiangyang, kie ili travivis sian vivreston kaj havis multajn idojn.

Ho ve! Estas ja tro multe da renkontiĝoj kaj disiĝoj en la vivo de homoj, sed mi aŭdis nenion alian kompareblan al la supredirita okazaĵo, kiun mi ofte nomis unika en historio. Wushuang suferis konfiskiĝon en tumulta erao, sed Wang Xianke restis dumvive fidela je sia amo kaj finfine akiris ŝin, dank' al la helpo per la mirinda metodo de Gu. Maljuste mortigitaj homoj nombriĝis je pli ol dek. Post tiom multe da malfaciloj ili sukcesis reveni al sia hejmloko kaj kune vivis kiel geedzoj 50 jarojn. Ho, kiel mirinda rakonto!

**Niu Sengru (779-847)**

# LA BRAVAĴO DE SINJORO GUO YUANZHEN

Dum Kaiyuan-erao (713-741) de Tang-dinastio s-ro Guo Yuangzhen, kiu poste fariĝis Daiguo-duko, malsukcesis en ŝtata ekzameno kaj vojaĝis de Linfen al Fengyang. En nokta irado li perdis sian vojon. Post longtempa misirado li ekvidis antaŭ si en tre malproksima loko flagron de lamplumo, kion s-ro Guo prenis por signo de loĝantoj kaj direktis sin tien. Post ankoraŭ 8 aŭ 9 lioj da irado li venis al domo kun tre altaj konstruaĵoj kaj pordo.

Enirinte tra la pordo, s-ro Guo rimarkis ke en la koridoroj kaj halo estis brilaj kaj kandeloj kaj rite aranĝitaj oferaĵoj. Jen ĉio montris kvazaŭ spektaklo verŝajne de familio kiu okazigas nupton por sia filino sed, je lia miro, tie regis sufoka kvieto kaj vidiĝis neniuj homoj. S-ro Guo ligis sian ĉevalon antaŭ la okcidenta koridoro, supreniris laŭ ŝtuparo en la halon kaj heziteme tie iris ien-reen, ne sciante kiun lokon li alvenis.

Subite aŭdiĝis el la orienta ĉambro en la halo singultaj plorĝemoj de knabino.

S-ro Guo do laŭte demandis: "Kiu ploras tie? Ĉu vivanto? aŭ nur fantomo? Kial en tiel solene nupte-aranĝita halo troviĝas neniuj homoj sed nur vi sola ploras?"

La ploranta knabino respondis: "En mia hejmvilaĝo troviĝas ĉi tie templo de la Nigra Generalo, kiu havas la sorĉan povon faligi feliĉon aŭ misfortunon al homoj. Ĉiujare li postulis de la lokanoj oferon de nova edzino, kaj la lokanoj devigite elektis el virgulinaj belan knabinon kaj edzinigis ŝin al li. Mi, kvankam estas malbela vilaĝa knabino, tamen, ĉar mia patro monavidas pri la promesita premio-nuptdonaco de 500 miloj da moneroj, li kaŝe konsentis doni min kiel oferaĵon-novedzinon al la Nigra Generalo. Hodiaŭ vespere knabinoj de la vilaĝanoj venigis min ĉi tien sub preteksto de ekskurso al festeno. Ili intence ebriigis min kaj lasis min sola en tiu ĉi ŝlose fermita ĉambro por oferedoni min al la Nigra Generalo. Ho ve, mi estas forlasita de miaj gepatroj al perejo. Nun mi estas atakita de timo kaj malĝojo. Ho, s-ro, ĉu vi vere estas homo? Se vi favore savus min el la malfeliĉo, mi volonte estu via servistino dum mia tuta vivo!" S-ro Guo sentis grandan indignon kaj demandis: "Kiam alvenos la t.n. Nigra Generalo?"

"Ĉirkaŭ noktomezo." respondis la knabino.

"Ho, mi estas viro, do mi certe savos vin per mia tuta forto," diris s-ro Guo. "Eĉ se mi ne sukcesos, mi volonte akompanos vin al kunmorto, certe ne lasos vin vane morti sub turmento de la malĉasta fimonstro!"

Aŭdinte la konsolajn vortojn, la knabino iom ĉesigis sian plorĝemadon. S-ro Guo do eksidis sur la okcidenta ŝtuparo kaj translokigis sian ĉevalon al la nordo de la halo. Li ordonis sian serviston stari antaŭe, kaj, ŝajnigante sin kvazaŭ edzo-amiko, s-ro Guo atendis tie.

Post momento, sub prilumado de torĉoj alvenis multe da kaleŝoj kaj ĉevaloj. Du purpure

vestitaj pedeloj eniris kaj returnen eliris, dirante: "Ho, troviĝas ĉi tie la ĉefministro!"

"Post nelonge, eniris du pedeloj en flava robo kaj tuj returnen eliris, ankaŭ dirante: "Ho, jen la ĉefministro troviĝas ĉi tie!"

Aŭdinte tion, s-ro Guo sentis kaŝan ĝojon kaj li subdiris al si: "Ha, se mi la ŭ destino fariĝos ĉefministro, do mi certe venkos super la monstro!"

Jen la generalo descendis de sia kaleŝo. la pedeloj avangardaj raportis al li. Tiam la generalo ordonis, dirante: "Eniru!"

Armitoj kun lancoj, glavoj, pafarkoj kaj sagoj eskortis lin eniri la domon kaj venis al la orienta ŝtuparo.

S-ro Guo sendis sian serviston raporti anoncanta al la generalo: "Mia mastro s-ro Guo, kandidato por ŝtata ekzameno, petas intervidiĝon kun Via Moŝto!"

Kaj s-ro Guo faris riverencon.

La generalo komplimentis, dirante: "Ho, s-ro Guo, kio favore venigis vin ĉi tien al ni?"

S-ro Guo respondis: "Ĉar mi informiĝis ke hodiaŭ vespere okazos la nupto por Via Generala Moŝto, kaj mi volantas funkcii kiel la akompananto-amiko de la novedzo en via festo."

Aŭdinte tion, la generalo tre ĝoje invitis lin sidiĝi. Ambaŭ do sidiĝis vid-al-vide kaj kunmanĝis interbabilante kun granda ĝojo. S-ro Guo havis en sia sako akran ponardon, per kiu li volis murdi la generalon kaj li ekdemandis: "Generala Moŝto, ĉu vi iam manĝis sekigitan cervaĵon?"

Tiu respondis: "Ĉi tie oni malfacile trovas ĝin."

"Sed mi havas iomete da tia manĝaĵo, kiun mi akiris de la imperiestra kuirejo, kaj nun mi volas distranĉi ĝin por prezenti al vi." diris s-ro Guo. La Nigra Generalo tre ĝojis pri la propono. S-ro Guo do stariĝis, elprenis la sekigitan cervaĵon kaj sian ponardon, per kiu li komencis tranĉi. La detranĉitajn pecojn de la cervaĵo li metis en teleron, ke la geberalo mem prenu. La Nigra Generalo ĝoje etendis sian manon por alpreni, tute ne suspektante pri ia malbona eventualaĵo. Profitante lian sengardemon s-ro Guo forpuŝis la cervaĵon, ekkaptis lian antaŭbrakon kaj detranĉis ĝin. La Nigra Generalo ekkriis kaj dorrapidis. Ankaŭ liaj sekvantoj diskuris for surprizite.

Tenante la detranĉaĵon, s-ro Guo demetis sain vestaĵon kaj per tio involvis ĝin. Li ordonis sian serviston eliri observi ekstere, sed ĉie regis nur kvieto kaj vidiĝis nenio eksterordinara. S-ro Guo do malfermis pordon de la orienta ĉambro kaj alparolis al la ploranta knabino: "Rigardu, jen la detranĉita antaŭbrako de la Nigra Generalo! Kaj, laŭ liaj sangospuroj, ni havas la

motivon kredi, ke li baldaŭ mortos. Nun vi jam estas liberigita de la malfeliĉo; do eliru iom manĝi!"

La ploranta knabino do eliris. Ŝi havis aĝon de 17 aŭ 18 jaroj kaj aspektis tre bela. Ŝi ĵetis sin surgenue antaŭ s-ro Guo kaj diris: "Lasu min servi al vi dum mia tuta vivo! S-ro Guo konsolis ŝin per afablaj vortoj.

Kiam apenaŭ tagiĝis, s-ro Guo malvolvis la pakaĵon kaj ektrovis, ke la detranĉita antaŭbrako estis piedo de porko.

Jen aŭdiĝis ploroj, kiuj venis pli kaj pli proksimen. Tio ja estis grupo el la gepatroj kaj fratoj de la knabino kaj renomaj grandaĝuloj en la vilaĝo. Ili venis kunportante ĉerkon por sepulti la restaĵojn de la knabino. Vidante ke la knabino estas viva kaj apud ŝi estas nekonata sinjoro, ili tre miris kaj demandis. S-ro Guo rakontis al ili pri ĉio okazinta en la nokto. Tiam la grandaĝuloj ĉiuj ekkoleris pro tio, ke s-ro Guo ofendvundis la dion, kiun ili kultis kun granda estimo.

La grandaĝuloj diris: "La Nigra Generalo ja estas dio reganta nian lokon, kaj ni kultis lin jam delonge. Ĉiujare ni oferis al li novedzinon kaj per tio ni akiris pacon kaj sekurecon. Kaj, se ni donus la oferaĵon-knabinon nur kun iom da prokrastiĝo, tuj falos sur nin katastrofaj uragano, ŝtormo, tondro kaj hajlo. Kial vi, fremda vojerarinto, aŭdacas nian sanktan dion? Post tiu perforta evento, do kiu dio povus gardi nin? Nun ni devas mortigi vin por konsekri al la Nigra Generalo, aŭ, almenaŭ ni devas aresti vin kaj sendi al la guberniestro."

Kaj ili ordonis al junaj vilaĝanoj ekkapti s-ron Guo. Tiam s-ro Guo diris: "Vi havas nur grandan aĝon sed ne grandan saĝon, dum mi estas vere prudenta en la mondo. Do, aŭskultu mian parolon! Ke dio laŭ volo de la Ĉielo regas iun lokon, ĉu tio ne similas al feŭduloj kiuj diligente regas sian feŭdon laŭ ordonon de imperiestro?"

"Ho, jes!" konsentis ĉiuj aŭskultantoj.

Kaj s-ro Guo daŭrigis: "Se la feŭduloj nur ĉasas voluptaĝojn en sia propra feŭdo, ĉu la imperiestro ne koleros? Se la feŭduloj nur kruele persekutis siajn popolanojn, ĉu la imperiestro ne sendos trupon por ilin puni? Se tiu, kiun vi nomas generalo, estas vera dio, kial do tiu havas piedon de porko? Ĉu la ĉiela imperiestro prenis malĉastan beston kiel sian komisiiton? Sciu, la malĉasta besto ja estas krima bruto en la mondo. Se mi ekzekutis ĝin laŭ justeco, ĉu tio estas riproĉinda? Inter vi ne troviĝas prudentulo, tiel ke ĉiujare okazas veinda morto al viaj knabinoj pro la fia monstro. Tiaj krimoj amasiĝis jam tiel multe ke ankaŭ la Ĉielo sentas indignon pro tio. Ĉu ne estas eble, ke la Ĉielo punu pere de mia mano? Agu laŭ miaj vortoj! Mi ekstermu por vi la fian monstron kaj forigu de vi ĉifoje por ĉiam la malfeliĉon ĉiujare oferi virgulinon, ĉu bone?"

Eklumigite de la vortoj, la vilaĝanoj tre ĝojis kaj respondis unuvoĉe: "Ni volonte obeu al via

instruo!" S-ro Guo do ordonis al la centoj da vilaĝanoj kunvokitaj, ke ili kunportu armilojn kiaj pafarkoj, sagoj, glavoj, lancoj kaj ŝoveliloj, kaj ekmarŝu lin sekvante. Ili serĉis laŭ la sangospuroj, kaj, post irado de 20 lioj, ili rimarkis ke la sangospuroj direktis sin en grandan tombokavon. Ili do sieĝis tie kaj komencis fosi. Iom post iom vidiĝis truo kiel aperturo de vazo. S-ro Guo ordonis kolekti brullignojn, ilin bruligi kaj enĵeti en la kavon por prilumi. Interne la tombkavo havis kavernon grandan kiel ĉambro, kie giganta porko sen maldekstra antaŭpiedo kuŝis surtere sangomakulita. La porkego rapide eliris tra fumo, sed mortis sub la ĉasado.

Nun la vilaĝanoj jubilis kun granda ĝojo. Ili kolektis sumon da mono por doni kiel rekompencon al s-ro Guo. Sed s-ro Guo fordankis dirante: "Mi agis ja por forigi malutilon al popolanoj, sed ne por vendi ĉasaĵon."

La elsavita knabino faris adiaŭon al siaj gepatroj kaj parencoj, dirante: "Dank' al via favoro mi havis la feliĉon fariĝi via sangfamiliano. Vivante ĉiam nur en mia buduaro, certe mi faris nenian kulpon, pro kiu mi meritis morton. Tamen, pro 500 miloj da moneroj, vi konsentis edzinigi min al la monstra bestaĉo, eĉ forlasis min en serurita ĉambro, ĉu tio estas ago de homo? Se mi ne estus savita de la bonkora brava s-ro Guo, ĉu mi ankoraŭ havus vivon hodiaŭ? Sekve mi povas tiel diri, ke mi estas forlasita de miaj gepatroj al morto sed feliĉe revivigita de s-ro Guo. Tial nun mi volonte fariĝu sekvanto de s-ro Guo kaj ne plu okupos min per la malnova hejmloko!" larmante la knabino riverencis al s-ro Guo kaj petis lian akcepton.

S-ro Guo per ĉia motivo persvadis ŝin resti en sia propra hejmo ĉe la gepatroj, sed ŝi neniom ŝanĝis sian decidon. Vole-nevole, s-ro Guo akceptis ŝin kiel kromedzinon, kiu poste naskis por li plurajn filojn. S-ro Guo poste fariĝis nobla altrangulo. Ĉar ĉio okazis laŭ antaŭdestino, tial, kvankam li troviĝis en fremda loko kaj eĉ en templo de fantoma monstro, tamen tio neniel povis kaŭzi malfeliĉon al li, tio ja estas evidenta.





## LA TRIA INO DE BANQIAO-GASTEJO

En Tang-dinastio, okcidente de Bianzhou troviĝas hotelo de Banqiao. La mastrino, Tria Ino, kies devenon neniu scias, estis vidvino pli ol 30-jara, sen ido kaj parencoj. Kun kelkaj domoj, ŝi okupis sin per mastrumado de la hotelo, sed sufiĉe riĉa, kun multaj azenoj en la stalo, kiujn ŝi ofte vendis je malkara prezo al la veturigistoj, ĉu ofica aŭ privata, al kiuj nur se mankas forta ŝarĝbruto. Per tio ŝi akiris al si bonan famon. Tial pasaĝeroj ofte emas viziti al ŝia hotelo.

Dum Yuanhe-erao (806-820), Zhao Jihe, pasaĝero de Xuzhou, dum sia vojaĝo al la Orienta Ĉefurbo restis tie tranokti. Ses aŭ sep gastoj venis jam pli frue kaj okupis respektive la pli oportunan liton. S-ro Zhao, la malpli frua, ricevis liton plej internan, tuj apud la muro najbare de la ĉambro de la mastrino.

La Tria Ino regalis la gastojn per tre abunde da manĝaĵoj. En malfruaj horoj ŝi prezentis vinon kaj ili kune ĝuis la drinkadon tre ĝoje. S-ro Zhao, kvankam maldrinkema, ankaŭ partoprenis en la gaja babilado. En la horo malpli frua ol la dua nokta gardoperiodo, la gastoj ebriiĝintaj ĉiuj iris al sia lito. Ankaŭ la Tria Ino revenis al sia ĉambro, fermis la pordon kaj estingis la kandelon.

Ĉiuj dormis profunde, nur s-ro Zhao neniel povis endormiĝi. Aŭskultante susuron el la najbara ĉambro de la Tria Ino, li sentis, kvazaŭ ŝi ion movis. Hazarde li subrigardis tra fendeto kaj vidis ke la Tria Ino prenis kandelon el sub kovrilo kaj ĝin lumigis. Poste, ŝi prenis el kesto plugilon, lignajn bovon kaj pupon, kun grandeco respektive nur de ses aŭ sep coloj. Metinte ilin antaŭ la forno ŝi ŝprucigis per plenbuŝo da akvo kaj la du lignaĵoj ekmoviĝis. La ligna pupo jen plugis malgrandan terpecon antaŭ la lito, bridante la lignan bovon ir-revenen. Dume la Tria Ino prenis ree de la kesto sakon da fagopirsemoj, kion ŝi donis al la ligna pupo ke li semu. Dum palpebruma momento la semoj ekfloris, kreskis kaj maturiĝis fagopiroj, kion la ligna pupo rikoltis. Tiam la Tria Ino starigis etan muelilon. Farinte farunon, ŝi remetis la pupon, lignaĵon k.c. en la keston, kaj per la faruno ŝi faris kelkajn dabingojn.

Baldaŭ kokerikis. La gastoj ekvojaĝos. La Tria Ino ellitiĝis la unua. Ŝi lumigis la kandelojn, aranĝis manĝotablon, sur kiu ŝi metis la novbakitajn dabingojn kiel manĝaĵojn de la gastoj. Tiam ekfulmis ideo ĉe s-ro Zhao. Li subite foriris haste, sed fakte nur embuskis sin ekstere de la domo kaj subgvatis. Li vidis ke la gastoj kunsidis ĉirkaŭ la tablo kaj man ĝis la dabingojn. Apenaŭ fininte la manĝon, subite ili falis teren kun azena heno kaj dum palpebrumo ĉiuj jam transformiĝis en azenojn, kiujn la Tria Ino senescepte pelis al la stalo en la posta korto de la hotelo kaj kies riĉaĵojn ŝi alproprigis ĉiom.

Tion s-ro Zhao malsekretigis al neniu. Post pli ol unu monato, li revenis de la Orienta Ĉefurbo. Antaŭ ol atingi la hotelon de Banqiao, li faris anticipe fagopiran dabingon, same grandan kiel tiu de la mastrino. Atinginte li ree loĝis en la hotelo. La Tria Ino varme bonvenigis lin kiel lastfoje. Tiun vesperon estis neniu alia gasto kaj la regalo estis pli abunda. En malfrua nokta

horo, ŝi afable pridemandis kion la gasto deziras. S-ro Zhao petis ke la mastrino preparu iom da matenmanĝo la sekvantan matenon antaŭ lia ekveturo. La Tria Ino respondis al la gasto ke estu trankvila pri tio. Noktmeze, s-ro Zhao subrigardis ke ĉio okazis kiel antaŭe. Je matenkrepusko, la Tria Ino preparis manĝopladon kun manĝaĵoj, fruktoj kaj kelkaj dabingoj. Fininte tion, ŝi foriris por alia objekto.

Profitante tiun ŝancon s-ro Zhao tuj aliris kaj ŝanĝis unu per sia antaŭ preparita dabingo. Tion la mastrino sciis neniom. Antaŭ sia ekveturo s-ro Zhao iris al matenmanĝo. Li diris al la Tria Ino: "Okaze mi mem havas dabingojn, do, forprenu la viajn por regali aliajn gastojn." Li ekprenis sian dabingon manĝi. Ĝuste kiam li manĝis, la Tria Ino venas kun teo, s-ro Zhao diris: "Kara mastrino, bonvole gustumu mian dabingon." Li donis al ŝi la interŝanĝitan kaj ŝi ekmanĝis. Ĵus ĉe la ektuŝo de la manĝaĵo la Tria Ino ekfalas teren kun azena heno, kaj transformiĝis en azenon, eĉ tre fortan. S-ro Zhao do rajdis ĝin ekveturi. Li ankaŭ prenis ĉiom la lignajn pupon, bovon, plugilon k.c., sed, ĉar ne posedante la sorĉarton, li ne povas disponi ilin. Tre glate s-ro Zhao vojaĝis multajn lokojn rajdante sur la transformita azeno, kiu povas iri po cent liojn ĉiutage.

Post kvar jaroj li vojaĝis al la trapasejo Tongguan. Atinginte lokon kvin a ŭ ses liojn oriente de la Templo de Huashan-monto, li renkontis apudvoje maljunulon kiu ridegis manklakante, dirante: "Ho, la Tria Ino de Banqiao, kial en tia formo?"

Ekkaptante la azenon li diris al s-ro Zhao: " Kvankam ŝi estas kulpa, tamen vi ja sufiĉe punis ŝin. Bonvole liberigu ŝin ekde nun !"

La maljunulo do ekdisŝiris de la muzelo kaj el la azena felo eksaltis la Tria Ino, tute sama kiel en la malnova tempo. Riverencinte al la maljunulo, ŝi foriris kaj malaperis neniu sciis kien.

**Li Fuyan (aŭtoro en Tang-dinastio)**

# OLDULO ZHANG

Oldulo Zhang estis maljuna legomĝardenisto en Liuhe-gubernio de Yangzhou. Li havis najbaron nomatan Wei Shu, kiu funkciis en Tianjian-erao (502-520) de Liang-dinastio kiel oficisto sub prefekto de Yangzhou. Post plenumo de siaj oficjaroj Wei Shu revenis hejmloken de Yangzhou. Tiam lia unua filino jam havis la harpinglo-portan aĝon, Wei Shu alvokis lokan svatistinon kaj komisiis ke ŝi trovu por li bonan bofilon. Informiĝinte pri tio, Oldulo Zhang kun granda ĝojo atendis la svatistinon ĉe la pordo de Wei Shu. Kiam ŝi eliris, Oldulo Zhang insiste invitis ŝin al sia hejmo kaj regalis ŝin per vino kaj pladoj. Post sufiĉe da drinko, Oldulo Zhang ekparolis al la svatistino:

"Mi informiĝis, ke en familio Wei estas fraŭlino en aĝo por edziniĝo kaj vi serĉos por ŝi la fianĉon, ĉu tio estas vera?"

"Jes." respondis la svatistino.

"Mi, kvankam maljuna," diris Oldulo Zhang, "tamen ja povas vivteni min per kulturado de mia legomĝardeno. Bonvole petu por mi ŝian manon kaj mi certe dankos vin per kontentiga rekompenco post la sukceso!"

La svatistino eksplodis per insultoj kaj kolere foriris, sed la sekvan tagon Oldulo Zhang refoje vizitis la svatistinon.

"Kial vi ne faru iom da pripenso, maljunulo!" malaprobis la svatistino, dirante: "Ĉu povus okazi, ke filino de ŝtatoficisto donus sian manon al maljuna legomĝardenisto? Eĉ se ŝia familio ne estas riĉa, tamen similaj ta ŭgaj familioj troviĝas ja ne malmulte. Vi neniel indas pariĝi kun ŝi. Kial do mi havigos al mi ofendojn en domo de Wei nur pro via taso da dankvino?"

"Vi provu nur unufoje por mi," Oldulo Zhang obstine petegis, "se via propono malsukcesos, tion decidus ja mia sorto!"

Vole nevole, la svatistino transsciigis la peton al familio Wei.

"Ho, kiom vi malestimas min! Ĉu pri mia malriĉeco?" ekkoleris Wei Shu dirante. "Ĉu vi imagas ke mia familio konsentus je tio? Kia homo estas tiu malbeninda legomĝardenisto? Kial li aŭdacas havi tian ideon? Fi al li la nemenciinda ulo! Kial vi estas tiel senprudenta propeti por tiu sentaŭgulo?"

"Jes, ja ne decas ke mi proparolis pri tio." sin pravigis la svatistino. "Sed la maljunulo fojfoje instigis kaj mi vole-nevole devas transsciigi lian

vorton al vi."

"Do diru al li," Wei Shu kun kolerego diris. "mi donos al li la manon de mia filino kondiĉe se li povos alsendi 500 monermilojn al ni en unu tagnokto!"

La svatistino tuj eliris de la domo de Wei kaj transsciigis la vortojn al Oldulo Zhang.

"Jes, konsentite!" Oldulo Zhang respondis, kaj, post nelonge li jam per ĉaro sendis al la domo de Wei – la promesitan 500 minermilojn. Ege surprizite la familianoj de Wei diris: "Hieraŭ mi diris ja ŝercaĵon! La maljunulo vivtenas sin per kulturo de ĝardeno. De kie do li povus akiri tiom grandan sumon? Mi diris pri la kondiĉo por doni manon de mia filino, ĉar mi firme kredis ke li certe ne havas monon. Sed nun li rapide alsendis la sumon antaŭ la tempolimo. Kiel ni devas respondi?"

Wei Shu sendis subobservi la reagon de la filino. Sed la filino montris neniom da ofendiĝo. Wei Shu diris: "Tre eble tio okazas laŭ Destino!" kaj li jesis la svatiĝon.

Post geedziĝo kun filino de Wei Shu, Oldulo Zhang ne forlasis sian profesion ĝarden-kulturon. Li ankoraŭ sterkis, sarkis, kaj vendis legomojn en foiro, dum lia edzino mem kuiris kaj lavis, kun nenia hontemo. Tio tre malplaĉis al ŝiaj parencoj, sed ili neniel povis ĉesigi la malŝatatan konduton de la geedzoj Zhang.

Tiel forpasis pluraj jaroj. Prudentuloj el la parencoj kaj amikoj fine plendis al Wei Shu:

"Jes, via familio estas vere malriĉa, sed ĉu vi ne povis parigi vian filinon al junulo de malriĉa familio? Kial vi edzinigis ŝin al maljuna ĝardenisto? Se vi rigardas vian filinon forlasinda, kial ne sendu ŝin al malproksima loko?"

La sekvan tagon, Wei Shu aranĝis vinon, pladojn. Li venigis sian filinon kaj Oldulon Zhang. Dum drinkado Wei Shu iel sugestis sian deziron ke ili forveturu vivi aliloken.

Oldulo Zhang stariĝis, dirante:

"Kial ni ankoraŭ ne forveturis, ja pro tio, ĉar mi supozas ke vi eble bedaŭrus pri nia disiĝo. Nun, se vi malinklinas pri nia najbareco, ni forveturu tute sen malfaciloj. Ĉar mi havas bienon ĉe Wangwu-monto, morgaŭ ni ekveturos tien!"

La sekvan frumatenton, Oldulo Zhang venis adiaŭi al Wei Shu, dirante:

"Estonte, se vi sopiros nin, sendu la pliaĝan fraton al la suda deklivo de Tiantan-monto por nin serĉi."

Li rajdigis sian edzinon sur azenon, donis al ŝi bambuan ĉapelon kaj ekveturis, mem sekvante post ŝi, kun lambastono en sia mano. Ekde tiam venis nenia informo de ili.

Forpasis pluraj jaroj, Wei Shu eksopiris pri sia filino, opiniante, ke ŝi jam fariĝis malriĉa

ĉifonulino plu ne rekonebla. Wei Shu do sendis sian pli aĝan filon Wei Yifang serĉi sian fratiron.

Venante al la suda deklivo de Tiantan-monto, Yifang renkontis iun nigrehaŭtan serviston, kiu plugis jugante flavan bovon. Yifang demandis al li: "Ĉu ĉi tie troviĝas bieno de Oldulo Zhang?"

La servisto rapide salutis al li kaj respondis: "Ho, s-ro la Unua Frato, kial vi ne venas dum tiel longa tempo? La bieno de Oldulo Zhang estas tre proksima kaj mi vojpgvidu por vi!"

Wei Yifang iris gvidate de la servisto al la oriento. Unue ili ascendis monton, malsupre ĉe la montpiedo fluas rivero. Transirinte la riveron, ili preterpasis dekkelkajn lokojn, kie la pejzaĝoj varias pli kaj pli mirindaj, malsame ol tiuj en la homa mondo. Jen ili descendis de monto, refoje transiris riveron. Norde de la bordo subite vidiĝis granda domo kun ruĝaj pordklapoj. Interne troviĝis pompaj pavilonoj, turoj, sieĝitaj de raraj floroj kaj arboj. Ŝvebis buntaj nuboj kaj flugis tien reen feniksoj, gruoj kaj pavoj. Aŭdiĝis kantado kaj muzikoj tre plaĉaj. Montrante al la domo, la servisto diris: "Jen bieno de Oldulo."

Wei Yifang ege surpriziĝis de tia neatendita mirindaĵo.

Kiam ili venis al la pordo, tie staris lakeo en purpura vesto, kiu humile riverencis kaj kondukis ilin en halon. La halo estis tiel lukse dekoraciita, ke Wei Yifang neniam vidis ion similan aliloke. En aero ŝvebis nekonataj delikataj aromoj, kiuj disvastiĝis inter valoj.

Aŭdiĝis jen sono de interfrapantaj jadaĵoj, kiuj iom post iom proksimiĝis. Eniris du servistinoj anoncante:

"Alvenas la mastro!"

Poste aperis dekkelkaj belegaj servistinoj, kiuj iris duope en paralelaj vicoj kvazaŭ iun kondukante.

Jen subite aperis homo kun majesta ĉapo, portante skarlatan silkan robon kaj ruĝajn ŝuojn.

Servistino kondukis Wei Yifang saluti al li. Tiu homo estis altstatura, digna kaj kun vizaĝo delikathaŭta.

Atente observante, Wei Yifang trovis ke tiu ja estis Oldulo Zhang!

"En la mondo de mortemuloj oni vivas kvazaŭ en fajro," ekparolis Oldulo Zhang. "Antaŭ ol la korpo ĝuis agrablan malvarmiĝon, la flamo de ĉagreno rebruliĝis, tiel ke oni ne trovis eĉ momenton da trankvilo. Kara bofrato, kiel vi povis ĝoje pasigi vian tempon en longa gastado? Via fratino nun kombas al si harojn kaj ŝi baldaŭ elvenas."

Li salutis al Wei Yifang kaj invitis lin sidiĝi.

Post momento, venis servistino anoncante:

"La sinjorino jam finis sian kombadon!" kaj ŝi enkondukis Wei Yifang en salonon por intervidiĝi kun la fratino.

Traboj de la salono estis el kalambako, la pordoj inkrustiĝas je testudkiraso, la fenestroj estis el jaspoj, kaj kurtenoj el perloj, la ŝtuparo aspektis glata kaj verda, oni ne scias el kio ĝi estis farita. La vesto kaj ornamaĵoj de lia fratino pompas tiel lukse ke Wei Yifang neniam vidis similan en la homa mondo. La gefratoj Wei interŝanĝis kelkajn komplimentojn. La fratino parolis nur demande pri la farto de gepatroj, iom seke, ne tre intime.

Post momento okazis bankedo, kun frandaĵoj nepriskribeble delikataj kaj ambroziaj.

Post vespermanĝo, Wei Yifang estis kondukita al interna ĉambro tranokti.

La sekvan frumateno, kiam Wei Yifang sidis kune kun Oldulo Zhang, venis servistino, kiu flustris ion ĉe la orelo de la mastro.

Oldulo Zhang diris, ridante: "Ĉe ni estas gasto. Ĉu decas ke ni lasu lin soleca ĝis vespero?"

Sin turnante al Wei Yifang li klarigis:

"Mia juna fratino volas vojaĝi al la fea monto Penglai, kaj via fratino ankaŭ kunvojaĝos ŝin akompanante. Sed ni certe revenos antaŭ la vespero, kaj vi, bofrato, bonvole ripozu ĉitie libere."

Riverencinte al Wei Yifang, Oldulo Zhang eltiris for.

Post momento, ekaperis buntaj nuboj en la korto, alflugis feniksoj kaj aŭdiĝis muzikoj.

Oldulo Zhang kaj lia edzino, fratino rajdis po unu fenikso, kaj ilin sekvis dekelkaj akompanantoj, kiuj rajdis respektive sur blanka gruo. La birdoj iom post iom flugis alten al la ĉielo, direktante sin rekte al la oriento, kaj baldaŭ ne plu videblaj, sed aŭdiĝis ankoraŭ la milda muziko en aero.

Wei Yifang ripozis en la interna salono. Juna servistino priservis al li tre ĝentile kaj zorgeme.

Vespere, ekaŭdiĝis mallaŭta muzikaĵo, kaj Oldulo Zhang kun lia edzino reaperis en la korto, kaj parolis al Wei Yifang:

"Ho, granda soleco sufiĉe turmentis vin! Tamen, ĉi tie estas loko por feoj. Mortemuloj neniel povis alveni. Ke vi alvenas, tio okazis laŭ via antaŭ destino. Sed ne decas ke vi restas ĉi tie



longan tempon. Morgaŭ ni forsendos vin."

Je adiaŭo, la fratino de Wei Yifang refoje eldiris kaj petis lin transdoni korajn salutojn al gepatroj.

"Ni vivas tiel malproksime for de la homa mondo," Oldulo Zhang diris, "kaj ni ne havis tempon skribi leteron al ili."

Li donacis al Wei Yifang 480 taelojn da arĝento, kaj, aldone ankaŭ malnovan pajlan ĉapelon.

"Se iam mankos al vi mono," Oldulo Zhang diris. "Vizitu al la drogvendisto Oldulo Wang ĉe la norda pordo de urbo Yangzhou, ke li transdonu al vi dek milionojn da moneroj, tiam vi montru al li la pajlan ĉapelon kiel ateston."

Tiel ili disiĝis. Oldulo Zhang ordonis ke la nigrahaŭta servisto sendu la gaston. Kiam ili venis al Tiantan-monto, la nigrahaŭta servisto riverencis al Wei Yifang kaj mem foriris revenen.

Wei Yifang sola revenis al sia hejmon kun la donacita mono. Ĉiuj liaj familianoj tre miris pri lia aventura travivaĵo, opiniante, ke li renkontis ĉu feojn, aŭ fantomojn, sed neniu povis certigi kia interpreto estis pli prava.

Forpasis ankoraŭ 5 aŭ 6 jaroj. La donacita mono tute forkonsumiĝis, kaj Wei Yifang ekpensis pri la promesita mono ĉe Oldulo Wang. Li volis viziti al Yangzhou, sed hezitis, dubante ĉu tio estus fikcio? Li diris al si mem: "Por preni tiom grandan sumon, tamen vi havas nenian ateston en skribo, ĉu la malnova pajla ĉapelo estas taŭga?"

Sed lia financa stato fariĝis pli kaj pli mizera, kaj liaj familianoj ĉiuj instigis ke li vizitu la Oldulon Wang.

"Eĉ se li donos al vi neniom, je kio vi perdos?"

Wei Yifang fine ekiris al Yangzhou. Enirinte la nordan urban pordon, li trovis vendejon kie maljunulo vendas drogojn. Wei Yifang ĝentile ekdemandis: "Ĉu mi havas la honoron scii pri via familia nomo?"

"Mi havas familian nomon Wang." tiu respondis.

"Oldulo Zhang permesis ke mi ricevu de vi dek milionojn da moneroj, kaj li donis pajlan ĉapelon kiel ateston."

"La sumo estas preta," respondis Oldulo Wang. "sed ĉu via ĉapelo ankaŭ pretiĝas?"

Wei Yifang eldonis la pajlan ĉapelon, dirante:

"Vi ja povas kontroli tion, ĉu vi ne konas ĝin?"

Antaŭ ol Oldulo Wang diris ion, eliris depost la blua kurteno knabino, kiu diris:

"Oldulo Zhang ofte vizitis nin. Foje li petis min fliki por li la ĉapelverton. Okaze tiam mankis al mi nigra fadeno, kaj mi ĝin flikis per ruĝa fadeno. Mi ja povas rekoni miajn fadenon kaj kudraĵon."

Ŝi prenis la pajlan ĉapelon, ekzamenis, kaj konstatis ke jes. Tiel Wei Yifang sukcesis kunporti la grandan sumon hejmen reveni kaj li konvinkiĝis ke Oldulo Zhang vere estas senmortulo.

Post kelka tempo, Wei Shu sopiris sian filinon kaj refoje sendis Wei Yifang al la suda deklivo de Tiantan-monto por ŝin viziti.

Veninte al la celita loko, Wei Yifang trovis sin en labirinto de montoj kaj riveroj, nenia vojo tie estis. Li demandis al lokaj arbohakistoj, sed neniu el ili sciis ke troviĝas la bieno de Oldulo Zhang. Kun granda bedaŭro Wei Yifang revenis hejmen, kaj la tuta familio opiniis, ke pro la baro inter feoj kaj mortemuloj ili neniam havos la revidon kun la filino.

Wei Yifang denove serĉis Oldulon Wang, sed tiu ankaŭ malaperis. Forpasis ankoraŭ kelkaj jaroj, Wei Yifang hazarde vojaĝis al Yangzhou. Kiam li promenis ĉe la norda urba pordo, subite li vidis la nigrahaŭtan serviston de Oldulo Zhang, kiu aliris salutante:

"Kiel fartas viaj estimataj familianoj? Kvankam la Sinjorino ne povas reveni hejmen, tamen ŝi estas kvazaŭ ĉiam ĉe vi kaj bone scias ĉiujn detalojn en via domo."

Li transdonis al Wei Yifang dek ĝin-ojn da oro, dirante:

"Jen donaco al vi laŭ ordono de la Sinjorino. Nun mia mastro kundrinkas kun Oldulo Wang en tiu ĉi drinkejo. Bonvole atendu momenton kaj mi eniru raporti!"

Wei Yifang sidis sub la vinflago atendente. Sed ĝis vesperiĝo li ankoraŭ ne vidis eliron de la nigrahaŭta servisto. do, li mem eniris observi. En la drinkejo sidis amasoj da drinkantoj, sed troviĝis ne la Olduloj nek la nigrahaŭta servisto. Rigardante al la oro donacita, li trovis ke tio estas vera oro. Kun miro kaj suspiro Wei Yifang revenis. Per la donacita riĉaĵo li vivtenis sian familion ankoraŭ kelkajn jarojn. Sed poste neniu sciis informo de Oldulo Zhang.



# FORPRENO DE SKATOLO FAR HONGXIAN

Hongxian estis servistino de Xue Song, la armeestro de Luzhou. Ŝi lertis en ludo de kordmuzikilo nomata Ruan kaj bonis historiajn kaj konfuceanismajn verkojn. Xue komisiis ŝin administri liajn dokumentojn kaj korespondon kaj prepari raportojn al la imperiestro. Li eĉ donis al ŝi la titolon "La Interna Sekretario".

Foje, okazis grandioza festeno en la armeo. Hongxian diris al Xue:

"La tamburado sonas sufiĉe triste, la ludanto certe havas malĝojon en sia koro."

Ankaŭ Xue Song bone konis muzikon, li respondis: "Jes. Vi diras prave."

Xue alvokis la tamburiston pridemandi, kaj tiu respondis: "Hieraŭ nokte mia edzino mortis, sed mi ne kuraĝas peti forpermeson."

Xue tuj lasis lin hejmen reveni.

Tiam estis tempo post la erao Zhide (756-757). Paco ankoraŭ ne tute revenis en la baseno de la Flava Rivero, kie troviĝis ne plene eliminitaj ribelaj trupoj. La Kortego fondis Zhaoyi-armeon, kies garnizona komandejo rezidis en Fuyang kun Xue Song kiel ĝia komandanto por regi la vastan regionon oriente de Taihang-monto. Post la milito en lastaj jaroj tiu nova komandejo nur haste fondiĝis antaŭ nelonge. La Kortego ordonis, ke Xue Song edzinigu sian filinon al filo de Tian Chengsi, la armeestro de Weibo, kaj edzigu sian filon al filino de Linghu Zhang, la armeestro de Huazhou, por ke la armeestroj de la tri garnizonejoj boparenciĝu kaj iliaj personoj ofte vizitu unu alian. Tian Chengsi suferis malsanon de venena varmo, precipe en somero. Li ofte diris: "Ho, se mi povus translokiĝi al la garnizonejo oriente de Taihang-monto, mi povos ĝui tian malvarmeton kaj mia vivo certe plilongiĝos je pluraj jaroj."

Tian Chengsi do varbis 3000 sentimajn bravulojn el sia armeo, favore provizis ilin, kaj nomis ilin "eksterdomaj viroj". Tian ofte ordonis ke 300 viroj el ili nokte gardu lian komandemon en Weibo. Li elektis bonaŭguran tagon por aneksi Luzhou kaj transloki tien sian komandemon.

Informiĝinte pri tio, Xue sentis grandan ĉagrenon tagnokte. Li ofte murmuris al si mem suspire, sed povante trovi nenian kontraŭrimedon. Estis nokto, kiam la pordo de kazerno jam fermiĝis kaj la gardoperiodo baldaŭ komenciĝis, Xue promenis en la korto kun apogbastono. Lin akompanis nur Hongxian sola.

"Dum tuta monato," diris Hongxian, "via moŝto ne trankvile dormis kaj manĝis. Ĉu vi zorgas pri la najbara loko?"

"La afero koncernas nian sekurecon kaj vi ne povas kompreni." respondis Xue.

"Kvankam mi estas nur nenobla servistino," diris Hongxian. "tamen mi volas forigi la ĉagrenon de mastro."

Xue do konfidis al ŝi la aferon.

"Mi heredis la honoran titolon de mia patro kaj avo, kaj ĝuas la grandan favoron de la Kortego." Xue diris. "Se mi perdos la teritorion, mi perdos ankaŭ la honoran postenon akiritan dank' al la centjara merito de mia familio."

"Helpi vin estas facila afero." diris Hongxian. "Estu trankvila! Lasu min iri al Weibo observi la situacion kaj subrigardi ĉu okazos io fiintenca. Nun mi ekiru je la unua nokta gardoperiodo kaj je la tria noktmeze jam revenos raportu vi la rezulton. Bonvole preparu rajdan senditon kaj komplezan leteron. Ĉion alian ni traktu post mia reveno!"

"Ho, mi estas vere malakrevida!" kun granda miro Xue diris. "Eĉ ne sciis ke vi estas eksterordinara knabino. Tamen, se la afero malsukcesos, la malfeliĉo trafos nin pli frue. Kion fari?"

"Mi neniam spertis malsukceson!" Hongxian respondis kaj eniris sian ĉambron por prepari la vojaĝon.

Ŝi kombis sian hartuberon laŭ modo de sudokcidenta nacimalplimulto Wuman, kun ora harpinglo en feniksa formo, portis broditan purpuran jakon kaj malpezajn nigrajn silkŝuojn. Ĉe ŝia brusto estis ponardo kun drakaj desegnoj kaj sur ŝia frunto skribiĝis la nomo de la norda dio Taiyi. Ŝi riverencis al Xue kaj malaperis en palpebruma daŭro.

Xue revenis en sian ĉambron, fermis la pordon kaj sidiĝis kun dorso al brulanta kandelo. Li drinkis kutime nur kelkajn pokalojn da vino, sed ĉi nokte li ne ebriiĝis eĉ post drinko de dekelkaj pokaloj. Subite li aŭdis matenan klarionadon en vento kaj folion falinta en la korto. Surprizite li trovis ke Hongxian jam revenis.

Xue ĝoje demandis: "Ĉu sukcesis la aferon?"

"Mi ne kuraĝas ne plenumi la taskon!" respondis Hongxian.

"Ĉu vi mortigis homojn?"

"La afero ankoraŭ ne estis tiel serioza." diris Hongxian. "Mi forprenis nur lian oran skatolon ĉe lia litkapo kiel ateston."

Kaj ŝi daŭrigis raportante: "Antaŭ la noktomezo mi jam atingis Weibo-n. Esplorinte plurajn pordojn mi venis al lia dormoĉambro. Aŭdiĝis la ronkoj de la 'eksterdomaj viroj' en koridoro, mi vidis ke gardantaj soldatoj paŝis en la korto kaj aŭdis iliajn vokojn en vento pri pasvorto. Mi malfermis la maldekstran pordklapon kaj iris al lia lito. Mi vidis ke via boparenco Tian

Chengsi profunde dormis interne de litvualo. Sub lia kapo estis desegnita kapkuseno el rinocera ledo. Lia hartubero estis envolvita per flava gazo. Ĉe lia kapkuseno kuŝis sepstela spado. Ĉe la spado troviĝis ora skatolo malfermita, ene skribiĝis lia naskiĝdato kaj la nomo de la Norda Pokalo – Vivmorta dio. La skribaĵon kovris famaj aromaĵo kaj perloj. Ho, kompatinde! Tiu aremeestro tirana en sia komandejo ja deziras laŭplaĉe agi dum sia vivo, sed en dormo li tute ne konsciis la danĝeron ke lia vivo jen de mia mano. Tamen mi preferis lasi lin vivi, sen kapti sekvata de reliberigo, por eviti bedaŭron en estonteco.

Tiam la lumo de kandeloj jam velkis malhela, kaj la aromaĵo en forno iom post iom forbrulis. Ĉie troviĝis servistoj kaj armiloj. La servistoj dormis ronkante, kun kapo klinita al ekrano aŭ kun tuko en mano. Mi eltiris harpinglon de iuj el ili, kunligis iliajn jupojn, tamen neniu reagis, kvazaŭ ĉiuj dronis en malsana sveno. Mi do forprenis la oran skatolon kaj revenis. Elirinte de la Okcidenta Pordego de Weibo mi iris 200 liojn kaj vidis la Kupran Terason alte staranta kaj la riveron Zhangshui fluanta orienten. Matene ventego balais kampojn kaj la lumo pendis oblikve sur arbaro. Mi foriris en tristo sed revenis kun ĝojo, ke mi forgesis lacon. Mi ĉiam gravuris vian favoron en mian koron, nun fine mi plenumis mian multjaran deziron vin rekompenci. Tial nokte mi ir-revene rapidis 700 liojn. Mi entrudiĝis en danĝeran lokon, preterpasis 5-6 urbojn por redukti vian maltrankvilon. Mi ne kuraĝas plendi al vi pri mia malfacilo."

Xue Song do tuj sendis pere de la rajda sendito jenan leteron:

"Hieraŭ nokte gasto venis al mi de Weibo, dirante ke li akiris oran skatolon ĉe la kapo de Via Marŝala Moŝto. Mi ne kuraĝas ĝin restigi ĉe mi kaj nun redonas ĝin al vi senprokraste."

La sendito galopis sur ĉevalo tuj en nokto kaj atingis la celokon noktomeze. Tie ĝuste okazis intensa traserĉado pri la perdita ora skatolo kaj la tutan armeon regis maltrankvila etoso. La sendito frapis la pordon per rajdvipo kaj petis tujan aŭdiencon.

Tian Chengsi haste eliris. La sendito transdonis al li la oran skatolon.

Akceptante per siaj manoj la oran skatolon, Tian apenaŭ svenis ŝokite. Li gastigis la senditon en sia domo, regalis lin per festeno kaj donis al li multajn donacojn.

La sekvan tagon, Tian ekspedis al Xue senditon kun tridek mil ruloj da silkaĵo, ducent bonrasaj ĉevaloj kaj ceteraj similaj donacoj, kaj kun letero, kiu legiĝis jene:

"Dank' al via granda favoro kaj indulgemo mi ankoraŭ havas kapon sur mia kolo. Mi jam konsciis kaj korektis mian kulpon. Mi agos diskrete por ne venigi al mi malfeliĉon. Mi kuraĝos havi nenian pretendon. Mi certe obeu viajn komandon kaj ordonojn kaj ne kuraĝos arogi kiel via boparenco. Dum via veturo mi servos skvante vian kaleŝon kaj dum via rajdo mi antaŭiros por malfermi al vi vojon. Ke mi havis servistojn nomatajn Eksterdomaj Viroj, tio ja celas gardi kontraŭ rabistoj, sed ne por kovi malbonajn intencojn. Nun mi jam malmobilizis ilin kaj

sendis ilin reveni al hejmvilaĝo terkulturi."

Post tio, senditoj kaj leteroj de Hebei kaj Henan vizitis unu alian en unu-du monatoj. Tiam Hongxian volis foriri.

"Vi kreskis en mia familio," demandis Xue al ŝi. "Kien nun vi volas iri? Krome, mi ĝuste volas vian helpon, kial vi diras pri foriro?"

Hongxian respondis:

"En mia antaŭa vivo mi estis viro. Mi vojaĝis ĉien, studis medicinan verkon de Shengnong, la legenda reĝo en pratempo, kaj savis malsanulojn. Foje al gravedulino, kiu suferis askaridozon mi donis dafnan vinon por forpeli la askaridojn, sed la virino kaj ŝiaj du fetoj balda ŭ mortis. Do, pro mia miskuraco unufoje mortis tri vivoj. Hadeso kulpigis min pri tio, transformis min en malnoblan virinon kun ŝtela naturo. Feliĉe mi naskiĝis en la domo de via moŝto, nun mi aĝas jam 19-jara. Mi portis ĉiajn silkajn vestojn, manĝis ĉiajn frandaĵojn, ĝuis vian favoron kaj al mi venis honoro. Nun en la ŝtato stariĝis leĝo, perfekta por daŭri senfine. Tiuj, kiuj perfidis la naturan leĝon, ja meritas ekstermon. antaŭ tagoj mi iris al Weibo por repagi vian favoron. Tio evitigis al la du urboj militon, protektis la vivon de sennombraj homoj, timigis la perfidan korteganon kaj trankviligis la militistojn. Kiel banala virino, mi ja faris ne malgrandan meriton. Tio sufiĉas por kompensi mian malnovan kulpon kaj rehavigi al mi la originan formon. Pro tio mi devas kaŝi min for de la homa mondo, forigi laikan penson kaj kulturi senmortan spiriton."

"Se mi ne povos reteni vin en mia domo," Xue diris, proponante, "mi volonte donacu al vi mil taelojn da oro por helpi vin en monta vivo."

"Tamen la afero koncernas transan vivon," respondis Hongxian. "Kiel ni povus antaŭaranĝi?"

Xue konsciis ke li ne povas restigi ŝin, kaj invitis multajn gastojn al grandioza nokta festeno por ŝin adiaŭi.

Xue persone verkis muzikan pecon por Hongxian kaj petis gaston s-ron Leng Chaoyang fari tekston kiel

*Kanto 'Trapo-kolektado' plendas pri boato.*

*Adiaŭo nin ĉagrenas ĉe Centfuta Turo.*

*Forveturas en nebulo ŝi kiel najado.*

*Rivero senĉese fluas al ĉiellazuro.*

Fininte la kanton, Xue ege malĝojis. Hongxian riverencis larmante, kaj, ŝajnigante sin ebria, ŝi

foriris de la festeno. Poste, oni neniam vidis ŝin plue.